EL VERKOJ DE E. LANTI

.2.

★ TRI SEMAJNOJN EN RUSIO

★ EPILOGE...

★ TRO PLENA GRAMATIKO...

Cercle espérantiste de l'Agenais
"Laŭte!" * F 47340 Laroque Timbaut
****
1982 * 15 FF

Broŝurservo de S.A.T.

TRI SEMAJNOJN EN RUSIO (1922)

"Tri Semajnojn en Rusio" aperis felietone en "Sennacieca Revuo" de nov., dec. 1922 kaj jan., febr., mart. kaj april-maj. 1923.

"...Jam en 1922, sekve de mia trisemajna restado en Sovetio, mi havis la konvinkon, ke la rusa revolucio alportos al la Laboristaro nur iluziojn kaj poste amarajn elreviĝojn. Sed tiam mi ne kapablus argumenti mian konvinkon. Estis nur forta impreso, ne rezulto de rezonado. Sed la malbona impreso, kiun mi kunportis el Moskvo, igis min esti tre atenta pri faktoj. Mi observis, demandis kaj notis. Kaj jam en 1927-28 mi havis konvinkon, rezultantan de racia argumentaro..."

Lanti, 14.IV.37, en letero al
kamaradino el Valence d'Agen (Francio)

Enkondukaj vortoj

Rusio!... La lando kie, la unuan fojon en la historio, la proletaria klaso konkeris kaj konservis la politikan regadon. Nediskuteble tiu evento (okazego) estas la plej grava el la nuna epoko. La falo de l'putriĝinta cara reĝimo havos certe grandajn sekvojn en estonteco. Tial ĉiuj interesiĝas pri la iome mistera lando, kiun iuj alrigardas kun malamo kaj pereigdezirego ; aliuj kun espero kaj amo...

Jam multe da raportoj, eĉ da dikaj libroj estas verkitaj pri la Soveta Respubliko. Kaj mi supozas tamen, ke neniu el la verkintoj estas tiel pretendema, ke li opinias esti pentrinta la vere veran bildon de la postrevolucia Rusio. Restas do multo direnda kaj pentrinda. Cetere la bildo ŝanĝiĝas, - kaj ĉiu vidas per siaj propraj okuloj.

Tial mi konjektas, ke nia legantaro akceptos kun intereso skizan rakonton pri mia vojaĝo.

Ĉu mi estas tiel akrevida, tiel observpova, ke mi sukcesis vidi la ĝustan fizionomion de vastega mondparto, kie ĉio ankoraŭ bolas, kie ĉio estas kvazaŭ en eksperimenta retorto ? For de mi tia penso !... Kaj mi estas certa, ke neniu leganto esperas trovi tion en ĉi tiu skizo. Mi promesas nur eldiri sincere miajn impresojn, - kaj impresoj ne estas juĝoj.

Nenia politika motivo povas trudi al mi la devon silenti pri la malbonaj impresoj, kiujn mi kunportis el Rusio. Amicus Plato, sed magis amica veritas. Mi amas kaj estas preta defendi la Rusan Revolucion. Nu, ĉefe pro tio mi volas paroli pri ĝi malkaŝe, ne fipolitikiste. Cetere la Soveta Respubliko estas jam sufiĉe potenca por ke, sen ia skrupulo, oni diru pri ĝi la veron. Oni ankaŭ ne forgesu, ke la Bolŝevikoj mem ofte riproĉas akre al si mem.

Fine de tiu raporto oni legos pri la nuna situacio

rusa klarigojn de iu, kiu deziras konservi anonimecon. Tiu kamarado, komunisto, estas tre klera kaj studema homo. Al li oni komisiis tre gravajn diplomatiajn misiojn. Li partoprenis kun Lenin kaj Trocki en gravaj decidoj kaj portas sur siaj ŝultroj parton el respondeco en la okazintaĵoj. La hazardo igis nin interkonatiĝi. Mi povis sperti pri lia spiritobjektiveco kaj plena informiteco pri Rusio (lia lando). Antaŭ ol foriri mi do iris al li prefere ol al iu el la ĉefoj, kies nomoj estas ĉiutage presataj en la gazetoj. Ofte tiuj k-doj estas simple la trumpetistoj, kiuj bruade konigas la decidojn cerbumitajn en kabinetoj. Al tiu eminenta k-do mi diris miajn impresojn, miajn dubojn, mian senreviĝon. Liajn respondojn mi resume kaj kiel eble plej fidele raportos. - Kaj tiel trankvila estos mia konscienco, se ankoraŭ doloras mia koro.

Antaŭ la foriro

- Vi intencas forveturi Rusion !!?... Tion ne faru. Milfoje vi riskas esti mortigata...
- Kial ?...
- Nu, regas tie grandega teruro. La komunistoj konstante perfortas. Vi vidos tiom da kruelaĵoj, ke vi ne povos deteni vin protesti, kaj jen, la ruĝarmeanoj pafos al via kapo...
- De kiu vi estas sciigata pri tio ?
- Antaŭ du tagoj R. mem diris tion al mi. Konatoj liaj rakontis...
- De kiu, tiuj konatoj eksciis pri teruraĵoj ?
- De aliuj, kiuj...
- ...verŝajne legis tion en la burĝaj gazetoj... Nu, bone, mi forveturos. Proprokule mi volas vidi Rusion. De tiel longe mi sopiras al la Meko de l'tutmonda Revolucio. Neniel la danĝero povus min haltigi. Male ĝi havas ian strangan allogon. Mi forveturos...

Tian resumitan interparoladon mi efektive havis kun kelkaj el miaj konatoj. Tipe ĝi montras la ĝeneralan opinion, kiun la plimulto el la Francoj havas pri Rusio. Kaj pro tio mi volis ĝin konigi antaŭ ol komenci mian privojaĝan rakonton.

Survoje al Moskvo

La 1an de aŭgusto mi envagoniĝis ; alvenis Berlinon la morgaŭon ; restis tie du tagojn por prizorgi la pasportan aferon ; poste forveturis al Stettin kaj la 5an enŝipiĝis en Oberbürgermeister Hacken, germana ŝipo veturonta Petrogradon. Tiu ŝipo kunportis agrikulturajn maŝinojn, diversajn aliajn objektojn kaj ankaŭ pasaĝerojn.

Je la 22a horo la ŝipo ekveturis. Mi tre bedaŭris forlasi la Stettinan havenon nokte. Je la luna lumo mi nur povis videti ebenan pejzaĝon kaj ŝipkonstruejojn. Sub tiu pala lumo ĉio vestiĝis per melankolia poezio. Glate iris la ŝipo en la enfluejo de Oder. Pli skua estis la irado en la Baltika maro.

Dimanĉe 6an de aŭgusto. - Ellitiĝinte mi sentas min iom malbonfarta. Kelkaj personoj jam malsanas. Mi penas por kontraŭi la vomemon, kaj sukcesas forigi stomakturniĝon. La maro estas malglata; ondetoj kun blankaj makuloj. Nuboj. La ŝipo antaŭeniras, sed ŝajnas, ke ĝi estas ĉiam centro de granda rondo. La maŝinaro ritme funkcias ; surda bruo. Mevoj ĉirkaŭflugas la ŝipon. Tiele estos la vojaĝo ĝis Petrograd.

Inter la pasaĝeroj estas 5 Italoj, junuloj kiuj devis forkuri el Italio post interbatiĝo kun la faŝistoj ; 2 Alĝerianoj kiuj veturas por studi marksismon ĉe la Orienta Lernejo en Moskvo - cele al posta propagando de l'komunismo inter la Araboj ; Germanoj, Amerikanoj, Rusoj k.a. Mi estas la sola Francdeveninto. Krom kun la Rusoj, kiuj preskaŭ ĉiuj konas tri, kvar aŭ kvin lingvojn, la interkompreniĝo estas malfacila. Plurfoje mi havis okazon paroli pri esperanto. Kaj mi konstatis, ke multiuj ankoraŭ ne scias pri nia afero. Post klarigoj ĉiuj konsentis al nia entrepreno.

Merkrede 9an de aŭgusto. - Jam ni estas en Rusio. Je la 7½ ni enveturas la rodon de Kronŝtad. Aeroplano surflugas. Rusa Komisiono enŝipiĝas por kontroli la pasportojn. Kronŝtad aspektas kvazaŭ mortejo. Oni vidas postsignojn de la marista ribelo. Dekstre fortikaĵo estas detruita.

Je la 11a ni alvenas en la Petrograda haveno. Pluvegas. Oni disdonas paperfoliojn sur kiuj ni devas skribi la

nomon, profesion, deiran lokon, naciecon, celon de la vojaĝo, kiom da tempo ni intencas resti en Rusio. Viro kun pafilo staras ĉe la elŝipejo. Li estas vestita kiel laboristo ne kiel soldato. De sur la ferdeko elmontriĝas du fiakroj, tramveturilo ; virinoj marŝas nudpiede ; junulo mizeraspekta trairas kun pafilo vojon. Preĝejoj kun kupoloj turbformaj staras tie ĉi kaj tie. La domoj estas ŝmiritaj ĉiu per malsama koloro. Kaj tio aspektas plaĉe. Estas jam la 13a, kaj ankoraŭ ni ne elŝipiĝis. Senĉesa pluvado. Rusa junulo alvokas por ke ni venu sur la ferdekon kaj kantu la "Internacio"n. Germanoj, Rusoj, Italoj, Alĝerianoj k.a. ekkantas, ĉiu en sia nacia lingvo. Kia malharmonio ! Ĉiu ĉesas kanti ĉar li konscias pri ridindeco.

La pakaĵoj estas zorge traserĉataj. Kiam venas mia vico, du el la oficantoj demandas min france kaj, post vido de mia pasporto, lasas min eliri sen traserĉo en miaj pakaĵoj. Fine aŭtomobila ŝarĝveturilo alkondukas nin ĉe la "Internacia Hotelo". Tie ni atendas almenaŭ du horojn por ricevi ĉambron. Virino proksimume 30jaraĝa ŝajnas ordoni tie. Ŝi parolas iomete france kaj aspektas kiel prostituciulino ; alia samaspekta junulino kun cigareto ĉe la lipoj kondukas la vojaĝantojn al iliaj ĉambroj.

La "Internacia Hotelo" staras sur granda placo kun arbustoj, verdaĵoj kaj benkoj. Dekstre estas kvadratbaza, kolonhava preĝejo kun ampleksa orumita kupolo. Antaŭ la preĝejo kuŝas amasego da brulŝtipoj, kiujn deĵore gardas soldato. Ricevinte ĉambron mi vidavide iras promeni tra la urbo. Mi iras sencele. Sur la trotuaroj, sur la stratoj troviĝas kotaj kavaĵoj. Plejparto el la butikoj estas fermitaj. Preskaŭ ĉiupaŝe virinoj, geknaboj eĉ viroj, vende proponas plej diversajn aĵojn : pomojn, paprikojn, cigaredojn, kukojn ktp. Estas ankaŭ veturilvendejoj ĉe kruciĝo de stratoj. Ĉie oni renkontas soldatojn. En iu strato mi rimarkas, ke virinoj ire kaj reire paŝas sur la trotuaro. Mi haltas kaj observas : nenia dubo, ili estas prostituciulinoj. Korpremite mi revenas al la hotelo. Temas vespermanĝi. Mi ŝanĝas 3000 mg. kaj ricevas 21 milionojn da rubloj! Nu, mi fariĝis milionulo! En la restoracio mi manĝis

supon en kiu estis viando, diversaj legomoj kaj mi ne scias kio. Ĉion mi ne povis manĝi. Mi trinkis akvon. Kosto : 2 milionoj da rubloj.

Ĵaŭde la 10an de aŭgusto. - La komunista karavano estas sub la zorgado de "Kuriero", kiu kunvojaĝis ĝis Petrograd kaj akompanos nin ĝis Moskvo. Kiam ni forveturos de ĉi tie ? Neniu scias. Nia karavano konsistas el du kategorioj de individuoj : iuj apartenas al la fako "Komintern"(*), la aliaj al la Komisarejo por Eksteraj Aferoj. Iafoje certa rivaleco okazas inter la du fakoj. Kvankam estante samcelaj ili tamen ne havas saman taskon: la unua laboras por forrenversi la kapitalistajn registarojn, dum la dua kontraktas kun ili. La "Eksteraferuloj" plendas pri la maldiligenteco de la kuriero, kiu tute malaperis de kiam ni estas ĉi tie. Ni do decidas iom viziti la urbon atendante ekscii kiam ni forvojaĝos...

Jen la "Vintra Palaco" sur kiu estas videblaj postsignoj de la Revolucio : kuglotruojn kaj diversajn difektaĵojn. Sur la Palaco flirtas la ruĝa standardo. Oni klarigas, ke ĉirkaŭ tiu ĉi cara restadejo estis orumita krado, kiun vendis la Soveta Registaro. Sur la "Kampo de Marso" tute proksime de la Palaco kreskas legomoj. Tie, inter dikŝtona, kvadratangula fermitaĵo kun aperturo ĉe ĉiu flanko, estas tomboj de revoluciuloj mortigitaj dum la ribelo. Sur la stratego "Perspektiv Nevskij" multaj magazenoj kaj butikoj estas malfermitaj. En la montrejoj vidiĝas luksaĵoj : piedvestoj, kukaĵoj ktp. Sur tiu ĉefa strato ĉie estas gevendistoj de plej diversaj objektoj. Mi aĉetas paron da laĉoj por miaj ŝuoj kaj pagas por ĝi 400 000 rublojn. Oni renkontas virinojn elegante vestitajn; kelkajn eĉ lukse. Policanoj ne estas videblaj. Tie ĉi kaj tie soldato aŭ civilvestita viro kun pafilo ĉe la ŝultro ŝajnas deĵori kiel ordigisto. Mi rimarkas, ke la ordonoj ne devas esti tre severaj : la deĵorantoj fumas, senzorgeme babilas kun la civiluloj kaj aspektas tre ne timindaj.

(*)Komunista internacionalo.

Vendrede la 11an de aŭgusto. - Hodiaŭ mi tagmanĝis en restoracio mastrumata de komunistoj. Mi ricevis nigran panon, kiun mi ne povis manĝi, porcion da viando kun terpomoj, kompoton kaj teon kun sukero, kosto : 1 100 000 rubloj.

Pluvas. Ĉu ni forveturos hodiaŭ ? Neniu scias. Mi koleras pro tiu necerteco, kiu malhelpas profitan uzon de la tempo. Ne estas prudente foriri malproksimen de la hotelo ĉar verŝajne venos la kuriero por sciigi nin pri la forveturo. Kion fari ? Mi decidas eniri la preĝejon S-ta Isaako. Okazas diservo. La ĉeestantoj (30 personoj proksimume) preĝas fervore, krucsignas, genufleksas kaj fronte tuŝas la plankon. Diservanto kantas per forta voĉo tre impresiga : ŝajnas, ke ĝi eliras el tombo. Sammomente preteriras la preĝejon kantante aro da soldatoj. Ili marŝas ritme, ordeme, ne portas armilojn. La kanto estas melankolia, unutona, iom mistika. Mi sentas en ĝi kaŝitan forton, grandegan, vastan kiel la stepo kiu verŝajne inspiris tiun kanton...

...Fine ni ekscias, ke ni forveturos hodiaŭ vespere. Je la 21a horo ni envagoniĝas en la diplomata vagono. Ampleksa, komforta ĝi estas. En ĉiu kupeo estas nur kvar personoj. La apogdorsa parto de la benkoj estas movebla. Tiamaniere, ke oni povas ĝin levi horizontpoziĉie kaj utiligi kiel liton.

Sabate 12an de aŭgusto. - Frumatene mi vekiĝas. Briletas jam la suno. Forkuras sufiĉe rapide la vagonaro, kvankam la lokomotivo estas hejtita per ligno. La pejzaĝo estas ĉie samaspekta : senfina ebenaĵo kovrita ĉi tie kaj tie de arbaroj el abioj kaj betuloj.

Ni alvenas Moskvon je la 13a horo. Longa atendado ĉe la stacio. Fine venas omnibuso kiu kondukas nin al la hotelo "Lux" (Lumo) kie estas kutime gastigataj la eksterlandaj delegitoj. K-ino Leiciague, la reprezentanto de l'Franca Komunista Partio, forestas ; ankaŭ Rappoport por kiu mi havas leteron kaj monon. Neniu povas do prizorgi min kaj la du Alĝerianojn, kiuj ankaŭ apartenas al la Franca Partio. Ne estas eble interkompreniĝi kun la hotelmastrumanto, kiu verŝajne parolas nur ruse. Je la 19a ni ankoraŭ atendas ; ĉiuj aliaj alvenintoj jam estas instalitaj. Mi tre malpaciencas. Fine, france parolanta reprezentanto de l'Itala Partio

kompatas kaj bonvolas klopodi por ni. Post sephora atendado mi povis okupi ĉambron kaj manĝeti.

Mi bezonis 12 tagojn por atingi la Mekon de la Revolucio...

En mia ĉambro estas kvar litoj ; du estas okupataj de Amerikanoj kaj la tria de Germano. Tia komuneco tre malplaĉas al mi, solecŝatanto...

Moskvo

La surstrata movado estas tre vigla en kelkaj lokoj. La tramveturiloj funkcias normale. Ili plenigite trakuras la urbon ; knare ili balanciĝas sur eluzitaj, moviĝemaj reloj. Estas mirakle : malgraŭ tia stato mi eĉ ne vidis dum mia ĉi-tiea restado unu solan haltigan akcidenton !... La trotuaroj estas malglate kaviĝintaj. Oni devas tre atenti por ne fali marŝante. Kelkaj aŭtomobiloj rapide forkuras kaj kvazaŭ salte transpasas la kavaĵojn. La fiakretoj - isvolŝiki - iras malrapide. La kondukistoj - nomiĝas ankaŭ isvolŝiki - aspektas al mi tre originale, kun siaj longaj malpuraj surtutoj, ĉe la talio alĝustigitaj kaj siaj legendaj ĉapoj. La maniero laŭ kiu la ĉevalo estas jungita aspektas ankaŭ originale : la flankaj timonoj estas kunligitaj per ligna arkaĵo superstaranta la kolon de la ĉevalo.

Ĉar de unu jaro okazis la "Nep" (Nova Politiko) jam multaj butikoj estas malfermitaj. Ŝajnas ke ili estas bone provizumataj. En aliaj oni prepariĝas por malfermo. Tial mi havas impreson, ke la urbo estis sieĝita dum longa tempo. La malamiko foriris ; kaj nune normala vivo rekomenciĝas. Metiistoj laboras dimanĉe, eĉ nokte por instali butikojn kaj magazenojn.

Kio vere karakterizas la fizionomion de la urbo estas la gevendistoj, kiujn oni renkontas ĉe la sojlo de ĉiu domo, ĉe ĉiu stratangulo, preskaŭ ĉiupaŝe. De matene ĝis noktomeze ili stare aŭ kaŭre prezentas al la preterpasantoj plej diversajn objektojn : bulkojn, ovojn, pomojn, haringojn, cigaredojn, kukaĵojn ktp. ktp. Iuj havas apud si korbon ; aliuj portas montran pladon, sin apogantan sur la brusto kaj retenitan per ŝnuro duonĉirkaŭanta la kolon. En certaj lokoj oni povas kalkuli 20, 25

da tiaj vendistoj, - kiuj iafoje interdisputas por okupi la plej bonan lokon.

Apud mia hotelo, dum tuta semajno, mi vidis viron sanan, laborkapablan, kiu kun brako horizontale aletendita vende proponas... unu razilon !

Se ĉiu strato estas kvazaŭ bazaro, ekzistas tamen lokoj, placoj destinitaj por vendejoj. Oni povus nomi ilin interpuŝejoj. Tie svarmas densa popolamaso. Ekzistas famo, ke en tiuj vendejoj cirkulas plej lertaj poŝoŝtelistoj. Fremdulo, kiu sin riskas tien, devas tre atenti pri sia monujo.

Ĉiupaŝe ankaŭ oni trafas almozulojn : invalidojn, militkripligitojn, infanojn, virinojn kaj eĉ maturulojn laborkapablajn. Ili estas nudpiedaj, malpuraj, la korpo apenaŭ kovrita per nepriskribeblaj ĉifonoj. Ĉe la pordo de pan- kaj kukvendejoj ili du, tri aŭ kvarope staras kaj humile almozpetegas. Ili havas mienon de batitaj hundoj ; kaj certa movo de la ŝultroj indikas, ke ili estas mordataj de pedikoj.

Meze de tia korprema mizero cirkulas personoj sufiĉe komforte vestitaj. La modo tamen ŝajnas esti ĉi tie nekonata. Oni vidas plej diversajn vestaranĝojn. Sed tio neniel malhelpas la virinojn koketi. Multaj viroj portas la nacian kostumon : bluzon, ĉirkaŭatan ĉe la talio per ŝnuro, kaj botojn kun altaj tibiingoj. - Virinoj ankaŭ portas tiajn botojn.

En multaj lokoj vidiĝas postsignoj de la prorevoluciaj bataloj : detruitaj, forbruliintaj konstruaĵoj ; sed oni ankaŭ renkontas domojn, kiuj simple ruiniĝis pro malzorgo. Estas okulfrapanta fakto : dum pluraj jaroj oni apenaŭ laboris ĉi tie. Ĉio aspektas mizere, malpure, eluzite. Moskvo havas sufiĉe belajn, ronddirektajn promenejojn. Sed la gazonoj ne estis zorgataj ; la kradetoj, kiuj ĉirkaŭis ilin, estas rompitaj kaj nun ĉie oni paŝadas.

Tamen kelkloke oni riparas, repavumas per ligno la stratojn. Verŝajne post kelkaj jaroj Moskvo fariĝos pli belaspekta, pli pura kaj ankaŭ espereble malpli malbonodora.

Bildoj

Sur promenejo, superŝutita per varmaj sunradioj, personoj kuŝas sur la gazono ; aliaj sidas sur benkoj ; aliaj preterpasas. Mizera blindulo kaŭras borde de la promenejo. Seninterrompe li balbutas la saman petegan frazon per voĉtono kortuŝiga. Li levas la vizaĝon al la ĉielo, tiel montrante sian nudan kolon sur kiu promenas pedikoj. Iafoje iuj mordetas. Tiam la blindulo rapidmove pinĉas per la fingroj la besteton kaj ĝin ĵetas antaŭen sur la polvon. Li ne mortigas la pedikon. Li bezonus la du manojn, dum unu almenaŭ devas senĉese almozgesti.

*

Oni diras, ke Moskvo enkalkulas kvardekoble kvardek preĝejojn (1600). Mi ne scias, ĉu estas la ĝusta nombro. Sed kiam ĉiuj sonoriloj komencas bruadi, oni kvazaŭ kredas, ke ĉiu domo fariĝis preĝejo. La sonoj, alvenantaj el ĉiuj flankoj, eniras ĉiun lokon, sin trudas, inside penetras vian senton, batas vian animon, konfuzigas vian cerbon, tiele, ke oni povas nur fali sur la genuojn por preĝi aŭ kolerigite ŝtopi siajn orelojn por ne plu aŭdi tiun premkoran bruon. En la aero traflugas io nedifinebla, mistera, ploriga, mistika - stultiga. Tiam oni komprenas la potencon de la religio, kiu sorĉas la animon de l'popolo kaj igas ĝin forgesi penojn kaj mizeron.

Kelkloke malgranda preĝejo staras borde de la trotuaro, kun pordo malfermita. La preterpasantoj vole nevole devas vidi la diservan spektaklon. Kreduloj ĉeestas ekstere. Vidiĝas plej akra kontrasto. La pastroj estas luksege vestitaj, brilas orumitaĵoj, dum plejparto de la ĉeestantoj aspektas tre mizere.

De antaŭ duonhoro mi rigardas tiun spektaklon : kreduloj krucsignas plurfoje, balancas la kapon, genufleksas, kisas la teron. Se estus en alia loko mi preskaŭ kredus, ke ili gimnastikas. Preterpasantoj ankaŭ rapide krucsignas. Rimarkinde estas, ke preskaŭ nur virinoj, maljunuloj kaj kripligitoj vidigas tiujn eksterajn signojn de religia kulto. Mi atente observis, kaj ne vidis eĉ unu junulon krucsigni preterpasante. La plejmultnombraj preterpasantoj ŝajnas esti tute indiferentaj pri la

ĉi tie ludata religia komedio. Kaj tio nedubeble estas konsekvenco de la Revolucio.

*

La urbon transpasas la rivero Moskova. Ĝia, ne tre hela, iom malbonodora akvo fluas malrapide. Apude, la granda, luksega preĝejo "Jesuo Savanto", kiu estis konstruata por danki al Dio pro la malvenko de Napoleono, prezentas sian altan, orumitan kupolon al la kisoj de la sunradioj. Estas la 16a horo. Tute proksime sin banas viroj. Ili estas absolute nudaj. Post la banado kelkaj lude kuras aŭ luktas ; aliaj, surdorse kuŝiĝintaj, liveras al la karesoj de varmeta bloveto la proprajojn de l'vira sekso. Iom pli malproksime sur la alia bordo, estas virinoj, kiuj ankaŭ tute nude sin banas. Neniu - krom mi - atentas tiun spektaklon.

Ĉu mi ne sonĝas ? Ne. Nu, mi prezentas al mi tian bildon en Paris apud la katedralo "Notre Dame". Kia skandalo !...

Ĉu tio ankaŭ estas konsekvenco de la Revolucio ?(*)

*

Laŭlonge de la multe trapasata strato Tverskaja, kondukanta al la hotelo "Lux", estas placeto sur kiu kuŝas amase ruboj de ruiniĝintaj domoj. Nu, jen tie sin paŝtas tute kviete du porkoj !...

*

Viro kun pafilo ĉe la ŝultro marŝas meze de la strato ; sekvas lin du senarmitaj viroj. Post ĉi-lastaj marŝas du soldatoj. Ĉemane ili tenas revolveron kies tubo alcelas la teron... Kio okazis ?...

La kvino iras, kaj neniu atentas pri tiu bildo, kiu verŝajne estas kutima...

*

Surstrata bazaro. Plej diversaj objektoj estas tie aĉeteblaj. Sur placeto 17 ŝuriparistoj en ronda enviciĝo staras. Malnovaj pecoj de ledo kaj plej elementaj iloj kuŝas tere. Nudpiedaj, nudkapaj, ĉifonvestitaj

---

(*)Mi eksciis pli poste, ke dum la cara regado okazis same.

buboj stare aŭ sterne rigardas la ŝuriparantojn. La riparata piedvesto sidas ĉe la supro de stango, kiun la staranta ŝuisto preme tenas per la genuoj... Kaj la suno vertikale ĵetas siajn radiojn, kolorigante per kvazaŭa oro la tutan scenon...

*

Moskvo estas plena je tiaj pentrindaj bildoj. La amatoroj de pitoreskaĵoj venu ĉi tien ; ili akiros grandan provizon da neforgeseblaj impresoj. En tiu intermiksiĝa punkto de Okcidento kun Oriento oni ege ĝuas kontrastojn ne tiome troveblaj alie. Mizerego okultranĉe najbaras kun luksego. La cara regado kaj la religio amasigis en palacojn kaj preĝejojn nekalkuleblajn riĉaĵojn, dum la popolo restis en stato plej mizera. - Kaj ĝis nun la Revolucio ŝanĝis nenion tiurilate...

Iafoje miaj impresoj estis tiom fortaj, mi havis tiel egan spiritstreĉitecon, penante, sed vane, kompreni la min ĉirkaŭantan mondon, ke vespere mi sentis kompletan elĉerpitecon kaj fine indiferentecon pri ĉio. Nitĉevo...

Ĉe la sidejo de "Komintern"

- Kiom da tempo vi intencas resti ĉi tie ? demandis min k-do Doriot, la sekretario de Internacia Junularo Komunista, Franco, kiun mi havis okazon renkonti, ĉe la hotelo "Lux".
- Proksimume tri semajnojn.
- Nu, vi prudente agos ne prokrastante pri viaj klopodoj. Oni ne kutimas rapidi ĉi tie. Plie, neniam oni scias, kiam oni povos forveturi...

Mi do decidis tuj iri al la sidejo de Komintern. Doriot indikis al mi la vojon, faris desegnon sur paperpeco, kaj provizumite de tiu plano, mi iris.

Sen tro granda peno mi trafis la lokon. Sur placo, ne malproksime de l'Kremlo, staras granda konstruaĵo sur kies fasado oni povas legi kvarlingve la faman frazon : "Ĉiulandaj proletarioj unuiĝu".

Mi aliris ĉe la enirejo. Tie du deĵorantaj soldatoj malpermesis, ke mi eniru. Unu diris kelke da vortoj de mi nekomprenataj kaj gestis al apuda pordo. Mi iris tien,

eniris kaj ekvidis sinjorinojn sidantajn antaŭ giĉetoj. Mute mi montris mian legitimaĵon, skribis la nomon de la k-do, kiun mi deziris viziti kaj ricevis paperaĵon kun kiu mi reiris al la soldatoj. Tiam ili permesis, ke mi eniru. En tiu okazo nur gestoj utilis kiel interkomprenigilo.

La de mi vizitoto forestis. Dum unu horo mi sidis en antaŭĉambro, kaj fine fraŭlino germanlingve komprenigis min, ke mi revenu je la dua posttagmeze. Mi do foriris. Survoje al la hotelo mi havis ŝancon renkonti Doriot, kiu venis ankaŭ viziti la sidejon. Klariginte pri mia maltrafo li konsentis akompani min kaj prezenti al k-do Rakoŝi, la Sekretario de Ekzekutiva Komitato de Komintern.

Ne tre akceptema estis Rakoŝi. Li alparolis min jene:

- Ha, vi estas k-do Lanty! Vian mandaton mi vidis ; ĝi ne valoras por ni. Vian organizaĵon ni ne konas. Ĉu ĝi estas komunista ? Ĉu vi konas ĉi tie esp. komunistojn ? Cetere ni ne povas okupiĝi pri esp-o. Ni havas tro da aliaj prizorgendaj taskoj, multe pli gravaj kaj urĝaj. Mi ne komprenas, ke vi venis ĉi tien el Paris pro tia motivo. Vi elturniĝu kiel vi povos. Komintern ne povas pagi por turistoj...

Iom bolis mia sango. Kaj sektone mi respondis al Rakoŝi :

- Nu, ĉu do vi supozas, ke mi intencis gastigi min de Komintern ? Neniel. Mi kutimas kontraŭe elspezi por la komunismo kaj tute ne vivas per la komunismo. Vi malpravas fari tian supozon koncerne min. Mi pagos el mia propra poŝo por mia ĉi-tiea restado. Sed regulan mandaton mi havas kaj nepre devas plenumi la al mi konfiditan mision.
Se la mondlingva afero estas por vi bagatelaĵo, nu, mi prave malprave, kiel internaciisto, konsideras ĝin gravega. Homo kiel Romain Rolland ankaŭ asertas, ke la internaciistoj estas tute malpravaj malatentante tiun aferon...
- Ho, R.R...., literaturisto, ne komunisto, intermetis Rakoŝi kun malŝatema rideto.
- Se pri tiu temo ankaŭ valoras nur opinio de komunistoj mi do citu al vi la nomon de Henri Barbusse, kiu,

kvankam literaturisto, estas komunisto. Li ankaŭ opinias, ke internacia lingvo estas nepre necesa por ke vivu vera Internacionalo, ne Internacionalo de poliglotaj ĉefoj.
- Ĉu vere H.B. interesiĝas pri tiu demando ? iom mirigite demandis Rakoŝi.

Tiam mi prezentis al li ekzempleron de la lernolibro eldonita de Federacio de revoluciaj esperantistoj franclingvaj por kiu verkis H.B. antaŭparolon. Rakoŝi trarigardis la libron kaj diris :
- Bonvolu sidiĝi.

De tiu momento la tono de nia interparolado iom dolĉiĝis. Mi klarigis pri nia movado, montris la cirkuleron de l' Franca Ministro ktp. Post dudekminuta interparolado, Rakoŝi konfesis, ke eble nia agado povos utili la komunismon, sed konkludis, ke nun Komintern ne povas okupiĝi pri la demando.

Tiam mi respondis, ke tute ne estas mia intenco tedi la kom. gvidantojn per antaŭtempaj postuloj. Tia ne estas mia misio. Mi nur venis por esplori la laborojn de la Studkomisiono por alpreno de helpa lingvo en la IIIa Internacionalo, kiu estis starigata dum la IIa Kongreso. Mi devas ekscii ĉu la komunistoj povas prave konsideri tiun entreprenon kiel seriozan kaj indan je atento de ĉiuj komunistaj mondlingvanoj. Kaj mi aldonis, ke kvankam mi estas esp-isto mi estas preta propagandi kaj instrui iun ajn lingvon oficiale alprenitan de Komintern.

Aŭdante la vortojn : "laboroj de la studkomisiono" Rakoŝi ridetis kaj tiam diris kion mi jam resume raportis en la oktobra n-ro de S.R. Li aldonis, ke neniu rajtas sin apogi sur la Komintern por propagandi iun ajn internacian lingvon.

Restis al mi nur peti oficialan ateston de tiu deklaro por esti plenuminta mian mision. Senhezite Rakoŝi liveris al mi la dokumenton, kies originalan franclingvan tekston niaj legantoj jam konas.

Mi plue devas noti, ke, pro neekzisto de esp. komunista organizaĵo en Rusio, mia pozicio antaŭ Rakoŝi ne estis favora. Li eĉ min avertis, ke mi ne devas fidi al iu ajn esp-isto. "Multaj estas kontraŭrevoluciuloj", li aldonis, "Estu singardema, prudenta en viaj rilatoj kun esp-istoj..."

Dank'al Sankta Cirilo kaj lia frato Metodo, la slavoj havas specialan alfabeton. - Kaj tio ankoraŭ iom pli apartigas ilin de la aliaj popoloj. Okcidentano, kiu ne lernis la rusan alfabeton, ne kapablas eĉ legi iun vorton. Sur la ŝipo, rusa K-do iomete instruis al mi la rusajn literojn. Mi do sukcesis legi la nomon de la strato, kie staras la hotelo "Lux". Tverskaja. Ĝuste sur tiu strato ankaŭ troviĝas la redaktejo de "La Nova Epoko", kiun mi intencis viziti. Mi do povis sen plano trovi la lokon. Tie mi trafis plej afablan kaj bonkamaradecan akcepton. Sonis esp-o bele kaj flue en la buŝoj de la rusaj samideanoj. Mi ne plu sentis min en fremda lando.

Ĉeestis K-do Nekrasov, redakcia sekretario de la revuo, K-do Polakov, prezidanto de l'rusa sekcio de E.L.A., K-do Demidjuk, kiu okupas altan postenon en la ruĝarmeo, kaj K-do Futerfas, kiu kritikeme kaj bildriĉe parolas en vera oratoro, kia li estas.

Neniu el ili apartenas al la Komunista Partio. Ili nur simpatias la komunismon kaj lojale kunlaboras kun la Soveta Reĝimo. K-do Futerfas estas anarkisto. Iam li estis arestita pro falsa denunco. Amuza fakto : Ĉar oni trovis ĉe li multajn dokumentojn esperantlingvajn, estis la idisto Milter ("Ĉekisto") kiu esploris la esp-ajn tekstojn. Tial ke oni trovis nenion suspektindan, Futerfas estis liberigata.

Dirinte mian deziron ekinterrilatiĝi kun esp. komunistoj, tuj estis proponate al mi viziti K-don E. Drezen, kiu oficas en la Kremlo.

La morgaŭan tagon antaŭtagmeze, akompanate de Nekrasov, mi iris al Drezen.

Apud unu el la enirejoj de l'Kremlo, humile sin apogas al la fortika muro ligna budo, kie oni devas peti enirpermeson. Enviciĝe ni staris proksimume duonhoron kaj fine ricevis la bezonatan enirpermesilon. Provizumite de tiu paperaĵo ni aliris grandan portalon, kie vico da deĵorantaj soldatoj stare gardis la enirejon.

Montrinte la enirpermesilon ni trapasis sub alta arkaĵo kaj trafis duan vicon da soldatoj, al kiuj denove ni devis prezenti nian rajtigilon. Poste ni transpasis grandan korton kaj alvenis ĉe impona konstruaĵo, kie deĵoranta soldato ankoraŭ unu fojon esploris nian paperaĵon. Trapaŝinte longajn, duonhelajn koridorojn ni fine venis al la ĉambro, kie oficas nia samideano.

Kvankam juna, Drezen okupas tamen tre altan postenon en la administra fako de l'Soveta Respubliko. Li estas vic-direktoro de Tutrusia Centra Ekzekutiva Komitato de Sovetoj. Tiun fakon oni kutimas nomi mallongige V.C.I.K. Kalinin estas la Prezidanto de tiu Centra Komitato, kiu estas (principe) la plej alta Instanco de l'Rusa Respubliko.

Tre afable kaj helpeme akceptis min Drezen. Li sin metis je mia dispono por faciligi kaj agrabligi mian restadon en Moskvo. Mi klarigis al li en kia situacio iom duba mi troviĝas en la hotelo "Lux", pro foresto de la reprezentanto de l'Franca Kom.Partio. Mi diris, ke mi trafas malfacilaĵojn por esti konsiderata kiel rajtigita delegito ktp.

Drezen telefonis ien, skribis letereton, kiun li donis al mi por ke denove mi vizitu la sidejon de l'Komintern ; unuvorte klopodis tiele, ke de tiu momento ĉio glatiĝis antaŭ mi.

Ĉar en tiu momento nia samideano ne disponis sufiĉan tempon por longe priparoli diversajn aferojn, li petis, ke mi revenu posttagmeze je la 5a. Tiel estis interkonsentite.

Je la difinita horo mi revenis sola al la Kremlo. Post la kutimaj formalaĵoj prieniraj mi denove troviĝis en la sekretariejo de l'Vic-direktoro de V.C.I.K.

Ĉar nia Samideano plenumas oficon en la administracia fako mi ne povis trafi pli bonan okazon por ekscii pri la strukturo kaj funkciado de l'Soveta Reĝimo. Mi do petis al Drezen, ke li bonvolu sin lasi intervjui. Tre afable li konsentis, kaj liveris al mi klarigojn, kiujn resume mi konigos en alia parto de mia raporto.

Allo!... - Drezen telefonas, kaj, post minuto : - Hodiaŭ vi estas mia gasto. Tuj venos aŭtomobilo, kiu kunportos nin hejmen. Vi vespermanĝos kaj konatiĝos kun mia edzino.

Ĉu oni povas rifuzi tian afablan proponon ? Kvankam iom ĝenate, mi povis nur danke akcepti...

Post kelkaj minutoj ni veturas tra la kortego de l' Kremlo, kaj rapide alvenas al la Spàsskije vorò̀ta (Sav-pordego). Drezen klarigas pri la sankteco de l' loko. Eĉ la caro demetis la ĉapon, kiam li trapasis ĉi-tien. - Dum ni malpiege malatentas tiun antaŭrevolucian kutimon kaj trapasas kiel en tute ordinara loko.

Sur la turo de tiu pordego estas granda horloĝo, kiu, je la 9a matene kaj je la 9a vespere, ludas per sonoriloj ĉu Internacion, ĉu Funebran Marŝon. Antaŭ la Revolucio ĝi ludis la caran himnon : "Dio la caron gardu" kaj iun preĝon. Apenaŭ emociata mi estas. Strange. Kial entuziasmo ne flamigas mian koron ? Jes, kial? Mi ne povus nun respondi.

Post kvaronhora veturado ni alvenis ĉe mia gastiganto. Lia ĉarma edzino ne parolas esperante, sed malgraŭ tio ne estas malpli afabla. Cetere ĉu estas necese paroli kiam oni sidas antaŭ tablo abunde provizumita per bongustaj manĝaĵoj ? Simpla rideto sufiĉas por montri kontentecon. Certe mi ne bedaŭras mian neĉeeston ĉe la vespermanĝo en la hotelo "Lux"!...

Drezen prave fieras pro sia esp. biblioteko. Kun granda intereso mi povis foliumi kolekton da libroj raraj, kies ekzisto rakontas la historion de la mondlingva movado. Nia samideano nedubeble havas fortan ŝaton al esp-o. Mi konstatis kiom ame li parolas pri nia afero. Sed la vivo estas trudema. Lia ofico forprenas lian tempon kaj li malmulte povas okupiĝi pri nia afero.(*)

(*)Li tamen antaŭnelonge verkis ruslingve pri la problemo de lingvo internacia broŝuron en kiu li provas pravigi la vidpunkton de la mondlingvanoj laŭ la Marksana Doktrino.

Kompreneble ni interparolis pri nia S.A.T.-movado. Ŝajnas, ke ni ne interkonsentis. Drezen riproĉas, ke SAT ne estas pure komunista. Li ne volas kunlabori kun anarkistoj kaj socialdemokratoj. Sed, strange, li estas prezidanto de Sovetlanda Esperanta Unuiĝo, en kiu estas ne nur anarkistoj sed burĝoj el plej certa speco. Tiun kontraŭdiron ĝis nun mi ne sukcesis klarigi.

***

Mi revidis Drezen kelkfoje ĉe la Moskva Klubo Espista, kiu estas malfermita ĉiutage de la 7a vespere ĝis la 9a. La kunvenejo de niaj Moskvaj samideanoj troviĝas en la strato Bolŝaja-Dmitrova, 12. Preterpasantoj povas vidi surgluitan ĉe la vitraĵo de butiko, ne revolucian esp. gazeton, sed Esperanto-n Triumfonta-n!... Se oni alproksimiĝas kaj premas sian nazon kontraŭ la malpuran vitraĵon, oni ekvidas ĉe muro grandan portreton de Zamenhof kaj malgrandajn portretojn de Karl Marx kaj de H. Barbusse. La Klubo enkalkulas 80 membrojn proksimume, estas al mi dirite. Sed ŝajnas, ke la propagando ne estas vigla kaj trafe farata. Mia impreso estas, ke ne tie estas la kerno, al kiu povos alcentriĝi la fortoj kapablaj antaŭenpuŝi nian aferon en la revolucia Rusio. Eble ĝi estas ĉe "La Nova Epoko".

***

Riĉa je poetoj estas la nuna esp. movado. Nekrasov kaj Polakov kutimas rajdi Pegason.

Iun tagon ruĝarmeano, akompanate de Polakov, venis al mi. Ili alportis kolekton de poeziaĵoj por ke mi elektu la presindajn en S.R.

La morgaŭon, Nekrasov ridetis aŭdante min rakonti pri la vizito de "soldato", K-do Rozenblat. Demandite de mi pri la kaŭzo de lia mokemo, Nekrasov respondis, ke tiu "soldato" estas simple... generalo! Rozenblat estas juna, eble 26-jara. Nu, ĉiam mi prezentis al mi generalon grizhara. Mi tute forgesis, ke ankaŭ Napoleono estis generalo je sia 25-jaraĝo. Verdire grado de generalo, laŭ la kutima senco, ne ekzistas en la ruĝarmeo. Tamen la komandrajteco de nia samideano rilatas al tiu

de brigadgeneralo en la franca armeo. Ĉar nia generalo ŝatas poezion, estas komunisto, verŝajne li neniam fariĝos ia Napoleono. Esperinde!...

Kial do je la eksteraĵo mi ne rekonis la gradon de tiu ruĝarmeano ? Tute simple, ĉar li aspektis eĉ malpli komforte ol la plej simplaj germanaj aŭ francaj soldatoj. Li ne estis ornamaĉita per galonoj, kaj mi ne atentis pri la lanaj steloj, kiujn li portis ĉe la maldekstra brako.

Mi rakontas tion, ĉar tiu simpla fakto elokvente montras kiom diferencas la venkinta ruĝarmeo de la kapitalistaj armeoj.

***

Dum debata kunveno, kiun okazigis Moskva Klubo Esp-ista, mi havis okazon konatiĝi kun aliaj esp-istoj. Mi ankaŭ eksciis, ke Kotzin fariĝis komunisto - kaj ne plu okupiĝas pri esp-o. Devjatnin estas nun en Kiev - kaj silentas.

Mi havis impreson, ke la esp. komunistoj preskaŭ hontas pri sia esperantisteco. Ĉar la gvidantoj de Komintern ne interesiĝas pri la afero, ŝajnas, ke niaj samideanoj timas sin kompromiti, farante propagandon en komunistaj rondoj. La severa disciplino komunista sufokis ĉe multaj la entuziasmon kaj la fervoron por esp-o.

Plie, la bedaŭrinda fiasko de E.S.K.I. - Esp. kom. organizaĵo pri kiu estis kelkfoje raportite en S.R. - kaŭzita pro maltrafaj klopodoj de senprudentuloj, ankaŭ kaŭzis disreviĝon kaj malkuraĝiĝon. Kompreneble la ekonomia situacio ankaŭ malfaciligas la propagandon.

Ekzistas en Rusio multe da lertaj esperantistoj. La grundo ankaŭ estas plej bona por prisemado de la ideo pri lingva internaciigilo. Sed niaj rusaj samideanoj, se ili volas sukcese agi en komunistaj rondoj, devas nepre forlasi la malnovan, neŭtralisman propagandsistemon.

Espereble ili ekkonscios pri la grava rolo, kiun ili povas ludi en nia movado. Ili fine trovos la ĝustan vojon. Jam S.A.T. enradikiĝetis en kelkaj rusaj centroj. Mi plene interkonsentis kun la K-doj, grupiĝintaj ĉirkaŭ

"La Nova Epoko". Kaj nedubeble niaj aranĝoj plej bone efikos por la sukceso de la mondlingva afero.

La Kremlo

Ĉu mi provos detale priskribi tiun mirindaĵon, starantan meze de la urbo, apud la rivero Moskova ? Certe ne. Tio superas mian kapablon. Plie mi bezonus multajn paĝojn de la gazeto, por konigi tiun mondfaman citadelon, kiu per siaj monumentoj rakontas la historion de pluraj jarcentoj de la cara regado.

Prezentu al vi, karaj legantoj, ĉirkaŭremparon, havantan periferion preskaŭ trikilometran, en kiu troviĝas plej mirinda amasiĝo de palacoj, preĝejoj, turoj, plej diversformaj konstruaĵoj. Imagu belan antaŭvesperon, kiam la sunradioj ardas al la orumitaj kupoloj, sur kiuj sidas plej delikataj ornamaĵoj : krucoj, emblemoj de la carismo, kiujn la bolŝevikoj prave konservis, ĉar ili estetike harmonias kun la tuto. La vidaĵo estas senkompara, vere belega.

Kiam mi vizitis Drezen, mi trapromenis sur la placoj interne de l'Kremlo. Mi vidis la dikegan sonorilon nomatan : Caro-Kolokol. Ĝi pezas 165 000 kilogramojn. Kiam oni provis loki ĝin en turon, la levaparatoj rompiĝis. La sonorilo falis teren, ankaŭ rompiĝis kaj de tiu tempo kuŝas surloke kiel atestanto pri malhumila intenco.

La Kremlo entenas ne nur la plej grandan sonorilon el la mondo sed ankaŭ la plej dikan kanonon. Ĝi estas nomata : Caro-Puŝa, pezas 49 000 kilogramojn kaj estas tre respektinda, tial ke neniam ĝi pafis - samkiel la Caro-Kolokol neniam sonoris.

Iun dimanĉon mi revenis en la Kremlon. K-do V.Polakov estis klopodinta por ke mi povu partopreni en vizito al la Granda Palaco, organizita por la studentoj de l' Orienta Lernejo.

Ni trapaŝis luksegajn salonojn, kie ĉie estas el oro, marmoro, multkostaj ŝtonoj kaj lignoj. En la Andrea Salonego, unu el la plej luksaj, okazas la kongresoj de Komintern. Sur la muro, vid-al-vide al la podio, kie

sidas la prezidantaro, pendas malgranda portreto de Karl Marks. Malharmonie ĝi aspektas tie. Sed kiom elokvente parolas tiu simpla fakto !

En apudaj salonoj troviĝas longaj tabloj el abia ligno sur kiuj dum la kongresoj manĝas la delegitoj. Tio ankaŭ aspektas strange en tia loko.

La gardisto, maljunulo, kiu akompanas nin, tre pie rilatas al la ĉi-tieaj lokoj. Kiam li eniras iujn ĉambrojn li krucsignas. Jen kapeleto kie la caroj kutimis preĝi ; jen la lito, kie kuŝis Napoleono ; jen... sed tutan libron oni bezonus verki por priskribi tiujn silentajn atestantojn de mortinta pasinto...

Fluo da pensoj premas mian cerbon : La Rusa Laboristaro posedas tiujn riĉaĵojn. Formalaperis por ĉiam la despotismo kiu ŝtele amasigis ilin. Ĉu la komunistoj sukcesos starigi sociordon, kiu ankaŭ malaperigos mizeron kaj perforton ? Jen la problemo, kiu senĉese stariĝas antaŭ min. Politike la Proletario venkis ; sed ekonomie la venko ŝajnas ankoraŭ malproksima.

Ĉe "Narkompros"
(Popola Komisarejo de Klerigado)

Mi precipe volis profiti mian ĉeeston en Moskvo por enketi pri la stato de l'popolklerigado. Bedaŭrinde dum aŭgusto libertempas la lernejoj. Mi do ne povis viziti funkciantan lernejon, kaj devis kontentiĝi per la informoj, kiujn liveris gvidantoj de la kleriga fako.

Iun tagon, akompanate de K-do Nekrasov, mi iris ĉe Narkompros. Tie ni eksciis, ke Lunaĉarski estas nun en Kaŭkazo, kie li ĝuas iom da ripozo. Forestas ankaŭ K-ino Uljanova Krupskaja, prezidantino de la Ĉefa Politik-Kleriga Komitato de la Respubliko. La anstataŭanto, K-do Maksimovski, akceptas nin. Li ne parolas france kaj la tuta intervjuo okazos per esp-o. Jen resumo.

"La edukado. Principe la edukado komenca, meza kaj supera estas deviga kaj senpaga. Sed pro materiaj kondiĉoj estas eble nur la komencan instruon aranĝi sen-

paga, dum la meza estas nun parte pagata. Tamen laŭ lasta decido de Narkompros en tiu ĉi lernojaro ankaŭ la meza lernejo estos senpaga. Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj Narkompros intencas tion efektivigi nepre.

La supera klerigo estas donata laŭ 3 grupoj. 1) Ĉe l'universitatoj ekzistas t.n. laborista fakultato, kiu preparas por fundamenta universitata kurso laboristojn, delegatajn de specialaj komisionoj el sindikatoj.
2) Sukcesinte en la laborista fakultato oni jam povas partopreni en la fundamenta ĝenerala kurso laŭ fakoj.
3) Al la universitato estas krome delegataj por studado ankaŭ aliaj elementoj (ne laboristoj) el diversaj respublikinstitucioj, partiaj, profesiaj ktp. Ĉi tiuj tri kategorioj ricevas tute senpage loĝejon, nutradon, kaj studrimedojn.

En tiu ĉi jaro estas provata 4a kategorio, kiu ne devas superi 10-15% de studentaro kaj kiu konsideras la burĝaron : Oni povas tute libere studentiĝi al la Universitato, sed pagante sufiĉe altan sumon.

Universitatoj. Antaŭ la revolucio ekzistis 9 universitatoj en la tuta lando. Dum la revolucio estis kreitaj pluraj. La plimulto kreiĝis pro lokaj bezonoj kaj deziroj kaj multaj suferis grandan mankon de instruiloj kaj instruantoj. Atentante tutlandan planon, Narkompros malmultigis la universitatojn, pligrandigante la restigatajn. Nun oni kalkulas 15 universitatojn, kiuj pli-malplibone funkcias. En tiu ĉi nombro ne estas kalkulataj la t.n. popolaj universitatoj, komunistaj universitatoj kaj multaj aliaj specialaj kaj ĝeneralaj superaj lernejoj."

Adiaŭonte K-don M. mi prezentis al li unu ekzempleron de S.R. dirante, ke en tiu gazeto aperos la intervjuaĵo. Aŭdante*, ke nia organo estas redaktata en esp-o mi ekvidis en la okuloj de K-do M. skeptikan rideton. Eble eĉ li pensis, ke li estas perdinta tempon akceptante nin. Tamen oni ankaŭ rajtas supozi, ke la lerta tradukado de K-do N. postlasis bonan impreson pri tiu peresperanta intervjuo.

* * *

---

* atentu! absoluta participo (N.d.l.komp.)

La "Proletkult"

En la granda kleriga entrepreno de Narkompros, kio plej interesis min estis la t.n. Proletkult (Proletaria Kulturo). Ĉar Lunaĉarski forestis, oni konsilis, ke mi turnu min al Valerian Polanski, eminenta verkisto, kiu ludis unu el la plej gravaj roloj en tiu artrenoviga iniciato. Komence de l'entrepreno, li estis sekretario de l'Ekzekutiva Komitato Internacia de l' Proletkult, en kiu ni trovas la nomojn de Lunaĉarski (prezidanto), W. Herzog kaj M. Barthel (Germanio), N. Bombacci (Italio), Tom Quelch kaj W. Mac Laine (Britio), War Van Verstreiten (Belgio), R. Lefèvre (Francio), K. Tomann (Aŭstrio), Jon Read (Ameriko), J. Humbert-Droz kaj N. Brindkolf (Svisio).

Nun Polanski estas cenzurestro. La eldonantoj de "La Nova Epoko" kutimas viziti la cenzuroficejon por ricevi permeson pri finfina presado de sia revuo. Iun tagon mi do akompanis Nekrasov al tiu ejo, kaj tie trafis Polanski. Tro okupita li estis por konsenti tiumomente intervjuon. Li petis, ke mi vizitu lin hejme, vespere je la 9a.

Je la difinita horo, Nekrasov kaj mi estis akceptataj en la skribocambro de l'verkisto, kiu afable nin regalis per teo.

Polanski komprenas sed ne parolas france. La tuta intervjuo, kiu daŭris de la 9a ĝis la 11½, okazis per esperanta tradukado. Tutan notlibreton mi plenigis. La intervjuato parolis kun entuziasmo. Estis videble, ke li ŝatas tiun temon. Mi provu resumi liajn dirojn.

* * *

"La laborista mondo sekvas diversajn vojojn por venki la burĝan movadon kaj atingi sian celon - la universalan komunismon. Naskiĝante kiel profesia kaj kooperativa movado, ĝi malvolviĝas en larĝan politikan movadon.

Sed la malnova mondo subpremas la proletariaron, ne nur sur la politika kaj ekonomia kampoj, sed ankaŭ ĝi tenas la laboristajn amasojn en morala servuteco, per

la influo de sia kulturo, bazita sur la principo de l' "sankta" proprajo kaj de l'ekspluatado. Pro tia motivo stariĝos antaŭ la tutmonda proletariaro la problemo ne nur konkeri la politikan povon, ne nur rekonstrui sur komunismaj principoj la ekonomian vivon anarki-individualistan de la burĝaro, sed ankaŭ venki la spiritan servutecon, la burĝan kulturon, kies influo tiom sentiĝis dum la imperialisma milito kaj ankoraŭ sentiĝas, malgraŭ la sociala revolucio, ĝis la proletariaro, precipe dum la nunaj tempoj, estos devigata utiligi la burĝdemokratian inteligentularon.

La revoluciaj marksistoj ĉiam komprenis, ke la marksismo ne sin limigas je la politika aŭ ekonomia batalo ; ĝi estas potenca revolucia movado intelekta, kiu ampleksas la politik- kaj ekonomisciencon kiel siajn konsistigajn partojn. Malgraŭ tio, la politikaj partioj ne sufiĉe atentis la intelektan laboron meze de l'proletariaro. Ili serioze ne starigis la demandon, ĝin analizis, nek rilate al la teorio, nek rilate al la organizado.

La instrulaboro, farita de la politikaj partioj, de profesiaj unuiĝoj kaj klerigaj organizaĵoj ne konsistis en kolektado kaj sistemigo de la elementoj de l'proletaria kulturo ; ĝi estis nur ordinara ĝenerala kulturo. Oni agis sen kritiko, sen konformiĝo al la proletariaj celoj, la vivo de la laboristaro plifirmiĝis en la malnovaj formoj ; ĝi spegulis la burĝan medion kun ties pensmanieroj, sentimentagordoj kaj sociaj rilatoj.

La malnova burĝa mondo ĉirkaŭligis en ĝia tuta vivo la proletarion, per retaro el metodoj, principoj, antaŭjuĝoj. Ĝis nun la proletariaro ne sin liberigis en siaj sentoj kaj rezonoj el la influo de la burĝa psikologio ; ĝis nun la vivo de l'laboristaro tenas per siaj radikoj al la burĝa vivmaniero, kaj tiu morala premado malhelpas la pionirojn de la nova vivo, ke ili libere kaj plene direktu sian revolucian ardon en kreadon de la estonta vivo.

La proletariaro devas krei sian propran kulturon, kiu fariĝos dum la marŝado de l'tempo, kiam la komunisma socio estos organizita kaj estos malaperintaj la klasoj, tuthomara ĝenerala kulturo.

Nia entrepreno difinas al si kiel celon organizi, t.e. ordigi, sistemigi la proletarian kulturon, kies disaj elementoj estiĝas ĉie, kie la pensoj kaj la sentoj malvolviĝis sur la kampo de opa laborado. La Proletkult konstruas tutan sian programon tiamaniere, ke la proletariaro povu sin armi per la nova scio, kulturi sian sentilaron per la nova arto kaj rekonstrui siajn sociajn rilatojn laŭ la nova spirito - reale proletaria, t.e. en opa laborista komuneco.

La tasko de l'revoluciintelekta movado estas duparta: En la unua parto ĝi konsistas en liverado al la proletariaro de la rimedo por rikolti la intelektan heredaĵon, ricevitan de la malnova mondo. Ĝis nun la proletariaro, kaŭze de politikaj kaj ekonomiaj kondiĉoj, ne havis aliron al tiuj valoraĵoj, kaj tamen estas valoraĵoj kiuj povas esti utiligataj en la rekonstruado de la nova vivo. Sed la proletariaro devas kolekti la akiraĵojn de la antaŭaj generacioj ne kiel obeema lernanto, sed kritikante ilin post ilia purigo en la hardilo de l' proletaria konscienco.

En sia dua parto la tasko konsistas en intelektakrea laboro, t.e. en la reorganizado de la sciencoj kaj artoj (poezio, pentro, skulpto, muziko, teatro ktp.) laŭ novaj principoj proletari-kolektivistaj. Nun sur ĉiuj kampoj, super la proletaria eksperimento neeviteble regas la burĝaj pensmanieroj ; tion ni devas ŝanĝi.

K. Marks komencis tiun laboron ; la proletariaro devas ĝin daŭrigi kaj disetendi sur ĉiujn kampojn de la scio, de l'arto kaj sen helpo de la aliaj sociaj elementoj.

Por ke tiu laboro estu produktiva, estas necese krei taŭgajn kondiĉojn por malaperigi meze de l'proletariaro mem la burĝajn antaŭjuĝojn, por ke ĝia verko ne estu ĝenata de la influo de la aliaj popolaj grupoj kaj enhavu en sia malvolviĝo karakteron esence proletarian.

Rilate al tiuj ĝeneralaj celoj, la Proletkult starigas al si specialajn problemojn sur la kampo de la scienco kaj arto aparte. La scienco estas rimedo por la organizado de l'socia laboro. En la manoj de la privilegiaj klasoj ĝi estas super-regad- kaj ekspluatrimedo ; en la manoj de la proletariaro ĝi devas fariĝi potenca ilo por ĝia lukto kontraŭ la naturo, venkorimedo

kaj rekonstruilo de ĝia vivo. La tuta scienca materialo devas esti reesplorata, ne nur vidpunkte de ĝia valoro kaj ekzakteco, sed ĉefe ĝi devas esti ligata per unu sola esplormetodo, por ke la homo povu ricevi ĝustan kaj harmonian koncepton pri la universo. La scienca eksperimentado devas esti ekzamenata je la vidpunkto opalaborista, sisteme eldirata kaj klarigata konforme al la kondiĉoj kaj postuloj de la proletaria verkado. Tiuj konoj ricevos larĝan disvastiĝon en la popolamasoj, helpe de la proletariaj Universitatoj, sciencaj Laborejoj kaj de la laborista Enciklopedio, en kiu la metodoj, la akiraĵoj de la scienco reorganizota laŭ la proletaria vidpunkto devas esti eldirataj kun pleja harmonio, amplekso kaj simplo...

Unuvorte la Proletkult devas formi klerulojn, poetojn, kritikistojn, publicistojn, pentristojn, artistojn esence proletariaj ; ĝi devas trovi novajn formojn de sociaj rilatoj kaj ellabori proletarian moralon, naskotan en la opa lukto kaj laborado.

La Proletkult estas la intelekta organizaĵo de l' proletariaro, kiel la komunista Partio estas ĝia politika organizaĵo kaj la profesiaj unuiĝoj ĝia ekonomia organizaĵo. La Proletkult sin bazas sur la industria proletariaro, kaj ĝia unua ĉelo estas la proletkult de l'fabriko, de iu ajn laborejo. Poste sekvas la korporacioj de la urboj, de la provincoj kaj fine la centra proletkult.

Kompreneble tia intelekta kaj artrenoviga movado devas nepre esti internacia. Ni devas krei la internacian Proletkult por atingi la diktatorecon de la proletariaro ne nur sur la politika kaj ekonomia kampoj sed ankaŭ sur la kampo de la intelekta kulturo."

***

Tiuj deklaroj montras klare la celon kaj planon de la iniciatintoj de l'Proletkult. Aŭdante Polanski mi spertis, ke li estas plene konvinkita ; li ne dubas pri la praveco de l'entrepreno. Senhezite, kvazaŭ profete li parolis. Kaj oni ne povas ne admiri la spiritkuraĝecon de tiu pioniro.

Ĉar la proletkultmovado ekzistas jam de kelkaj jaroj

mi demandis pri la rezultaĵoj atingitaj. Pri tiu temo P. ne parolis kun tiom da certemeco. Li klarigis, ke nun li ne plu okupas oficon en la Proletkult kaj pro tio ne povas citi tute precizajn faktojn.

Komence la Proletkult estis tute aparta, sendependa organizaĵo. Ĝi enkalkulis pli ol 500 000 lernantojn. Nun ĝi funkcias en la kadro de Narkompros, kaj tio estas bedaŭrinda, diris P. La Ŝtato postulas praktikan laboron : teatraĵojn, plakatojn* ktp. Eniris la organizaĵon burĝaj elementoj, kiuj fuŝas la aferon. De post la Nep malgrandiĝis la nombro de studentoj. Oni devis fari severan elekton. La profesiaj unuiĝoj elektas mem en sia medio la laboristojn kapablajn studentiĝi. Tiuj povas dediĉi sian tutan tempon al lernado, sed restas sub la kontrolo de la profesiaj unuiĝoj kun kiuj ili restas en senĉesa kontakto por ne perdi la proletarian influon.

Ŝajnis al mi, ke P. ne estas kontentigita de la rezultaĵoj. Li akcentis plue, ke Rusio ne estas sufiĉe industria lando por ebligi ekfloradon de vere proletaria artsento. La kamparano estas influata de la naturo, la metiisto de la tekniko. Necesas, ke la proletkultmovado enradikiĝu en landoj industriaj. Ĝis nun la movado kresketis en Germanio, Italio, Svedio, Ĉeĥoslovakio kaj Anglio. Notinde estas, ke en ĉi tiu lasta lando la Registaro malpermesas la eniron de artaj produktaĵoj el Rusio. Kaj tio pruvas, ke la Angloj komprenas la revoluciigan povon de l'arto. En Francio la movado estas apenaŭ konata, ĉar la tragedie mortinta R. Lefèvre ne povis dissemi la ideon. Pri Ameriko la samo okazis pro la morto de John Read.

Antaŭ ol adiaŭi mian gastiganton, mi demandis lian opinion pri esp-o. Li respondis, ke antaŭ multaj jaroj li lernetis la lingvon, sed ĉesis opiniante ke artefarita lingvo ne estas vivpova ktp. Ĉar ĝuste R. Rolland pritraktas tiun punkton en sia artikolo mi profitis la okazon por konigi al P. lian opinion. Nekrasov kaj mi

---

* ? (N.d.l.kompilinto)

kompreneble varme subtenis nian vidpunkton, kaj fine P. konfesis, ke eble li eraris. Mi aldiris, ke nia esp.-movado povas ludi gravan rolon en Proletkult. La uzado de logika, sennacieca lingvo nedubeble influas sur la sent- kaj penskapablon. Kaj en tiu simpla fakto kuŝas ebleco de renovigo de l'artoj.

Niavice ni parolis pri esp-o same entuziasme kiel P. pri Proletkult. Estis malfrue, ni forlasis la kvietan hejmon de la ĉefcenzuristo, trairante en mallumo grandan ĝardenon. Bojis hundo. Kaj la skeptika diableto, kiun ame mi nutras, flustris al mia orelo : Ĉu proletkultentuziasmulo estas pli aŭ malpli ridinda ol esperantoentuziasmulo?...

Ĉe la sidejo de l' "Proletkult".

Nedubeble la klarigoj de V. Polanski estas treege interesaj, sed ili estas nur teoriaj klarigoj ; - kaj ĉefe mi deziris vidi proprokule la rezultaĵojn atingitajn de la Proletkulta Institucio.

Tiucele mi iris kun K-do Nekrasov, mia helpema kaj lerta interpretisto, ĉe la sidejon de l'Centra Komitato de l'Proletkult, kiu staras Vozdviĵenka, 16.

Tie oni eniras sen iu ajn formalaĵo. Forestas deĵorantaj soldatoj. Junulinoj kun cigaredoj ĉe la lipoj petole saltadas en la koridoroj. Senceremonie ni eniras la skribo-ĉambron de la vic-prezidanto de l'C.K., K-do Tajdiŝ. Afable li akceptas nin, kaj aŭdinte, ke mi deziras vidi funkciantajn kursojn, li klarigas, ke bedaŭrinde tio estas neebla. Estas nun la lerneja libertempo. Plie oni ne povas viziti la laborejojn, tial ke oni tie faras diversajn riparojn kaj ŝanĝojn.

Neniu tempo estis do pli maloportuna por viziti. Mi devis rezigne kontentiĝi per la klarigoj, kiujn bonvolis liveri K-do Tajdiŝ. Mi ne raportos ilin, ĉar plipart tio estus simpla ripetaĵo.

Estas tamen notinde, ke la vic-prez. de l'Proletkult estas laboristo, kiu antaŭ nelonge laboris en fabriko. La prezidanto, K-do V. Pletnev, ankaŭ estis laboristo,

lignaĵisto. Tamen, ĉi-lasta verkis la dramon "Lena", kiu trafis sufiĉe atentindan sukceson en la 1a Laborista Teatro de l'Proletkult (Moskvo).

K-do Tajdiŝ klarigis, ke "Lena" estas la nomo de rivero en Siberio, apud kiu troviĝas multaj orminejoj. Tie okazis en 1912 ribelo dum kiu multege da laboristoj estis mortpafataj de soldatoj. K-do Pletnev prenis tiun okazintaĵon kiel temon por sia verko.

Tiu teatraĵo estas verkita, enscenigita kaj ludita nur de proletkultanoj. La ĉi-apudaj bildoj* montras kiom originalaj estas la scenaj dekoraĵoj. Oni tamen rimarku, ke la aktoroj ne aspektas "kubisme" kiel la dekoraĵoj, kaj tia okulfrapa kontrasto kaŭzas malharmonion. Sed ne estas mia intenco kritiki la "kubismon". Mi simple konfesu, ke mi ne komprenas ĝin.

Nia interparolanto klarigis, ke la celo dum la prezentado estas igi la rigardantaron iel partopreni la ludon. Iafoje la aktoroj trapasas la parteron aŭ la galeriojn. Ili alparolas la publikon, improvizas pri iu aktuala temo kaj ĉiel penas streĉi la atenton. La ludado estas tiel vigla, rapida kaj senhalta, ke kvar scenoj ne daŭras pli ol $1\frac{1}{2}$ horojn.

Kiom mi dezirus ĉeesti tian prezentadon ! Sed bedaŭrinde la teatroj somere estas fermitaj. Nur image mi povas prezenti al mi la spektaklon.

Sajnas ke ĉio konkuras por ke mi povu nur supraĵe vidi la rusan vivon. Mi foriros kun ŝanĝiĝemaj impresoj, kun neniu firma juĝo.

Tamen dankata estu K-do Tajdiŝ, kiu bonvolis liveri por nia revuo diversajn gravuraĵojn kaj fotojn. Ti-kiujn mi jam presigis nedubeble montras laŭdindan deziron forlasi la trapaŝitajn vojojn. Oni ne povas ne admiri la spiritmaltimon de la proletkultanoj. Vigleco, vivanteco, ioma manko de teknikeco karakterizas iliajn verkojn. Tiuj ecoj verŝajne plej taŭgas por krei la antaŭviditajn ĉefverkojn de l'pioniroj de tiu artrenoviga movado. Regas kompreneble certa kaoso. Oni ankoraŭ ne ekvidas precizan direktivon, sed nur fortegan deziron forĵeti la pezan tradicion kaj krei ion novan. Ne dum detrua, liberiga

---

* Tiuj bildoj, nerepresigeblaj, aperis en S.R. de feb. 1923. (N.d.l.komp.)

periodo povas kreiĝi ĉefverkoj. - La penado liberiĝi de la malnovo estas eble la plej laŭdinda ĉefverko...

Antaŭ ol foriri el la proletkulta sidejo, ni ankaŭ intervjuis la direktoron de l'Scienca Sekcio, K-don Zander, profesoron de naturaj sciencoj. Tiu eminentulo estas proksimume kvindekjara, aspektas modeste kaj akcepteme. Lia sekretario, altkreska junulo kun duoncinika rigardo ŝajnas esti poligloto :
- "En kiu lingvo mi devas paroli?" li demandis. K-do Nekrasov sciigis, ke mi estas "Franco".
-"Nu, bone, mi parolos france", respondis la interpretanto en franca lingvo kun preskaŭ perfekta akcento.

Ni sidiĝis en komfortan brakseĝegon antaŭ la skribotablo de la Direktoro, kaj jen nia juna"scienculo" komencis veran paroladon pri la grandaj projektoj de l' Scienca Sekcio de l'Proletkult. Ĉiuj fakoj estis esploraj. Senfine la parolanto klarigis pri ekonomiscienco, pri rilatoj inter la arto kaj la scienco, pri la historia materialismo, pri tutkompreno de l'universo, pri metodologio, tektologio kaj aliaj ...logioj. Li detale klarigis pri la densaj programoj, pri... - estis videble, ke la parolanto volis mirigi nin.

Kelkfoje prof. Zander, kiu verŝajne iomete komprenas france, haltigis la parolanton por reĝustigi kelkajn punktojn. Post mallonga paŭzo la interpretanto rekomencis siajn klarigojn, provante tamen pravigi la negravecon de siaj eraroj.
Kiam la parola torento kvietiĝis, ni demandis la nomojn de la profesoroj de la diversaj fakoj. Tiam ni ekscis, ke la mirinda plano estas nur... plano.

Per pli mallaŭta tono la juna "scienculo" konfesis, ke la Scienca Sekcio ekzistas nur de post kvar monatoj, ke ĝis nun neniu kurso okazis, ke oni nur demandetis al kelkaj profesoroj, ĉu ili konsentus instrui en ia aŭ alia fako, ke la ideoj de l'Scienca Sekcio ne estas akceptitaj de ĉiuj, sed nur de kelkaj organizaĵoj, inter kiuj la Sindikata Konsilantaro Moskva ; ni unue devas propagandi niajn ideojn, akcentis nia interparolanto.
Propagando, propagando !

Skizo pri la rega strukturo

Amplekaan studon oni devus fari por montri la funkciadon de l'nuna regado rusa. Tia ne estas mia intenco. Mi nur desegnu siluetan bildon per la elementoj, kiujn bonvolis liveri S-ano E. Drezen, kiu oficas en la administra fako.

Estas fakto, ke malgraŭ multaj jam publikigitaj studoj pri Rusio oni estas ĝenerale tre nescianta pri la soveta regado. Tial mi opinias, ke tia skizo interesos nian legantaron.

Aliparte estas neforgesinde, ke senĉese la situacio modifiĝas. Novaj dekretoj estas ofte eldonataj. Multaj projektoj pro diversaj malhelpaĵoj restas nur projektoj. Estas nur certe, ke ĉiuj estas konceptitaj por la profito de l'proletariaro, kiu, bedaŭrinde, tro ofte ne kapablas forskui la burĝan, malnovan vivkomprenon kaj tiele malebligas ilian realiĝon. Tial la rusaj gvidantoj eksperimente konstruas laŭeble novan socian ekvilibron, adaptigeblan al la nunaj cirkonstancoj.

La regorganismoj : La leĝfara povo, kiel ĝi funkcias en la demokratiaj landoj, ne ekzistas. Anstataŭas ĝin la Tutrusia Kongreso de l'Sovetoj, kiu okazas ĉiujare. Tiu Kongreso elektas konstantan komisionon el tri cent membroj, kiun oni nomas Tutrusia Centra Ekzekutiva Komitato de l'Sovetoj, kies prezidanto estas Kalinin. Tiu organismo estas ruĝe, mallongigite nomata Vcik. Siavice Vcik elektas Praesidium'on (Prezidantaro). Dekretoj anstataŭas leĝojn.

La Sovnarkom (Soveto de popolaj komisaroj) aplikas la ekzekutivan povon. Lenin estas la prezidanto de tiu Soveto. Alia organismo estas la Sovnarĥoz (Soveto de popola mastrumado). La juĝojn aplikas tribunaloj, konsistantaj el popola juĝisto kun du helpantoj. Ĉi-lastaj devas esti laboristoj, kiujn proponas profesiaj sindikatoj. La kasacian povon posedas la popola komisaro por juĝaj aferoj.

Kiel oni vidas, la far- kaj leĝaplika aparato estas sufiĉe simpla. Malpli simpla estas la ekonomia strukturo.

Antaŭ la N.E.P. (Nova Ekonomia Politiko) : Dum la jaroj 1918-20 la tuta industrio estis socialigata. Same ĉiuj bienoj. La fabrikoj estis transdonataj al Popolaj Mastrumkomitatoj. 80-90% el la bienoj ekposedis la kamparanaro ; 10-20% konserviĝis kiel sovetbienoj, administrataj de ŝtataj terkulturaj oficejoj.

Dum la N.E.P. : La tero restas posedaĵo de l'Regno. Ĉiu povas uzi la teron, sed neniu rajtas ĝin vendi. Ŝtataj terkulturaj oficejoj distribuas la teron. Luo de tero povas okazi en certaj kondiĉoj. Ekzemple, edzino povas ludoni la teron de sia mortinta edzo por nutri la infanojn.

Ekzistas ŝtataj sovetbienoj (*), kiuj servas kiel modelaj stacioj. Lastatempe oni ekstreme zorgis pri altigo de ilia nivelo de mastrumado.

La granda, "peza" industrio restas je la dispono kaj posedo de l'Ŝtato, kiu starigis la specialajn trustojn por ĝia administrado. Malgrandaj fabrikoj povas esti fondataj kaj gvidataj de privataj personoj aŭ kompanioj. La malnovaj, antaŭe socialigitaj entreprenoj, povas esti je certaj (plej diversaj) kondiĉoj ludonataj de la ŝtato al privatuloj.

La Komerco : Ĝi estas preskaŭ absolute libera, ekskluzive oraĵoj, kiuj povas esti vendataj nur al la Ŝtato.

La Ŝtato, trustoj, sindikatoj kaj apartaj regnaj institucioj starigas siajn magazenojn por konkuri(**) kun la privataj entreprenoj. La celo estas starigi potencan ŝtatan komercaparaton, kiu estru la borson kaj obeigu al si la tendencojn de la malpli potenca komercistaro.

Valuto-financoj : La kurza falo iom post iom haltiĝas. La kaŭzoj estas : 1)firma budĝeto; 2)pligrandigo de la enspezoj; 3)malpligrandigo de la elspezoj, kaŭzata de la

---

(*)Pri tiuj bienoj oni rakontis al mi, ke ili tute fuŝfunkcias, ke la kamparanoj primokas ilin ktp. Sed tio estas por mi nur onidiro. Mi ne vizitis tiujn bienojn kaj sekve ne povas havi juĝon pri ili.

(**)Pri tiu konkurado oni ankaŭ rakontas, ke la privataj entreprenoj tre pli bone prosperas ol la ŝtataj. Eĉ komunistoj konfesis tion al mi.

malpligrandigo (trifoja) de la armeo, de la ŝtata oficistaro, likvido de malprofitaj entreprenoj kaj ilia transdono al privatuloj.

Interesa, notinda iniciato estas la grenobligacioj, kiuj estas eldonitaj je 10 milionoj da ekzempleroj kaj venditaj ĉiu po unu pudo (16-17 kg) da greno. Ĉar la rikolto estis sufiĉe bona tiu spekulacio bone prosperis.

La ruĝa armeo. Pri la strukturo de la soveta regorganaro ne decus forgesi noti la ruĝarmeon. Ĝi estas klasa armeo : 52% da oficiroj estas ĉu laboristoj ĉu kamparanoj ; 48% estas antaŭaj oficiroj de la carismo. Multaj iamaj generaloj, sub certa kontrolo, laboras en teknikaj fakoj. Ekzemple, Brussiloff, kies filo estas mortigita de Denikin'anoj.

Regas disciplino, ordo. La ruĝarmeanoj konscias pri la bezono kaj celo de tiu defenda organo. - Organo, kiu ne nur defendas la sendependecon de Rusio, sed plie estas iel je la servo de la mondrevolucio en oportunaj cirkonstancoj.

Kvankam regas dum la deĵorado severa disciplino, ekster tiu tempo la ruĝarmeanoj estas civitanoj samrajtaj kiel la civiluloj. La soldatoj, promenante en la urbo ne salutas renkontatajn ĉefojn, kiel okazas en la aliaj landoj.

Parolante pri K-do Rozenblat, mi jam notis, ke oficiroj kaj soldatoj estas vestitaj per samaspekta uniformo. Precipe la ĉapo aspektas strange. Ĝi havas formon de kasko sur kiu kuŝas malalta, ronda kamentubeto. Tiu formo memorigas pri la mezepokaj kaskoj.

La militserva tempo daŭras $1\frac{1}{2}$ da jaroj. Ĉiu 16-18-jaraj junuloj devige antaŭpreparas sin por la militservo.

La salajro en Moskvo (*)

Tarifa sistemo enhavas 17 kategoriojn rilate diversan kvalifikon de laboristoj. Salajro de 1a kategorio rilatas tiun de 17a kategorio, kiel 1:7. La registaro dekretas ĉiumonate tarifon, kiu estas minimumo, sekve neniu rajtas pagi malpli, ol la dekretitan sumon. Tiu minimuma

---

(*)Ĉi tiujn notojn mi danke ŝuldas al K-do Demidjuk.

tarifo estas publikigata por 3 grupoj. La 1an grupon eniras laboristoj de metalindustrio, minejoj, elektroteknika industrio, transporto, poŝto, telegrafo ; la 2an grupon eniras laboristoj de kemia kaj konstrua industrioj ; fine la 3an grupon eniras laboristoj de ceteraj industrioj kaj de komisarejoj(*).

Bazante sin sur minimuma tarifo, profesiaj unuiĝoj (sindikatoj) ellaboras ĉiu por laboristoj de sia faka industrio tarifojn por apartaj laborejoj, plialtigante la tarifon depende de ekonomia stato de tiuj lastaj ; ju pli firma estas la ekonomia situacio, des pli proksimiĝas la tarifo al plena kontentigo de vivbezonoj de laboristo.

De privataj entreprenoj la profesiaj unuiĝoj postulas por laboristoj salajron, plene kontentigantan iliajn vivbezonojn. La tarifo estas fiksata per speciala "kolektiva kontrakto" inter laboristoj kaj administracio de laborejo, kion peras la sindikatoj kaj al kiuj apartenas la rajto leĝe firmigi tiujn kontraktojn.

La ĉi-suba tabelo montras diversan grandecon de salajro dum septembro 1922.

kategorio	koeficiento	Monata salajro			
		1a grupo	2a grupo	3a grupo	Salajro en iu entrepreno de kemia industr. fiksita per kolektiva kon.
1.	1	11550000	9900000	8500000	38800000
6	2	23100000	19800000	17000000	76800000
9	4	46200000	39600000	34000000	153600000
15	6,1	70455000	61391000	51850000	188160000
17	7	81620000	69300000	60200000	268800000

(*)La ĉiutaga labordaŭro por maturaj manlaboristoj estas okhora, por kancelarioficistoj seshora. La labordaŭro estas seshora por ĉiuj 16-18-jaruloj. La infanoj malpli aĝaj ol 16 jaroj ne povas esti dungataj. En la fabrikoj regas la Tajlorsistemo. Ĉiu laboristo devas plenumi minimume difinitan taskon. Aliel ĝia salajro estas malpligrandigata. En certaj okazoj la sindikatoj permesas plilongigon de la labordaŭro. La invalideco estas prizorgata per procentaj sumoj devige pagataj de ĉiuj laboristoj.

Por ilustri tiujn ciferojn, ni citu kelkajn prezojn, kontrolitajn por 1a de Septembro.

1 kg. da tritikpano	1500000
1 kg. da sekalpano	375000
1 kg. da viando	2500000
1 kg. da sukero	4000000
1 kg. da butero	6500000
1 kg. da terpomoj	175000
1 paro da virŝuoj simplaj	18000000

Al tiu salajro estas aldonenda la "paiok", t.e. naturaĵoj, konsistantaj el faruno, viando k.a. manĝaĵoj.

La loĝejoj

Ne temas esplori ĉu ili estas komfortaj kaj puraj, sed nur ekkompreni kiel funkcias la uzado kaj konservado de ili.

Ekzistas sovetdomoj kaj sovethoteloj, mastrumataj de la Ŝtato ; aliaj estas sub kontrolo de mastrumoficejoj, kiuj luas la loĝejojn.

La amplekso de loĝejo por ĉiu persono estas limigata

La loĝantoj de ĉiu domo luprenita de mastrumoficejo formas inter si loĝejan kooperativon, kiu prizorgas kaj riparas la domon. 15-20% da spaco loĝeja restas je la dispono de la komunumo, kiu uzas ĝin por laborantoj, bezonantaj loĝejon.

Malgrandaj dometoj povas esti luataj al privatuloj.

La Muzeoj

Ĉiuj, eĉ la egaj kontraŭuloj de l'bolŝevikoj, konfesas, ke Lunaĉarski ĉiel penis por konservi la artajn riĉaĵojn kaj sukcesis plene. La kolektaĵoj ĉu de granddukoj ĉu de riĉuloj apartenas nun al la regno kaj estas zorge aranĝitaj kaj konservataj. Tiuj kolektaĵoj estas nun je la vida dispono de ĉiuj havantaj cent mil rublojn

Efektive, oni devas pagi por viziti la muzeojn. Sed la prezo estas tre malalta, se oni konsideras, ke fundo da piroj kostas unu milionon. Estas do pli malkare reg siajn okulojn per vido de artaĵoj ol sian palaton per fruktoj.

Nur du muzeojn mi vizitis : la Tretiakofgalerionkaj la antaŭnelonge starigitan Tolstojmuzeon.

La Tretiakofgalerio enhavas mirindaĵojn. Multaj ĉitieaj pentraĵoj estas mondfamaj, kiel ekzemple tiu, prezentanta la caron Ivan la Terura post kiam li estas mortiginta sian filon. La tuta historio de Rusio estas tie rakontata de pentristoj.

Mi rimarkis ankaŭ kelkajn pentraĵojn de Francoj, inter kiuj mi notu la nomon de Carrière kaj Monet.

Kompreneble mi ne priskribos la tieajn artajn riĉaĵojn. Cetere mi devas konfesi, ke la vizitantoj pli interesis min ol la vizitaĵoj. Estis dimanĉe. Videble la plimulto da ĉeestantoj estis laboristoj. Emociite mi admiris kiel serioze, studeme kvazaŭ religisente ili rigardadis kaj sintenis en tiu sanktejo de l'arto.

La rusa popolo tiel longe tenata en malklereco per la carismo havas nun egan deziron kleriĝi, akiri la tutan sciencon, kiu faros el ĝi la indan gvidanton de ĉiuj aliaj popoloj. Mi konfuze sentis tion kaj dolĉiĝis miaj aliaj akraj, malbonaj impresoj.

***

Alian dimanĉon mi vizitis kun K-do Polakov la Tolstojmuzeon. Ĝi konsistas plejparte el fotoj, montrantaj la mortinton sub diversaj aspektoj. Ĉiam severa, malkvietaspekta, neridema vidiĝas la apostolo de Jasnaja Polanja. El la kelkcentoj da fotoj, kiujn mi rigardis, nur du montras rideton sur la vizaĝo de Tolstoj. Kaj en ĉi tiuj du okazoj li estas kun infanoj.

En angulo, granda statuo el griza ŝtono montras la famulon en lia kutima sinteno : Li staras, estas vestita per bluzo ĉirkaŭligita per ŝnura zono ; liaj manplatoj sin apogas kontraŭ la korpo kaj la dikfingroj rajdas sur la zono ; la brovoj elstaras kaj kaŝas tute la okulojn. Tiu viro aspektas kvazaŭ forto el la naturo ĵetita sur la teron por doni iun orientadon al la ordinaraj homoj...

Pendas ĉe la muroj portretoj, prezentantaj Tolstoj'on dum diversaj periodoj kaj scenoj de lia vivo. Pentraĵo montras lian bienon en Jasnaja Polanja.

En iu ĉambreto troviĝas diversaj specimenoj de lia postmorta masko. Vidante tiun ĉi objekton oni povas

supozi, ke la morto alportis pacon al la nobla, ĉiama spiritmalkvietulo : La trajtoj ne plu estas malglataj, hirtaj, sed dolĉigitaj, pacigitaj...

En montroŝrankoj troviĝas diversaj eldonoj de lia verkaro. Mi rimarkis unu libron en esp-o.

Oni finas la viziton en ĉambro, samforme, samaspekte aranĝita kiel tiu, kie mortis Tolstoj. Jen la lito, jen lia valizo ; lia peza mantelo pendas alkroĉita ĉe la muro. Eniras dolĉa lumo. Impresiga, sugesta estas la kadro. Oni kvazaŭ sentas, ke la animo de l'nobla mortinto enfiksiĝis en la ĉi-tieaj objektoj. Iu desegnis sur la muro la linion de la ombro, kiun faris la korpo kuŝanta en la lito.

Skribinte en la vizitlibro kelke da dankaj vortoj al la Soveta Registaro, kiu ebligis la starigon de tiu pia memorilejo, mi foriris kun emocio preskaŭ religia...

Tolstoj. Lenin. Du gvidantoj de la homaro. Kaj tiel malsimilaj ! Unu senĉese estis okupata pri la moralaj enmemaj problemoj ; la alia juĝas ĉion laŭ la marksisma vidpunkto, kiu instruas, ke la ekonomia medio kreas nian moralecon. La unua atentas ĉefe pri la individuo ; la dua pri la socio.

Kiu pravas ?

Skismanoj

Elirinte el la Tolstoja Muzeo, K-do Polakov kondukis min en la preĝejon "Jesuo Savanto". Ĝia tuta internaĵo estas el marmoro diverskolora. Alta kupolo, ekstere orumita, kovras ampleksan spacon, kie povas kolektiĝi miloj da personoj.

Okazis diservo. Mia gvidanto klarigis, ke tie la diservantaj pastroj estas skismanoj el la t.n., antaŭ nelonge fondita, "Viva Eklezio". Nune okazas en Moskvo konferenco de tiaj ekleziuloj, kiuj reprezentas proksimume la trionon de la tutruslanda Ekleziularo. Tiu sciigo vekis ĉe mi intereson kaj mi demandis K-don P. pri la kialoj de la skismo.

La reakciema pastraro kaŝe ĉiam kontraŭstaris la sovetan regadon. Okazis dekreto pri rekvizicio de ĉiuj nebezonataj por diservo objektoj, por ke ili estu vend-

ataj je profito de la malsatuloj.

La eklezia estro, patriarko Tiĥon, kontraŭstaris tiun dekreton kaj provis instigi ĝeneralan ribelon kontraŭ la Registaro. En kelkaj lokoj okazis imponaj demonstradoj de kreduloj, instigataj de la pastroj. La Tiĥonanoj eble estus sukcesintaj en sia entrepreno, se multaj pastroj ne estus malobeintaj la ordonojn de la patriarko. Tiuj pastroj subtenis la dekreton kaj helpis al la rekvizicio. Tiel skismo estiĝis. Kompreneble la Registaro ne malfavoris tiun movadon kaj Tiĥon estis devigata transdoni la estradon de la Eklezio al Supera Estraro, konsistanta el pastroj akceptantaj la sovetan reĝimon. La ĉefo de tiu estraro estis la episkopo Antonin. Granda nombro da reformemaj pastroj grupiĝis ĉirkaŭ Antonin, kaj tiel estas fondita la "Viva Eklezio". Tiuj "viveklezianoj" deklaris, ke ili intencas forigi el la Eklezio la reakciemajn elementojn kaj plie simpligi la diservojn, tiel farante ilin pli kompreneblaj (?!) al la malkleruloj.

Dum la en Moskvo okazinta konferenco ili faris la jenan deklaron :

"La malamikoj de l'laborist-vilaĝana registaro estas ankaŭ malamikoj de l'novigata Eklezio."Viva Eklezio" kontraŭstaras la kapitalismon kaj ekspluatadon de l' laboro"

"En sia agado "Viva Eklezio" sin apogas sur vilaĝanan pastraron, kiu estis ĉiam premegata de episkopoj, monakoj kaj vilaĝaj burĝoj."

"Fakto reala, nekontestebla kaj neŝanĝebla estas la disigo inter la Eklezio kaj la Ŝtato. Inter ili ekzistas neniu ponto. Ĉiu iras sian propran vojon."

Sed malgraŭ ŝajna unuanimeco la skismanoj ne interkonsentis pri ĉiuj demandoj. En la skisma "Viva Eklezio" naskiĝis dum la konferenco mem alia skismo. La episkopo Antonin iniciatis pli progreseman grupon, kiu titoliĝas "Eklezia Renesanco". Tiam la "Viva Eklezio" decidis la eksigon de Antonin.

Sed ŝajnas, ke tiu episkopo estas elturniĝema kaj maltimema viro. La anatemojn de la "Viva Eklezio" li rebatos per tiuj de la "Eklezia Renesanco". Kiu kredulo povas nun scii kie estas la vera Eklezio ?...

La religia potenco malnova ŝanceliĝas. Ĉu ĝi falos kiel falis la carismo ? La grandaj skuoj de la Revolucio ne ankoraŭ senmoviĝis. Falas kadukaĵoj. Nova mondo naskiĝas en ruboj kaj detruaĵoj. Kiel fartos la naskiĝinto ?

Atentu ! gigantaj vartistoj : Lenin, Trocki, k.a....

***

Ĉe Vegetaranoj

Unuhora veturado per vagonaro, poste duonhora piedirado tra kampoj kaj jen, K-doj Nekrasov, Demidjuk kaj mi alvenas ĉe la vilaĝo Tajninskoe apud Moskvo. Tie troviĝas vegetarana laborkolonio. Ĝi konsistas el 37 personoj, el kiuj 20 infanoj ambaŭseksaj. La kolonianoj okupas sin per diversaj laboroj, ĉefe per terkulturado. Tie estas presata "La Nova Epoko". La infanoj estas instruataj ĉe la kolonio.

Nin akceptis S-ano Szabuniewicz, animo de la kolonio kaj eldonanto de "Teristo". Altkreska, nudpieda, nudkapa, san- kaj energiaspekta estas nia gastiganto. Flue kaj bele li parolas en esperanto. Sed esp-istoj estas en la kolonio. Nia lingvo ne estas lernigata al la infanoj. Mirigite pro tio mi demandis amindan junulinon, la instruistinon, se mi ne eraras, kaj ŝi respondis : "Esp-o ne povas nun utili al ili ; tia instruado estus do sencela..."

Stranga vidpunkto ! Mi opinias male ke esp-o devas esti la bazo mem de vere humana, sennacieca edukado. Doni al infanoj ilon, ebligantan interkonatiĝon kun individuoj el la tutmondo ŝajnas al mi la gravaĵo en nia esp-a movado kaj nepra necesaĵo en vere humaneca instruado. Nur tiel oni povos sennaciigi la menson de la venontaj generacioj.

Kaj mi demandas min : Ĉu tiuj kolonianoj ne tro atentas pri la oportunaĵoj de la kolonio ? Ĉu ili ne emas malampleksigi sian mondkomprenon proporcie al la rondeto en kiu ili vivas ? Ĉu tiu pacaspekta oazo estas kvazaŭ nacieto fermata al eksteraj fluoj ? Mi tre deziras ekscii

pri tio.

Tiujn enmemajn demandojn mi ne komunikis al mia interparolantino. Mi silentis, aŭskultante ŝian muzikan voĉon. Estis belvetero. Forte ĝuante la pacigan kadron, la kvietigan atmosferon de tiu kampa loko, mi lasis min konduki al ia reva regiono. Kial diskuti ? Estas multe pli agrable revi...

Ŝajnas, ke la spirito de Tolstoj vivas en la kolonio. Volonte mi restadus ĉi tie. Sed ĉu la bildo, kiun image mi prezentas al mi respondas al la realeco ?

Mi demandis S-anon Szabuniewicz, ĉu li estas kontenta pri la funkciado de la kolonio.
- Ne tute, respondis li. Por ke ĉio bone prosperu estus necesa nur unu sola estro al kiu ĉiuj obeus. La ideala regado de la kolonio estus ia monarkio. Pro nia demokratia, liberecana mastrumado, okazas kelkfoje, ke rikoltado ekzemple malprosperas, tial ke, je la taŭga momento, ne konsentis ĉiuj kolonianoj partopreni urĝan laboron. Iuj, ne pro malbonintenco, sed verŝajne pro nekompreno, ne konscias pri urĝeco de iuj taskoj. Sed, aldonis S-ano S., ni tamen ĉiuj vivas pace kaj en sufiĉa bonstato - konsidere la nuntempon...

La eldonanto de "Teristo" estas entuziasma partiano de la socialista sistemo de Henry George. Ĉiuj socialistoj pli malpli scias, ke tiu sistemo forigas ĉian rajton je mastreco de l'tero. Kiel la akvo kaj la aero, la tero apartenu al ĉiuj. La amerikana socialisto konsentas nur pri rajto je transportebla proprajo kaj rezultajoj de l' laboro. Por reĝustigi ĉion en la socio sufiĉus anstataŭigi ĉiujn impostojn per rento, difinota laŭ la valoro de la okupata tero kaj pagota de la okupanto.

En okpaĝa broŝureto Szabuniewicz koncize klarigas sian komprenon pri la efektivigebleco de la doktrino de Henry George. Ĉio okazus pace, senperturbe kaj venos "la regno de Dio" sur la teron.

Mi ne longe cerbumis por kompreni la "terismon". Pro tio mi ne intencas kritike rilati al ĝi. Tamen ĉe mi tuj estiĝas jena penso : kie troviĝas la instigilo, kiu movos

la popolamasojn por apliki tiun sistemon ? Ĝi povas allogi nur religiemajn idealistojn, ne la tutan proletaron. En la Marksana doktrino oni trovas solidan bazon : la klasbatalon. Ĝi estas fakto, ne teorio. Sekve la taktiko konsistas simple en utiligado de tiu klasbatala fakto por igi la kapitalismon "akuŝi" socialismon.

Sed niaj pacemaj Tolstojanoj ne konsentas pri klasbatalo. Ili ne volas rezisti perforte la perforton.

En tiu mia konstato ili vidu nenian riproĉintencon. Mi ne dubas pri ilia sincereco - kaj sinceruloj ne meritas riproĉon. Tre atentemaj pri la morala vidpunkto ili, miaopinie, ne sufiĉe taksas la ekonomian faktoron. Sed, bedaŭrinde, estas vero, ke kompense la marksanoj malprave atentas ne sufiĉe pri la moralaj fortoj...

***

Ligna domo. Apuda teraseto kun tegmento kaj ĉirkaŭbarilo. Ombroriĉaj arboj. Sesope ni sidas ĉirkaŭ tablo provizumita per bongustaj vegetaĵnutraĵoj.

Miaj gastigantoj tre deziras ekscii pri miaj impresoj. Kvankam ili ne estas tre bonaj, ŝajnas, ke, laŭdire de miaj kunmanĝantoj, mi ne vidis la bildon sufiĉe nigra. Oni ne ŝatas la bolŝevikan reĝimon ĉi tie...

- Vi devus demandadi kamparanojn, proponis S-ano Szabuniewicz.
- Volonte.

Nu, manĝinte, ni vizitos iun "muĵikon", loĝantan proksime de ĉi tie.

Ĉe kamparanoj

Alvenante ĉe la kamparano ni renkontis lin en lia korto. S-ano S. klarigis, ke mi estas "Franco", alveninta Moskvon antaŭ du semajnoj kaj deziranta interparoli kun iu "muĵiko".

Tiu ĉi estas altkreska, fortika viro kun longa nigra barbo, longaj haroj kaj malgrandaj okuloj. Parolante li faras gestojn kaj en lia sendenta buŝo vidiĝas salivŝaŭmo. S. resume tradukas liajn dirojn. Unue la kamparano volas

scii, ĉu mi apartenas al iu politika partio. Aŭdinte, ke mi estas komunisto, li fariĝas sindetenema kaj tuj diras, ke ĉiuj partioj estas malbonaj. Nur afero estas necesa : labori. La partioj disigas la homojn.

Mi rimarkigis, ke ankaŭ la religioj disigas la homojn kaj okazigas iafoje furiozajn batalojn. Nu, tiaokaze la religio ankaŭ estas malbona, iom embarasigite respondis la kamparano...
- La Registaro forprenas ĉion, dum ni malsatas. Ĉiu devas labori kaj ĝui sian laborprodukton, li ripete akcentis.

Mi diris, ke tia estas ĝuste la devizo de l'komunismo. Li konsentis kun la devizo, sed aldonis, ke la komunistoj, kiujn li vidis, ne laboras, estas nur "sinjoretoj" bone vestitaj...

Ĉar mia interparolanto ne povis ne scii, ke ĉe la najbara kolonio oni eldonas gazeton kaj instruas infanojn, mi demandis ĉu li konsideras tion kiel laboron. Li konsentetis, sed, miaopinie, tute ne estis konvinkita pri tio. Kredeble estas ĉe nia "muĵiko" iom da suspekto pri tia laboro. Kvazaŭ rekantaĵe li ripetis :
- Ĉiu devas labori... Venu iu, kiu diros tion, kaj al kiu ĉiuj obeos.
- Venu iu Mesio, mi konklude respondis, konstatante ĉe tiu kamparano mesianisman menson...

***

Mi vizitis alian kamparanon, junan viron, kiu dum kelka tempo laboris en fabriko kaj revenis ĉe la kamparo pro manko de laboro. Lia domo el ligno, kiel ĉiuj ĉi-tieaj domoj, estas sufiĉe agrabla kaj pli loĝinda ol kelkaj kamparanaj domoj, kiujn mi vidis en Normandio kaj Bretonio. Sed oni rimarkigis al mi, ke ĉi tiu vilaĝo, proksima de Moskvo, tre malsimilas la aliajn, troviĝantajn malproksime de urboj. En tiuj vilaĝoj la "isbas" (dometaĉoj) estas malgrandaj kaj staras proksime unuj de aliaj. Kiam okazas incendio (proksimume ĉiudekjare), ĉiuj domoj en la vilaĝo forbrulas. Se kleruloj atentigas la kamparanojn pri la danĝero de tiu proksimeco, ĉi-lastaj respondas : "Mia patro konstruis tiel, nia prapatro ankaŭ konstruis tiel,

ni devas fari same." Kaj ili rekonstruas domojn ĉe la sama loko.

Demandite pri kio li plendas, la juna kamparano respondis, ke li deziras prunteprenі monon por aĉeti bovinon, kiel estis fareble sub la cara reĝimo ĉe kreditbankoj...

Mi plene konsciis, ke ĉiuj miaj demandoj neniel povos konigi al mi la veran situacion de la rusaj "muĵikoj". Estus necese vivi longatempe inter ili. Mi plue memoris, ke en Francio la kamparanoj kutimas ĉiam plendi interparolante kun urbanoj. En Rusio mi supozas, ke okazas same...

La hotelo "Lux"

Ĉi tie estas gastigataj oficistoj de Komintern kaj delegitoj. Iuj havas apartan ĉambron, aliuj loĝas kelkope en la sama. En mia ĉambro ni estas kvar personoj. Sed en realeco estas multe pli da loĝantoj. Tiu ĉambro estas vera cimejo. Estis al mi neeble dormi en la lito kaj pasigis la noktojn sur kanapo, kie estis malpli da sangavidaj bestetoj. Komforto mankas : nur unu lavmeblo, kompense estas telefonaparato. La hotela materialo estas ne bone zorgata. Ekzemple, la seruro de nia ĉambro tute fuŝfunkciis. Okazis, ke oni devis stari antaŭ la pordo tri-kvar minutojn, ĉiel provpenante ĝin malfermi per la ŝlosilo. La pordoj de la necesejoj estas difektitaj kaj ne povas esti fermataj. Rompitaj estas la levseĝoj. Ĉio estas malpura...

Ekzistas ĉi tie stranga kutimo : oni prefere laboras aŭ promenas nokte ; tage oni dormas. Miaj kunloĝantoj enlitiĝas ĉirkaŭ la dua postnoktmeze kaj ronkas ĝis la 10a matene. Ili legas aŭ skribas je la elektra lumo kaj dormas dum alloge ridetas la suno. Estas la Moskva kutimo !...

Ĉe la unua etaĝo troviĝas legejo, kie ĉiulingvaj gazetoj (komunistaj aŭ burĝaj) estas je la dispono de la gastoj. Tiu loko estis salono, kiu vidigas postsignojn de antaŭa brilego. Blankhara virino mastrumas la legejon kaj havas fieran sintenon de mondumulino. Tre interesus min koni ŝian historion. Mil supozojn mi faras. La Revo-

lucio faris tiom da ŝanĝoj !...

Ĉe la teretaĝo troviĝas restoracio. Ĝi estas malfermita de la 16a ĝis la 18a, kaj de la 21a ĝis la 23a. Oni alvenas, sidas ie ajn. El kajeretamanĝrajtigilo oni detranĉas folion, liveras ĝin al kelnero kiu poste alportas nutraĵojn. Ne estas menuo, ĉiu ricevas samspecan manĝaĵon. Nigra pano laŭvole prenebla kuŝas sur la tablo. Oni ankaŭ povas mendi laŭvole malfortan teon. Nek bongustaj, nek abundaj estas aliaj nutraĵoj. Ĉe la dua manĝo oni ricevas plian porcion por la morgaŭa matena manĝo, kiu okazas en la ĉambro. Por tiu manĝo, teo kaj sukero estas liverataj por dek kvin tagoj. Ĉio okazas kiel en kazerno. Malfacile mi povus alkutimiĝi al tia reĝimo. Ofte mi koleris pro tedaj klopodoj. Por ricevi la bezonan manĝrajtigilon plurfoje mi devis iri ĉe la kontoro* - kie cetere estis neeble min komprenigi. Dum kelkaj tagoj oni liveris al mi nur provizoran rajtigfolieton. Plurfoje venis K-do Nekrasov interprete klarigi mian specialan situacion. Pasis unu semajno antaŭ ol ĉio estu en ordo : Ĉu burokratio, neebla interkompreniĝo, indiferenteco de la oficistaro, "nitĉeveco" ?...

Fulmotondro ! ofte bolis mia sango...

Ĉe la restoracio min tre interesis observadi la gastojn: ĉiujn tipojn, ĉiujn kostumojn, ĉiujn lingvojn. Kelkfoje mi manĝis sidante apud la japana delegito, K-do Katajama. Mi tre deziris demandi lin pri la situacio en lia lando. Neeble. Interkomprenigilo mankis. Per gestoj mi rilatis al la kelneroj. Mi povas diri nur : "ĉaj" (teo) kaj ne riskus voki per la tiel ofte uzata vorto : "Tovariŝĉ" (Kamarado), kiu estas treege malfacile prononcebla per

---

* Eble interesos la legantojn ekscii kioma estis la gastoprezo : Mi pagis $3\frac{1}{2}$ milionojn potage. Malalta estis tiu prezo. Notinde estas, ke antaŭ la NEP ĉiuj ajn delegitoj estis senpage gastigataj. Nun la delegantaj organizaĵoj pagas mem por siaj delegitoj. Ĉar S.A.T. ne estas sufiĉe monhava, mi komprenebla pagis propramone.

buŝo kutimanta paroli france.

Preskaŭ ĉiuj fumas ĉi tie, kaj virinoj konkuras kun viroj. Kelkaj virinoj por montri kiom ili emancipiĝis, havas virseksan, senzorgan, sendecan teniĝon. Kaj tio estas simple groteska.

Jen antaŭ mi sidas junulino. Ŝi apogas la kubutojn sur la tablo. Ŝi maĉas pecon da nutraĵo kaj inter du maĉoj ekblovigas fumon el sia cigaredo ; poste metas ĝin sur la tablon, denove maĉas kaj ree ekfumigas sian cigaredon. Kaj tio daŭros ĝis la fino de l'manĝo. Neniu koketgesto vidiĝas ĉe tiu viriĝinta fraŭlino. Kiaj pensoj loĝas en tiu virina kapo ? kiaj sentoj en ŝia koro ? Eble tiun teniĝon instigas nur la deziro plaĉi per tia afekto, kiu vidigas, ke ŝi plene liberiĝis el la tiom riproĉitaj burĝaj antaŭjuĝoj.

Alpreninte la malvirtojn kaj la mankojn de viroj, iuj virinoj sendube opinias, ke ili liberiĝis. Kompatindulinoj !...

Ĉe alia tablo estas gejunuloj. En ilia sidmaniero estas malfacile distingi ilian sekson, ĉar la viroj havas longajn harojn kaj la virinoj mallongajn. La vestaranĝo estas preskaŭ sama. Kaj ĉiuj konkure fumadas.

Sed kelkloke estas pensemaj vizaĝoj ; brilas inteligentaj okuloj ; trairas, malatentante ĉion, decidemaj individuoj. Ili sendube portas gravajn respondecojn. Estas apostoloj de l'komunismo...

***

Iun tagon venis por min intervjui redaktoro de "Rosta" (Zentral Information) K-do Abraham Katz. Li parolas ruse, germane kaj hispane sed ne komprenas france. Tiakondiĉe intervjuo estis neebla. Per gestoj kaj kelke da internaciaj vortoj, mi komprenigis, ke ne malproksime loĝas esperantisto, K-do Nekrasov, kiu povos interpreti. Ni decidis ekiri al li. Survoje, post kelkminuta marŝado, ni bonŝance renkontis K-don Futerfas. Mi klarigis al li la okazaĵon, kaj triope ni revenis ĉe la hotelo. Futerfas majstre tradukis rusen ĉiujn demandojn kaj

respondojn.

La intervjuanto demandis pri mia misio en Rusio, pri miaj impresoj, pri S.A.T., pri la Frankfurta Kongreso, kies telegramo estis antaŭ nelonge ricevita ĉe Komintern.

Nia esp-a movado tre interesis K-don Katz. Aŭdante la fluan tradukadon de Futerfas, li ne povis dubi pri la facilparolebleco kaj belsoneco de nia lingvo. Sed eksciante, ke S.A.T. enhavas nur 2000 membrojn lia intereso malvarmiĝis. Ni penis klarigi, ke ĝis nun esp-o precipe disvastiĝis en religiemaj kaj pacifistaj rondoj, ke S.A.T. ekzistas nur de unu jaro. Malgraŭ tiaj klarigoj estis videble ĉe la mieno de la aŭskultanto, ke ili ne forigis la fakton, ke nia revoluçia esp-o-movado estas ankoraŭ malforta.

Pri tio la kamaradaro bonvolu pripensadi ; mi ne dubas, ke ili alvenos al tiu mia konkludo : La gvidantoj de la revoluciaj organizaĵoj atentos nian movadon, nur kiam ĝi estos... atentinda - pro sia bona organizo kaj multmembreco. Al tio ni celadu. Ni ne esperu pri iuj ajn decidoj de komisionoj pli malpli kompetentaj, aŭ rezultantaj el intrigado kaj hazardo.

***

Ĉar estis malagrable al mi kunloĝadi kvarope en ĉambro, kie ripozon kaj solecon ĝui mi ne povis, K-do Demidjuk proponis, ke mi venu en lian hejmon. Mi akceptis, kaj tie trovis plej afablan kaj bonkamaradecan gastigadon. Jam forpasis sep monatoj. Hodiaŭ estas agrable al mi denove danki al mia gastiginto kaj al lia edzino. Esp-o estas nedubeble forta ligilo kaj interamikiĝilo.

Se mi ne kunportis el Rusio kuraĝigajn impresojn pri la efektivigebleco de l'komunismo, kiel teorie oni ĝin prezentas al si, mi almenaŭ revenis pli konvinkita ol iam ajn pri la granda signifo de mondlingva movado. Por pripensema spirito ne povas esti ia dubo pri tio.

***

Ĉe kamarado "?"

Telefonsciigite pri mia vizito, K-do "?", je la difinita horo, akceptis min en sia loĝejo. Interpretiston ni ne bezonis : mia gastiginto parolas france, germane, angle, svede, arabe, kaj mi ne scias kiom da aliaj lingvoj. Kun perfekta akcento li parolas la francan lingvon ; malofte mi rimarkis ian fremdecon en lia franclingva parolmaniero. Mi eĉ demandis min, ĉu mi rimarkus tiun fremdecon, se mi ne scius, ke mia interparolanto estas Ruso, ne Franco ? La Slavoj ja havas specialan kapablon por lerni lingvojn. Mi do gratulis K-don "?" pri lia perfekta scipoveco de l'franca lingvo :
- Nu, respondis li, tio klarigas al vi, kiel "bolŝevikoj" povas restadi en Francio, malgraŭ la severaj ordonoj de Poincaré, neniel altirante atenton pro la fremdeco de sia parolmaniero.

Cetere, estas fakto, ke malgraŭ ĉiaj baroj kaj malfacilaĵoj ni povas iri kaj restadi en ĉiuj landoj. Jam sur la ŝipo vi eksciis, ke mi revenas el Hindio. Tie, kompreneble, mi ne estis kiel Ruso, sed kiel "honesta" franca burĝo...

Ni ridis, - kaj la edzino ekpreparis samovaron.

- Kiajn impresojn vi ricevis dum via restado en Moskvo, kun demandema rideto demandis min la ruza trompisto de l' burĝaj policoj ? Mi supozas, ke vi malfacile klarigas al vi la ĉi-tiean situacion, ĉu ne vere ?

Senhezite kaj malkaŝe mi konfesis, ke mia senreviĝo estas granda, konstatante, ke lando estrata de komunistoj vidigas, je plej alta grado, ĉiujn karakterojn de l'kapitalista regado. Kial surstrate estas tiom da almozpetantoj - dum en la butikmontrejoj logas kukoj, fruktoj kaj ĉiuspecaj manĝaĵoj ? Kial do ĉiupaŝe oni renkontas podetalajn vendistojn kaj kolportistojn ? En butiko mi eĉ vidis luksajn ĉerkojn, kio montras, ke ĉe morto ankaŭ ne regas egaleco. Mi rimarkis vetkurĵurnalojn. Virinoj sin prostituas... Rusio ja travivis teruraĵojn kaj estis alkondukita al ega ruiniĝo. Sed kial do kontrastas la vido de bonstataj personoj kun korŝiraj mizeroj ?...

- Mi komprenas vian miron kaj disreviĝon, respondis K-do

"?". Sed ne forgesu, ke nun regas la N.E.P., t.e. restariĝo de l'kapitalisma sistemo. Ĉiuj de vi faritaj konstatoj estas ties konsekvenco. Ni, komunistoj, kun ega malĝojo kaj kolerego konstatas la efikojn de tiu renaskiĝanta kapitalismo. Sed la neceseco trudis ĝin al ni.

Antaŭ la N.E.P. ne estis videblaj tiuj karakterizaĵoj de l'kapitalisma reĝimo. Ĉiuj butikoj estis fermitaj, ĉiuj surstrataj bazaroj malpermesitaj. Ni provis severan aplikadon de l'socialisma sistemo. Principe ĉiuj civitanoj devis labori por la Ŝtato, kaj ricevi de ĝi la vivnecesaĵojn. La kamparanoj devis liveri senpage la nutroproduktaĵojn, kiujn la Provizum-komisarejo devis distribui senpage al ĉiuj laborantoj, je simpla prezento de ilia laboratestilo.

Bedaŭrinde la distribuorganoj ne bone funkciis ; en kelkaj lokoj ili eĉ tute mankis. Kaj kie tiuj organoj ekzistis, okazis ofte, ke ili ne havis ion distribuendan. En fabrikoj laboristoj ne ricevis vivrimedojn. Tiam ili nature celis nur prilabori ion ajn por ĝin vendi kaŝe. Malgraŭ plej severaj ordonoj, malgraŭ ke la "Ĉeka" ofte mortpafis "spekulantojn", fakte ĉiam okazis kaŝa negocado. Oni fine eĉ devis toleri publikan bazaron ĉe la Suhârevska. La Polico "fermis la okulojn". Ĉiu pli malpli estis devigata kaŝe komercadi por konservi la vivon. Eĉ "Ĉekanoj" faris same. Alvenis momento, kiam la klarvidantoj el la komunistaro konvinkiĝis, ke la provo pri starigo de socialisma mastrumado fiaskis. Oni ne povas socialigi senhavecon. Socialisma stato postulas abundecon. Nur blindaj, fanatikaj komunistoj volis daŭrigi la provon. Lenin, la unua, komprenis la nepran necesecon malantaŭeniri sur la ekonomia fronto. Pro lia granda spirita kaj morala aŭtoritato fine preskaŭ ĉiuj komunistoj konsentis kun li, kaj la starigo de la N.E.P. okazis marton 1921.

Supraĵe rigardante oni efektive ĉe ni vidas ĉiujn karakterizaĵojn de kapitalisma mastrumregado. Tamen, fakte nia ekonomio ege diferencas je tiu de la aliaj landoj. Vi ja scias, ke la Ŝtato posedas la ĉefajn industriojn kaj pro tio povas ĉiam trudi sian influon, - dum en landoj regataj de kapitalanoj la potenco, kvankam principe en la manoj de la registaro, fakte estas en tiuj de financistoj, kiuj

trudas sian volon profite al siaj apartaj interesoj. Ĉi tie la Ŝtato, estante la ĉefa kapitalposedanto, povas trudi sian influon anstataŭ ricevi ĝin de financistoj. En tiu fakto kuŝas la gravaĵo, kiu esperigas nin pri estonteco.

Kiam ni konstatis nian senpovecon funkciigi socialisman mastrumadon, la problemo staris jene antaŭ la Komunista Partio : ĉu la proletoj, kiuj firme tenas en manoj la politikan potencon devas ĝin forlasi al kapitalanoj aŭ konservi ĝin kaj meti je la servo de la ekspluatata klaso ?

Ni decidis alpreni la lastan solvon.

Plorinda estas la jena konstato : neniu eŭropa lando entenas pli malbonajn kondiĉojn por la starigo de socialismo ol Rusio, kaj nenie ekzistas pli forta kaj sincera deziro starigi ĝin. Karl Marks ja diris, ke socialismo povas naskiĝi nur el kapitalisma sistemo elkreskinta ĝis plena matureco. Ne tia estas la ekonomia stato ĉi tie, kie apenaŭ malvolviĝas la industrio. Prikonsideru, ke nur 6% el la tuta rusa popolo konsistigas la proletaron.

Se ne estus historia fakto, ke neniam kaj nenie la kamparano sukcesis altrudi sian regadon, la tuta potenco en Rusio devus esti en la manoj de la terlaboristoj. Sed la ekonomiaj kondiĉoj malhelpas, ke ili unuiĝu kaj grupiĝu. Estas fatalaĵo : povas ekzisti nur aŭ kapitalistara regado aŭ proletara. La revolucio, okazigita de la proleta klaso tamen liberigis la kamparanojn el subpremo de la grandbienuloj. Okazis rangegaliĝo. Malgrandiĝis la proporcio inter bienposedantoj kaj senterhavuloj, pligrandiĝis tiu de la mezbienuloj. Nia kamparanaro fariĝi burĝeta. Ĝi fariĝis sendependa klaso, kiu post eksterm de la grandbienuloj kaj kapitalistoj restas la sola k kapabla kontraŭstari la proletaron. Sed tamen ĝi neni povos akiri la politikan potencon pro la specialaj k ĉoj, pri kiuj mi ĵus parolis...

K-do "?" parolis longe pri tiu temo ; li kvazaŭ antaŭ mi lecionon pri marksismo, kaj estis konsta ke li posedas fundan konon de la verko de Karl Ma

- Mi ja komprenas viajn klarigojn, diris mi, sed ili estigas ĉe mia spirito jenajn demandojn :

1)Kial do la Komunista Partio provis starigi socialisman mastrumadon en kondiĉoj konfesataj de la marksisma doktrino mem, kiel tute malfavoraj ?

2)Mi aŭdis, ke la privataj entreprenoj pli bone prosperas ol la ŝtataj. Ĉu en tiu fakto, se ĝi estas vera, ne kuŝas granda danĝero por la ŝtata potenco ?

3)Ĉu l'aplikado de l'politika potenco ne riskas enkonduki korupton en la Komunistan Partion, aŭ almenaŭ moligi la klaskonscion de ĝiaj membroj ?

K-do "?" enpensiĝis, ekbruligis cigaredon, dum la edzino prezentis la ĵus preparitan teon. Dum ni kirlis per kulereto la teon por kunmiksi lakton kaj sukeron, regis inter ni silento. Post momento, englutinte iom da teo, mia gastiganto ekparolis :

- Per viaj demandoj vi tuŝas gravajn taktik-, moral- kaj psikologiproblemojn. Por respondi ilin, kiel taŭgus, longa kaj metoda studado estus necesa. Cetere, se vi legas atente la komunistajn verkojn, vi certe jam rimarkis, ke tiuj demandoj estas amplekse pritraktataj.

Ĉu jam ni trovis la ĝustan solvon de ĉiuj problemoj, kiuj stariĝas antaŭ la komunista regado ? Mi ne scias. Plurfoje Lenin mem konfesis, ke ni faris multe da eraroj kaj maltrafoj. La pli grava estas, ke ni kalkulis je proksime okazonta revolucio tutmonda. Ni eraris pri la dato. Revolucio fiaskis en Hungario, Germanio kaj Italio. Sed, ĉar la rusa proletaro jam estis konkerinta la politikan potencon, pro taktika motivo estis necese dekreti kaj provi la starigon de ekonomia mastrumado socialisma.

Ni volis, ke oni ne povu riproĉi al komunistoj, ke ilia regado similas tiun de la social-demokratoj. En la tempo kiam ni espere antaŭvidis tuteŭropan revolucion, nia provo pri starigo de pure socialisma sociaranĝo havis ĉefe propagandan valoron kaj celon, rilate al la aliaj landoj.

Ni ĉiam opiniis, ke la socialismo povas ekzisti nur laŭ internacia skalo. De tiu vidpunkto devas ĉiam esti rigardataj niaj agoj kaj klopodoj, se oni volas objektive prijuĝi ilin.

En 1920 Lenin diris : "Se oni ne starigas en Rusio pli perfektigitan teknikon ol antaŭe, ne povas temi pri restarigo de la ekonomia vivo, nek pri komunismo. La komunismo, ĝi estas la soveta regado plus la elektrifikado* de la tuta lando, ĉar sen elektrifikado estas neebla la perfektigado de l'industrio. Tio estas longdaŭra tasko, kiu postulas almenaŭ 10 jarojn, kaj kondiĉe, ke oni igu aron da teknikistoj partopreni en ĝi. Estas klare, ke sen l'altiĝo de nia industrio ĝis la nuntempa granda mekanika produktado, la socialisma reĝimo restos nur aro da dekretoj, ligo de l'laboristaro kun la kamparanaro por la batalo kontraŭ Kolĉak kaj Denikin, ekzemplo por ĉiuj nacioj de l'mondo, sed ne havos solidan bazon."

Kiel vi vidas, neniam ni havis la kredon, ke en la nunaj kondiĉoj pure socialisma reĝimo povas funkcii en Rusio.

Sed la historio ankaŭ instruas, ke ju pli malproksimen de sia deira punkto iras iu revolucia ondo, des malpli granda estas ĝia malantaŭeniro, kiam refluo okazos. Por detrui ĝisradike la feŭdan reĝimon, kiu ekzistis ankoraŭ en Rusio, kaj ŝanceli la kapitalistan sistemon ; por forneniigi la hontaĵon, la barbarecon, la malhelpon al ĉia kulturo kaj progreso, la bolŝevika revolucio estis nepra necesaĵo. En Rusio, la proletara revolucio daŭrigis la burĝe demokratian revolucion, jam antaŭlonge okazintan en la aliaj okcidentaj landoj, kaj akcesore solvis ties problemojn. Nur la lukto decidos ĝiskiagrade la proletara revolucio sukcesos preteriri la burĝan.

La N.E.P. markas punkton en la refluo de l'revolucia ondo. Ĉu ĝi devas reflui pluen ? Mi ne scias. Tio dependas grandparte de la sintenado de l'alilandaj proletaroj. Pro taktika motivo ni okupis pozicion neelteneblan ; pro la sama motivo ni malantaŭeniris ĝis la ŝtata kapitalismo.

Ĉu en Germanio, Francio kaj Anglio la kapitalistaro sukcesos redoni firman ekvilibron al sia potenco ? La estonteco respondos al tiu demando. Almenaŭ tiu ekvilibro

---

*Elektrifikado = anstataŭo de l'vaporforto per elektroforto.

povos esti nur provizora : Ĝi daŭros ĝis venonta, neevitebla mondmilito, kiun okazigos, kiel kutime, la diversaj ekonomiaj imperialismoj. Koncerne nin, la problemo nune konsistas en konservado de l'politika potenco por ĝin meti je la servo de l'mondrevolucio. Por konservi tiun potencon ni estis devigataj retiriĝi sur la ekonomia fronto, sed tiu retiriĝo estas nur taktika necesaĵo tempa. La celo nia restas la starigo de l'komunismo kaj forigo de la sociaj klasoj. Ĉar ni konsideras, kiel Karl Marks, ke estas la historia misio de l'proletaro forigi la klasojn, ĉiuj niaj penadoj celas la profiton de l' proletaro tutmonda. Ni esperas, ke, pli malpli frue, en ĉiuj landoj la laboristoj komprenos tion. Ni restos en atenda situacio ĝis la proletara revolucio venkos en la landoj, kie la industrio grandamplekse jam malvolviĝis.

Kompreneble, se tiu venko malfruiĝas tro longatempe, oni pravas timi, ke la NEP-reĝimo infektos la organaron de l'proletara diktatoreco. Nun la danĝero ne estas granda. Mi eĉ opinias, ke tiel longe ĝis la malnovaj komunistoj havos en manoj la direktilaron, la kapitalisma veneno ne grave endanĝerigos la vivon de nia regado. Sed ja, ni konscias pri la danĝero. Ni venkis la eksteran malamikaron. Nun la batalo okazas inter la Ŝtato kaj la interna malamikaro : la naskiĝanta burĝaro. Tia batalo estas plena je embuskoj. Ni devas esti tre atentemaj por malhelpi la kaŝan, subfosan rodadon kontraŭ nia politika potenco.

Estas ja vere, ke fuŝfunkcias iuj ŝtataj entreprenoj, dum pli bone funkcias la privataj. Okazas malzorgaĵoj kaj ŝteltrompaĵoj ĉiuspecaj. Jen la bedaŭrindaĵo : la plimulto el la komunistoj estas honestaj kaj sindonaj, sed mankas al ili teknika kompetenteco. Ili devas iom post iom akiri kapablecon kaj spertecon en ĉiuj fakoj de la ŝtata mastrumado, dum la kontraŭuloj posedas tiujn ecojn jam de longe. Estas ankoraŭ vere, ke komunistoj, ĉefe la nove varbitaj, celas iafoje nur profite adaptiĝi al la nuna situacio.

Kion fari ? Mi ripetas, la klarvidantoj konscias pri la danĝero, pri la grandega tasko plenumenda. Sed, ĉar

la alilandaj laboristoj ankoraŭ ne konkeris la potencon, ni do estas devigataj kontrakti kun la burĝaj registaroj por krei en Rusio la ekonomian kondiĉaron, kiu ebligos, en pli malpli proksima tempo, la malstarigon de la N.E.P. Sed estas neforgesende, ke tia plano povos fine efektiviĝi nur per la helpo de la tutmonda laboristaro kaj ĝia venko kontraŭ sia propra burĝaro. Se tiu venko ne okazos sufiĉe frue ni ne povos elteni la pozicion : la kapitalistaro tiam venkos ĉe ni kaj nia Revolucio restos en la Historio kiel la unua sensukcesa provo pri starigo de socialisma reĝimo.

La bolŝevika revolucio almenaŭ montris kiamaniere la proletara klaso povas konkeri kaj konservi la politikan potencon. Sur tiu kampo nia venko estas nekontestebla. La Pariza Komunumo fiaskis en tiu provo. Sed ni profitege lernis el tiu fiasko. La proletaro de la aliaj landoj ankaŭ profitos je nia sperto.

Hodiaŭ, kiel antaŭ kelkaj jaroj, ni ne dubas pri la neevitebleco de venonta tutmonda Revolucio. Temas nur pri kiamo. La marksismo, kiel klarigo de la historiaj faktoj, estas vera ĝeneraltrajte. En tiu doktrino ni ĉerpas la plej certan direktivon...

K-do "?" parolis kun forta konvinko, kiel homo cerbuminta la demandon, kiun li pritraktas. Kun streĉita atento mi aŭskultis. En la buŝo de mia interparolanto mi retrovis kion jam kelkfoje mi legis en komunistaj revuoj. Dialektike tiaj klarigoj ja estas akceptindaj. Tion mi konfesis kaj aldonis : Estante mem komunisto, mi nature akceptas la marksanan teorion. Tamen mi sincere konfesu, ke iafoje duboj eniras mian cerbon. La klarigo de la historiaj faktoj per la marksismo igas min memori pri la "Diskurso pri la Universala Historio" de l'fama franca episkopo Bossuet. Li majstre klarigis ĉion per la Evangelio : li per trafaj argumentoj pruvis, ke eĉ la malamikoj de l'Katolikismo laboras por la triumfo de l'Sankta Eklezio. Tamen tiuj argumentoj, kiuj tiutempe ŝajnis valoraj, vekas rideton eĉ ĉe la nuntempaj apologiistoj.

- Kompreneble, oni ne devas konsideri la verkon de Marks kiel biblion, intermetis K-do "?".
- Nu, permesu, ke mi ankoraŭ starigu antaŭ vin unu demandon. Ni interkonsentis, ke abundeca stato estas necesa por la funkciado de socialisma reĝimo. Sed por krei tiun abundecon, intensa produktado estas necesa. Ĉu oni povas atingi tiun intensecon, kiam ne plu ekzistas la salajr-instigilo ĉe laboristoj kaj la persona gajnemo ĉe direktantoj ? Rilate tiun punkton la eksperimento de via Revolucio povus esti, se ne absolute decidiga, almenaŭ tre instrua. Kion oni jam spertis pri tio ?

K-do "?" direktis al mi esploreman rigardon, ekbruligis alian cigaredon, enpensiĝis momenton kaj ekparolis :
- Nu, vi ja scias, ke mi restis for de Rusio dum sufiĉe longa tempo. Nun apenaŭ de tri semajnoj mi revenis ĉi tien ; sekve mi devas konfesi, ke via demando trovas min iom nepreparita, por ĝin respondi kiel decus. Cetere mi opinias, ke la ĝisnuna sperto farita tute ne sufiĉas por akiri certecon pri la plej trafaj rimedoj uzendaj por veki kaj instigi laboremon. Estas ja certe, ke ni devis starigi en fabrikoj monpremiojn por diligenteco kaj konstanteco, ankaŭ laŭtaskan laborpagon, tajlorsistemon kaj aliajn rimedojn, uzatajn en kapitalistaj entreprenoj.

La popolamaso en sia granda plejmulto bedaŭrinde havas nenian komprenon pri funkciado de komunisma mastrumado. Ĝia spiritstato estas tute formita de kapitalanaj influoj. Longdaŭra edukado estos necesa por aliigi tiun spiritstaton. Eble kelke da generacioj pasos antaŭ ol oni ne plu bezonos salajran instigilon por igi la laborantojn produkti samintense kiel sub la skurĝo de l'kapitalismo. La laboro devos esti glorata, kvazaŭ sanktigata kaj la nenionfaruloj konsiderataj kiel plej egaj krimuloj...

Interŝanĝinte kun K-do "?" plej diversajn konsiderojn pri tiu morala flanko de la Revolucio, ni revenis al pli praktikaj demandoj. Adiaŭonte mian gastiganton mi konklude demandis lin : Nu, post du tagoj mi forveturos. Estas antaŭvideble, ke mi estos superŝutata per demandoj kiam mi renkontos k-dojn. Kion mi respondu ? Sincere dirite mi preskaŭ nenion komprenas pri la ĉi-tiea situacio. Mi

observas, petas klarigojn kaj ĉiam trafas nur dubeŝancajn respondojn. Mi ne komprenas... Verŝajne mi estas pli malinteligenta ol iuj vizitintoj de Rusio, kiuj jam raportis firmtone, ĉu laŭdante kun entuziasmo, ĉu akre kritikante?...

- Se vi volas juĝi ĉion per via propra saĝo, respondis K-do "?", vi ja certe ne povas akiri firman konvinkon dum trisemajna restado ĉi tie. Kion mi diras !... Estas eĉ multaj Rusoj, kiuj komprenas nenion pri la okazintaĵoj de ili travivitaj. Pripensadu, observadu, kaj neniam forgesu, ke la vivo ne adaptiĝas al la teorio, sed ke la teorio devas adaptiĝi al la vivo. La praktiko montras tion, kio estas vera en la teorio. Kunportu nepre la firman konvinkon, ke la komunistaj gvidantoj celas nur la verajn interesojn de l'tutmonda proletaro. Kiam la alilandaj proletoj estos ankaŭ prenintaj en siajn manojn la regadon de l' socio, tiam eble, sed nur tiam, ni povos kun sukceso starigi komunismon...

Adiaŭinte K-don "?", mi revenis laŭlonge de la rivero Moskova, kies akvaro malrapide fluas. La Kremlo radiis per ĉiuj oraĵoj de siaj kupoloj. Estis varme, kvijete. Moskvo, la Meko de l' Mondrevolucio, aspektis tre paceme. Nur la ruĝa standardo, flirtanta super iu turo de l'Kremlo, simbole rememorigis pri la okazintaĵoj...

***

Foriro

Ĵaŭde, 31an de aŭgusto. (El mia notlibro).
Klopodoj pri forveturo. Mi pagis por la bileto kaj pasportvizoj (Letonia kaj Latvia) 81 600 000 rublojn. La oficistoj de Komintern zorgis pri tiuj aferoj. Je la 17a horo venos K-do kun la necesaj legitimaĵoj. Mi atendas. K-doj Polakov, Futerfas kaj Demidjuk ĉeestas en la hotelo "Lux". Ili afable akompanos min al la stacio. Estas jam la 17a kaj duono. Neniu venas. Mi malpaciencîĝas...

- Nu, ĉu vere vi opinias foriri hodiaŭ, alparolas min franca K-do, kiu oficas ĉe Komintern ?

- Certe!... Ĉi-matene mem oni sciigis min, ke ĉio estas preta por mia foriro. Jen, vidu, mia dorsosako estas jam

bukfermita... La K-do mokeme ridetis kaj aldonis :
- Estu pacienca... Mi tre dubas ĉu vi foriros hodiaŭ. Mi ofte vidis ĉi tie personojn pli gravajn ol vi, kiuj atendis tutan semajnon antaŭ ol ili povis efektive forveturi...

Jam estas la 18a horo. Ni atendas...
- Allo!... Ĉu estas K-do Lanty ?
- Jes...
- Nu, vi ne povos forveturi hodiaŭ...
- Kial do ?...
- Vi ne povos... Morgaŭ...

. . . . . .

Vendrede, 1an de septembro. - Ĉu mi foriros ? Jam denove mi bukis la sakon kaj atendas. Estas la 17a horo. La K-doj de "La Nova Epoko" ankoraŭ ĉeestas ; ili nepre volas adiaŭi min ĉe la stacidomo. Ĉu do tutan semajnon ili devos veni al mi ĉiutage por ekscii ĉu mi foriros aŭ ne ?...

Jen haltas aŭtomobilo antaŭ la pordo de la hotelo. Oficisto el Komintern elsaltas sur la trotuaron, venas al mi kaj sciigas, ke tuj li kondukos min aŭtomobile al la stacidomo. Mi ekĝojas, ĉar tre malatendema mi estas kaj doloras min ĉia prokrasto. Oni eble volas, ke mi kunportu je la lasta horo bonan impreson el Moskvo. Mi estas do veturigata kvazaŭ eminenta gasto. Ĉio estas bone prizorgata kaj unu horon antaŭ la ekiro de l'vagonaro mi jam ĉeestas en la stacidomo. Tie mi ekscias, ke mi veturos en unuaklasa vagono. Nu, bone, estis necese, ke mi venu Rusion por vojaĝi tiel komforte. Mi do profitu la okazon kaj ne faru malicajn rimarkojn...

Post kelka atendado, mia akompananto konatigas min al iu el la vagonaro, donas al mi ĉiujn necesajn legitimaĵojn kaj foriras...

K-doj Demidjuk, Futerfas kaj Polakov ne povis kiel mi uzi aŭtomobilon. Ili veturis per tramo kaj duonhoron poste alvenis ĉe la stacidomo, kie ili adiaŭis min plej ĝentile kaj bonkamarade...

Je la 19½ horo ekmoviĝas la vagonaro. En la kupeo

estas kun mi du personoj, viro kaj virino. Ili parolas ruse. Mi aŭdas nur sonojn, kies signifon mi ne komprenas. Pri tio mi ĝojas. Tiel, sola mi restas kun miaj pensoj. Enpensiĝinte mi rigardas tra la fenestron - kaj ne vidas kion mi rigardas, kio estas okulvidebla. Mi vidas kion mi ne rigardas : Ekaperas antaŭ min, kvazaŭ kinematografe, bildoj, kiujn jam plurfoje mi interesege rigardadis en Moskvo. Prezentiĝas obsede la ĉifonvestitaj almozpetantoj, kolportistoj, la ruinaĵoj, la oraĵoj de l'preĝejoj, la mirinda Kremlo, la ruĝa placo,t.n..ne ĉar tie okazis revoluciaj scenoj, sed tial ke en la pasinta tempo ĝi estis la ekzekutejo. Sur tiu fama placo staras la plej strangega konstruaĵo, kiun iam mi vidis : la preĝejo "Sankta Bazilo". Neforgesebla bildo, montranta plej mirigan arkitekturstilon. Dekdu malsamaj turoj kun kupoloj diversformaj, diverskoloraj. Mi memoras pri Ivan la Terura, kiu en la dekkvara jarcento konstruigis tiun preĝejon ; pri la malfeliĉa sorto de l'arkitekto, kiu, laŭordone de la imperiestro, estis senkapigata post la finkonstruo de la preĝejo ; pri la legendo kiu diras, ke la tirano ordonis tiun senkapigon, tial ke la arkitekto, demandite ĉu li povus konstrui duan similan preĝejon, respondis jese. Ivan la Terura tiom fieris pri tiu konstruaĵo, ke li volis forigi ĉian eblecon pri konstruo de alia simila.

Ankaŭ ekaperas densa popolamaso, kiu sur la rondaj promenejoj, noktomeze, promenas kaj aspektas sufiĉe bonstate, kontente, memfide. Mi memoras pri aŭditaj paroloj, pri la tono per kiu ili estis eldirataj, pri sinteno de personoj, pri io sentebla, neklarigebla. Granda konfuzo regas en miaj pensoj. Kun bedaŭro mi konstatas, ke mi kunportas nur bildojn, nur impresojn, sed nenian firman definitivan juĝon pri la Rusia situacio.

Rapidas la vagonaro. Adiaŭ Moskvo !...

* * *

Riga

Dimanĉe, 3an de sept. - Glate, senmalhelpe iris la vojaĝo. Mi alvenis ĉi tie je la 9a. Fiakristo kondukis min al esp-isto, kies adreson oni donis al mi en Moskvo : S-ano G. Lampert, juna studento, kiu plej afable sin metis je mia dispono por agrabligi mian restadon tie ĉi. Ekscinte ĉe la stacidomo, ke la vagonaro ĝis Berlin foriros nur je la 23a, S-ano Lampert proponis al mi veturi al Edinburg, kie ni pasigu la tagon ĉe la marbordo. Tiu banloko troviĝas je proskimume 20 km. de Riga, li diris. Kun plezuro mi konsentis iri tien kaj plej agrablan tempon mi pasigis kun mia akompananto. La unuan fojon li havis okazon uzi esp-on kun fremdulo. Tial kun kontento li povis sperti kiel bone oni interkompreniĝas. S-ano Lampert diris, ke nur de ses monatoj li lernis la lingvon. Estas notinde, ke li parolis flue kaj korekte.

Vespere ni revenis al Riga, kaj je la difinita horo mi ekveturis Germanion. Marde, 5an de sept. mi elvagoniĝis en Berlin. Mi finu ĉi tie la rakonton, ne ĉar mi diris, ĉion dirindan, sed tial ke malnoviĝis la okazintaĵoj kaj forpasis la intereso pri ili.

Postvojaĝaj pripensoj

Mia rakontado jam alvenigis al mi multe da leteroj. Pluraj varme laŭdas, kelkaj (nur tri) akre riproĉas. La riproĉintoj estas komunistoj, almenaŭ ili sin nomas tiaj, kiuj diras, ke mi raportis pri Rusio kvazaŭ farus kontraŭulo de l'komunismo.

Ĉu vere ? Fininte mian rakonton, mi rememorigu kion mi diris komence : "Ĉu mi estas tiel akrevida, tiel observpova, ke mi sukcesis vidi la ĝustan fizionomion de vastega mondparto, kie ĉio ankoraŭ bolas, kie ĉio estas kvazaŭ en eksperimenta retorto ? For de mi tia penso !...Mi promesas nur eldiri miajn impresojn, - kaj impresoj ne estas juĝoj."

Certe mi ne estas tiel memfida, ke mi povu havi definitivan juĝon pri la Rusa Revolucio. Mi avertis la legantojn, kaj promesis diri kion mi vidis, kion mi sentis. Nur sincereco gvidis mian skribilon. Kaj se mia parolo iafoje

kontraŭdiras iun kredon, des malpli bone ! Sed mi povas diri nur mian penson. Mi avertis, ke mi ne juĝas, sed nur raportas. Ĉu do komunisto devas fermi la okulojn, kiam li vidas ion malbonan, malbelan ? Ĉu komunismo estas nova religio, havanta dogmojn, kiujn neniu povas diskuti, neriskante esti konsiderata kiel herezulo ?

Mi havas alian komprenon pri komunismo. Mi eĉ opinias, ke ili ne estas sagacaj komunistoj, ti-kiuj rilatas al la marksa verkaro kiel kredulo al sankta Biblio.

Mi ja spertis kelkfoje, ke ekzistas en niaj rondoj tiaj kreduloj. Por ili la vivo devas adaptiĝi al la teorio ; dum mi konsideras la marksismon nur kiel esplormetodon, kiu faciligas komprenon pri la malsimplaj, interplektiĝantaj historiaj faktoj. Vera komunisto estas, laŭ mia kompreno, ti-kiu aplikas la metodon kaj ne religie kredas je la doktrino. La doktrino povas en kelkaj punktoj esti erara, tiam la esplormetodo mem ebligas reĝustigon.

Tiel ĉiam faris Lenin. Nuntempe oni parolas pri leninismo, kaj mi antaŭvidas, ke tiu nova ismo simple estas revizado de l'marksismo. Tiel iom post iom oni aliigas la kredon de la komunista amaso, kiu nekonsciante pri tio sekvas novan direktivon. Kaj aliel bedaŭrinde ne povas esti.

La unuan fojon en la historio, la proletara klaso de vastega mondparto batalakiris kaj konservis la regan potencon. Ĝi provis apliki novan socimastrumadon. Sed la sperto montris, ke en la nunaj kondiĉoj estas neeble funkciigi socialisman ekonomion. Lenin ekvidis la nepran necesecon malantaŭeniri. La N.E.P. okazis. Post tiu duonrestarigo de l'kapitala sistemo oni konstatas reviglîĝon de la tuta ekonomia vivo.

Kion tio signifas ? Kiu ne estas blindigita per teoria kredo, tiu devas, vole nevole, konfesi, ke la apliko de socialismaj principoj ne donas la rezultojn, kiujn ni antaŭvidis. Oni kompreneble povas longe diskutaĉi pri la kialoj de tiu fiasko, sed la faktoj parolas pli elokvente ol plej subtilaj rezonoj.

***

Longe cerbuminte tiujn problemojn, okazis kelkfoje, ke mi demandis min : "Ĉu ci estas ankoraŭ komunisto ?" Eble kelkiuj opinias, ke tia demando estas tre malinda. Des malpli bone ! Tamen, ili ne koleru antaŭtempe. Ili aŭskultu.

Mi ne estas el tiu kategorio de homoj, kiuj fidele kaj dumvive restas alligitaj al iu religio, partio aŭ sekto en kiu la hazardo aŭ iafoje la profitemo metis ilin. Senĉese mi penadas orienti min en la labirinto de la diversaj teorioj kaj doktrinoj.

Antaŭmilite, dum pli ol 10 jaroj, mi partoprenis en la anarkia movado. Min entuziasmigis la idealo predikita de homoj kiel Reclus, Kropotkin, Nieuwenhuis kaj aliaj. Sed, en 1914, konstatinte, ke multaj anarkistoj agas tute same kiel socialistoj kaj aliaj patriotoj, dubo eniris mian spiriton. Tiam mi komencis alispirite prijuĝi la homojn, la teorion, kaj observi per tute aliaj okuloj. Ŝajnis, ke kolorigitaj okulvitroj defalis. Mi ĉesis kredi, mi diras kredi, je la anarkismo. Faktoj de mi antaŭe observitaj, kaj kiujn mi konsideris negravaj, ŝajnis al mi tiam treege atentindaj : Mi alvenis al la konkludo, ke la bela anarkia idealo, kapabla esti direktivo bona por kelkaj superaj kaj noblaj spiritoj, kaŭzas treege detruajn efikojn ĉe individuoj, kiuj ŝirmas siajn malvirtojn per la mantelo de libereco kaj memregrajteco. Plie, analizante miajn ĉiutagajn agojn, mi demandis min, ĉu mi ĉiakaze plenumus mian devon, se iu socia forto ne ĝin trudus al mi. Kaj por esti sincera mi devis agnoski necesecon de reguloj, de disciplino, de submetiĝo de persona profitemo sub la ĝeneralan.

La anarkia teorio instruas, ke ĉio malbona en la mondo devenas de la Leĝo, de la regpovo, kiun individuoj aljuĝis al si, ĉu perforte, ĉu ruze, ĉu per iu ajn alia rimedo. Se tio estas vera, sufiĉus do forrenversi ĉiun ajn regpovon kaj starigi plenan liberecon por ke feliĉo kaj bonfarto regu en la socio.

Tio simple estas hipotezo, bezonanta eksperimenton por trafi ĉu pravigon ĉu malpravigon. Ĝis nun neniu tia grandskala eksperimento estis farita. Dialektikistoj povas

do, kun ŝajna logiko, subteni tiun hipotezon. Plie, la ĉiutagaj malbonoj, okazigataj de la regpovo, povas esti utiligataj kiel pravigaj argumentoj.

Sed oni ankaŭ povas kolekti multe da faktoj, kiuj montras, ke kie ne ekzistas leĝoj okazas ega malordo, rabado kaj malebleco pri ĉia ajn kulturo.

Mi tamen ne intencas hodiaŭ ataki la pozicion de miaj antaŭaj "samkredanoj". Mi ne povas riproĉi al ili pro "kredo", kiun mi havis dum pli ol dek jaroj. Tiam, sincera mi estis, kaj nun volas nur same sincere konfesi, ke foriĝis tiu antaŭa kredo mia.

Por klarigi al si la evoluon de la homaro oni povas nur starigi hipotezojn, kiuj estas pli malpli facile pravigeblaj. La hipotezo sur kiu kuŝas la anarkia teorio ŝajnas al mi erara, tial mi aliĝas al alia, pli akordiĝanta kun la faktoj.

Mi ne neas, ke la regpovo plenigis la tutan historion je krimoj kaj perfortoj. Mi ne dubas, ke estonte ankaŭ la regpovo krimos kaj perfortos. Sed la demando staras nun antaŭ mi jene : ĉu la homaro estus atinginta ian gradon de kulturo, se regemuloj ne estus trudintaj sian volon al la senvola amaso ? Ne, kordolore mi devas respondi, se mi parolas sincere. Tial hodiaŭ mi hipotezas, ke, en la pratempo, ti-kiu trudis sian regadon, ĉu perforte, ĉu alirimede, al siaj kunuloj <u>ebligis</u> tiel ian progreson, ian gradon de kulturo. Oni rimarku, ke mi ne diras, ke la regado kreas kulturon, sed "ebligas". Estas necese substreki tiun vorton. Kompreneble estus pli bone se ĉiuj interkonsente direktus siajn fortojn al iu difinita celo ; sed estas konstatebla fakto, ke ne povas okazi ĉies interkonsento, almenaŭ pri la rimedoj uzendaj por atingi la celon. Sekve, anstataŭ opinii, laŭ la anarkia hipotezo, ke ĉio malbona en la homaj socioj devenas de perforto, leĝo aŭ regpovo, mi alvenis al tiu alia opinio, nome, ke perforto, eĉ tiraneco utilis en la pasinta tempo por progresigi la homaron. Se neniam estus ekzistinta en la senforma, senkaraktera homamaso iu perforto inteligenta neniu progreso estus okazinta.

Senleĝa socio estas ja alcelinda. - Povas esti, ke post jarcentoj ĝi estos ebla. Sed estas necese por tio, ke la homoj, ĉiuj homoj, estu atingintaj altan gradon de moraleco kaj perfekteco, kiu tute mankas al ni nuntempe.

Kompreneble oni povas rebati, ke la kulturo jam atingita de kelkaj civilizacioj ne valoras ; ke pli enviinda, pli vivinda estus la situacio de afrikanoj, kiuj konas nek leĝojn, nek ĝendarmojn. Tio estas dialektike pravigebla. Sed estas tamen notinde, ke neniu el ti-kiuj tiele argumentas, iras vivi ĉe la afrikanaj senleĝuloj...

***

Samkiel antaŭ 6-7 jaroj mi ekdubis pri efektivigebleco de la bela idealo predikita de preskaŭ sanktuloj kiel Reclus aŭ Kropotkin, same nun mi ekdubas ĉu socio povas funkcii, kiam forestas kapitalo, kiam ĉiu gajnemo kaj ŝparemo estas malebligata. Nur eta malplimulto da idealistoj povas labori, instigate de idealaj motivoj. En Rusio, ekzemple, la "komunistaj sabatoj" apenaŭ influis sur la amason. La ekzemplo de Trocki, portanta ferajn trabojn, lasis indiferenta la grandan plimulton.

Ĉu neniam socio ignoranta kapitalon povos funkcii ? Tion mi ne scias. La estonto nur povas respondi tian demandon. Sed la sperto akirita dum la rusa Revolucio montras, ke nuntempe nur sociaranĝo bazita sur kapitala ekonomio povas vigligi la industrion kaj forigi malsaton. Tio estas ja bedaŭrinda konstato ; sed utilas neniel fermi la okulojn, kiam oni sincere serĉas solvon de problemo.

***

Falinte de la alta idealeca turo, kie mi kutimis karesi kaj luli mian revon, mi sentas min hodiaŭ treege kontuzita. Dolora estas mia spiritstato.

Tamen sur la ruinaĵo de miaj kredoj staras sendifekta iu ideo : la <u>internaciismo</u>. La ĉiutaga vivo montras la pravecon de tiu ideo. Estas okulfrape, ke malgraŭ ĉiuj baroj la homaro iras, en sango kaj perforto, al pli kaj pli intima unueco. Ĉiuj problemoj solvendaj, ĉu politikaj,

ĉu ekonomiaj, stariĝas sur internacia skalo kaj trafas ĝustan solvon proporcie al ĝia internacieco. Ju pli da internaciemo regas en la mondo, des pli bonfartas la homaro ; ju pli da naciemo, des pli da malamo, da malbono.

Neniam mi dubis pri tiu fakto. Tial hodiaŭ, kiam mi konsideras la diversajn, inter si batalantajn sociajn fortojn mi ne ŝanceliĝas por decidi al kiu mi devas aliĝi. El la diversaj organizaĵoj, kiuj alcelas la emancipon kaj altigon de la proletara klaso, la IIIa Internacionalo enhavas pli da internaciemo ol ĉiuj aliaj. Konsiderante, ke tiu organizaĵo konsistas el malsamlingvanoj oni povas diri, ke ĝi entenas la maksimumon da internacieco eblan nuntempe. Kaj pro tio mi restas al ĝi fidele aliĝanta. Tial ke mi agnoskas la aŭtoritaton kaj akceptas la disciplinon de la IIIa Internacionalo mi do restas komunisto.

Kiu ne estas ege egoista ; kiu havas iom da sentebleco ne povas konsenti kun la nuna sociaranĝo. Estas kondiĉo pri ebleco de progresado senĉese kontraŭbatali kion oni juĝas malbona. Cetere mi apartenas al la proletara klaso kaj ne povus perfidi ĝiajn interesojn.

Nu, la Soveta Rusio kaj la IIIa Internacionalo batalas profite al la Proletaro. Cetere, kiam oni vidas, ke la sovaĝa faŝismo malvolviĝas en preskaŭ ĉiuj landoj ; kiam oni prezentas al si tion, kio okazos, se ne plu regus oriente la ruĝa sovetreĝimo, tiam oni ne povas ne subteni kaj defendi la Rusan Revolucion.

Ĝiaj gvidantoj estas grandparte sinceraj viroj, energiaj, harditaj kaj celkonsciaj. Malgraŭ multe da eraroj, cetere de ili mem konfesitaj, mi opinias, ke ili estas la pli kapablaj por gvidi la laboristaron en ĝia malfacila batalo kontraŭ la ekspluatistaron.

Mi restas konvinkita, ke la rusaj revoluciuloj faris ĉion eblan por starigi en Rusio socialisman sociaranĝon. Ili ne sukcesis. Sed notinde estas, ke mi ne aŭdis iun dirantan : "Se mia partio havus la potencon, la provo pri starigo de socialismo ne fiaskus."

Ĉiuj do ni, samcelanoj, ĉu komunistoj, socialistoj, sindikatistoj aŭ anarkistoj, staras antaŭ malfacile solvebla problemo : la forigo de la nuna kapitalsistemo, la forigo de ĉia ekspluatado di la homo de la homo.*

Hodiaŭ mi opinias, ke la kapitalo estos ankoraŭ longe bezonata por funkciigi la socion. Se mi eraras, des pli bone. Sed se oni opinias necesa la kapitalon, oni almenaŭ celu starigi unuecan monon tutmondan.

Mia hodiaŭa opinio pri solvo de la socia problemo povus resume esti eldirata per du imperativaj propozicioj:
Estu unu sola mono.
Estu unu sola lingvo.

* * *

Mi nur priparoletis la ĉi-suprajn demandojn. Por studi ilin kiel decus multaj paĝoj estus necesaj. Tute mi ne intencis prezenti al la legantaro kompletan tezon, sed nur montri mian nunan spiritstaton. Mi celis altiri la atenton de la pripensemuloj al problemoj, kiujn ĉiu revoluciano devas zorge prikonsideri. Ni ne estu kreduloj, sed nur sinceruloj senĉese kontrolantaj la pravecon de siaj opinioj.

E. Lanty.

Noto de la kompilinto :
Escepte de pluraj "absolutaj participoj", la evidentajn gramatikajn erarojn (tre malmultajn) mi korektis. Kelkajn kompreneblajn arkaismojn mi lasis, ekz.: proletario, internacionalo. Anstataŭ : Troĉkij, fasĉistoj, Kaŭkaso, rezumi, konkiri - mi tajpis : Trocki, faŝistoj, Kaŭkazo, resumi, konkeri. La ĉi-paĝan uzadon de la neologismo "di" mi respektis.

* = ekspluatado al la homo fare de la homo (N.d.l.komp.)

Ĉu la Unua de Majo havas ankoraŭ sian dekomencan signifon ? (*)

Sen tro granda sakrilegio oni povas eble starigi la demandon ...

Nunjare la Unua de Majo fariĝis laŭleĝa festotago en lando, kies regantoj havas kiel ĉefan celon senindulge kontraŭbatali ĉion, kio ne estas pure nacieca. Kaj la respondecaj gvidantoj de la t.n. liberaj sindikatoj klarigas aprobe la aferon jene :

"La registaro volas, ke la Unuan de Majo la germana popolo atestu pri sia absoluta solidaro kun la proletaro. Kolegoj el la urboj kaj kamparanoj, vi estas la probatalantoj de la ideo pri la Unua de Majo ! Ĉiam pensu kaj fieru pro tio !"

Mi ne mirus, se en la germana literaturo baldaŭ estos klarigate, ke ĉefe la germanoj havas la rajton kaj devon soleni tiun laborfeston. Por lerta naci-socialista sofisto estos tre facile starigi tian tezon, sin apogante sur la fakto, ke multaj el la unuaj pioniroj de la unuamaja movado estis germanoj aŭ germandevenuloj. Inter la "Martiroj de Ĉikago" oni ja trovas, ekzemple, la nomojn de Fischer, Engel, Schwab ; kaj la tiutempe aperanta en Ĉikago germanlingva laborista gazeto (Arbeiter-Zeitung) ludis tre gravan rolon en la koncerna agitado.

Kiam, post trijarcenta persekutado, la kristanismo ricevis el la manoj de la romana imperiestro Konstanteno oficialan agnoskon, tio estis la signo, ke la kristana movado jam perdis sian revolucian signifon, sian puran dekomencan karakteron. Iom post iom la kristanismo imitis

---

(*)Tiu ĉi artikolo aperis en "Sennacieca Revuo" de la 10a de majo 1933. N.d.l.komp.

la morojn de l'paganismo kaj la konsekvenca sekvo de tio estis, ke la persekutitoj fariĝis siavice persekutantoj. La hodiaŭaj sindikataj bonzoj, kiuj adaptiĝas al la Hitlera regado, agas simile al la episkopoj, kiuj benis la standardojn de Konstanteno.

En la jaro 1914 la internaciismo plene bankrotis ; la samo denove okazas en 1933. Ĉie, ĉie en la mondo superregas la spiritojn la nacieca sento ; ĝi estas la plej forta movilo, la plej taŭga regilo en la manoj de demagogoj.

Ĉiuj kompetentaj ekonomiistoj tamen interkonsentas, ke la nuntempa krizo povas trovi solvon nur per rimedoj, aplikotaj laŭ tutmonda skalo. Tamen neniam estis pli forta ol nun la naciisma ideologio. Ne estas mia intenco insisti nun pri tiu kontraŭdiro al principoj ĝenerale akceptataj en marksistaj rondoj. Mi nur volas substreki la fakton, ke reala solidaro, vera unueca sento ne ekzistas inter la diversnaciaj proletoj.

La Internacioj ne multe diferencas de la Ligo de Nacioj. Kiam la cirkonstancoj tion ebligas, la diverslandaj internaciistoj amike interrilatas, kune kongresas kaj bombaste paroladas pri solidaro, pri tutmonda frateco ktp. ; sed kiam aliiĝis la cirkonstancoj ; kiam la nacia intereso tion postulas, tiam montriĝas, ke la ligiloj tre facile rompiĝas. La sinteno de la germana sekcio en la II-a Internacio tute similas la sintenon de Japanio en la Ligo de Nacioj.

Ĉi-okaze mi povis noti, ke la kapitulaco de la socialdemokrataro antaŭ Hitler ne vekis ĉe la francaj socialistoj grandan indignon, sed nur farizean senton : "Ho, ni, francoj tamen ne agus tiel, ne cedus senbatale." Per la barbo de K. Marks mi ne volus ĵuri pri tio. Mi prefere kredas, ke estas nur la nacieca sento, kiu ĉi-okaze ankaŭ parolas...

Sed eble iuj opinias, ke almenaŭ la III-a Internacio donas pli da garantio pri internacia solidaro. Nu, ni do prikonsideru la faktojn. Ekzistas abunda literaturo, en kiu oni povas legi, ke la ruĝa armeo ekzistas por l

servo de l'tutmonda proletaro. Ĉu do la militdeklaro de Hitler al la komunista partio havis kiel sekvon, ke Voroŝilov ordonis la mobilizadon de la ruĝarmeanoj ? Tute ne ! Estas klare por ĉiu, kiu volas malfermi la okulojn, ke la armeo en Sovetio pli kaj pli alprenas naciecan karakteron, ke ĝia nura celo estas defendi la landon, kie oni "konstruas socialismon".

Sed jen pli signifa fakto : Estas en pluraj landoj starigitaj diversaj komitatoj kun la celo agitadi, por ke ĉie en la mondo la germanaj varoj estu bojkotataj. Ĉu Sovetio partoprenas en tia bojkotado ? Ne, Germanio daŭre kaj grandkvante liveras maŝinojn k.a. varojn...

La legantoj bonvolu noti, ke mi nur konstatas faktojn kaj neniel celas riproĉi, aprobi, laŭdi aŭ mallaŭdi la Stalinan regadon. Ne estas mia temo ekzameni, ĉu estas eble aŭ ne konstrui socialismon en unu sola lando. Stalin diras : jes ; Trocki diras : ne ; nur la estonto povas doni tute certan respondon al tiu demando.

Oni almenaŭ permesu al mi diri, ke jam delonge mi povis fari sufiĉe da observoj, kiuj igis min akiri la firman konvinkon, ke jam en Sovetio la ideo, kiu subtenas la entuziasmon de la "sturmuloj", ne estas la internaciismo, sed ia speco de patriotismo tre simila al tiu de la francoj post la revolucio de 1789-93.

Unuvorte, la naciismo estas nuntempe en la tuta mondo la ideo-forto - facile aliiĝebla en pasion - la plej potenca kaj ĝi superregas la mensojn ; ĝi estas la plej forta digo, la plej alta barilo, kiu malebligas racian evoluadon de la homaro. Necesas esti blinda por ne vidi, ke ĝenerale la klaskonscio tute ne kapablas kontraŭstari la nacikonscion ĉe la grandega plimulto de la homoj. Kial do provi trompi sin mem ? Iluzioj estas ĉiam danĝeraj.

Ĉu povus aliel esti ? Bedaŭrinde ne, ĉar neniam ĝis nun estis sisteme kaj persiste entreprenata tra la tuta mondo edukado, celanta tute, ĝisfunde detrui la naciecan senton. Tia edukado ne povas cetere ekzisti sen komuna lingvo. Pro tio vole nevole, la internaciistoj agas nekonsekvence kaj maltrafas la celon. Per la flegado de sia nacia lingvo

ili tenas viva la naciecan senton, kiu en eksterordinaraj cirkonstancoj fariĝas eksplodema pasio kapabla puŝi ilin sur batalkampojn. Plie la senĉesaj alvokoj por nacia liberiĝo, por nacia sendependeco ktp. povas nur helpi al demagogoj kiel Hitler k.a. superakvigi ĉian internaciismon per naciismaj ondegoj.

Do, nunjare en du grandaj landoj la Unua de Majo estis solenata per kanonpafoj, per regimentaj paradoj kaj similaj pompaj manifestacioj. Tia konstato estas pripensiga kaj rajtigas nin starigi la demandon, ĉu la laborista festo ne jam perdis sian dekomencan karakteron kaj signifon ?

- Sed en Moskvo oni kantis la "Internacion" kaj tio montras la grandan diferencon inter la Stalina kaj Hitlera regado.

- Neniel mi intencis samigi la du regadojn ; mi bone scias, ke en Germanio oni malpermesas ĉion marksisman, dum en Sovetio estas permesata nur tio, kio estas ortodokse marksista... Sed la rimarkigo pri la oficiala himno sovetia ne multe impresas min. En la "Marseljezo", la oficiala himno de Francio, estas konsilate mortigi reĝojn ; sed jam delonge tiuj parazitoj kutimis tute trankvile aŭdi kaj saluti tiun kanton, okaze de oficialaj akceptoj. Ĉu la nuna franca respubliko reprezentas la idealon de la respublikanoj el 1789 ? Ĉu la katolikismo similas la frutempan kristanismon ? Ĉu la papo havas ion komunan kun Jesuo-Kristo ? - supoze, ke ĉi tiu lasta fakte ekzistis kaj ne estas pura mito. Ĉu...

Okaze de la nunjara Unua de Majo mi starigas tiujn demandojn, instige al la SAT-anoj, ke ili meditu pri la rekomendo, kiun faras al ni ĉiuj nia Statuto, nome, ke niaj opinioj neniam devas fariĝi senvivaj dogmoj. Tro longe, tro ofte ni estis trompataj per vortoj, stultigataj per insignoj kaj ĉiaspecaj ikonoj... Okaze de la Unua de Majo mi deziras, ke la SAT-anoj konsciu pli forte ol iam ajn, ke esperanto en la laborista movado ne devas esti konsiderata kiel bagatela, flanka afero, sed male kiel grava, nepre necesa ilo, kiel la bazo,

la unua ŝtono sur kiu oni starigu la klasbatalajn organizojn.

Esperanto sen socialismo ne havas por ni grandan signifon ; sed ni forte konvinkiĝu, ke socialismo sen mondlingvo estas lama, nekonsekvenca, kredeble fiaskonta afero.

Sed mi jam sufiĉe herezumis. Bonvolu pardoni kaj pripensi...

E. Lanti.

* * *

Reage al la ĉi-supra artikolo, M. Sampson sendis jenan leteron, al kiu E. Lanti rebatis en "Senĥacieca Revuo" de junio-julio 1933 :

"Estimata Kamarado,

Traleginta vian artikolon en S.R. mi miris pri ĝi. Vi faras du konstatojn, kun kiuj mi ne simpatias. Unue, vi opinias, ke Sovetio devus igi militon pro la Hitlera teroro en Germanio. Due, vi akuzas la germanan laboristaron pro manko de kuraĝo. Al ambaŭ konstatoj mi diras : "Stultaĵo!!" Se Sovetio farus militon, tio estus tio, kion deziregas la kapitalistoj, kiuj faras ĉion por instigi Sovetion ekmiliti. Ĉu la japana armeo ne forŝtelis vagonarojn, lokomotivojn ktp. de la Soveti-Ĉinia Fervojo? Kial ? Unue por instigi Sovetion ekmiliti. Ne, ne pro naciismo, sed pro mondpaco Sovetio ne militos. - Pri la malkuraĝo de germana proletaro : la "Rote Fahne" ĉiam aperas, kaŝe, ankaŭ centmiloj da flugfolioj. Kaj miloj da ruĝfrontanoj, komunistoj kaj eĉ socialdemokratoj estas en malliberejoj, kie oni turmentas kaj fitraktas ilin.

Kion mi nun povas diri al miaj Sovetiaj K-doj, kiuj akuzis min esti malamikino al Sovetio kaj burĝino, ĉar mi restas en SAT ? Kaj mi asertis al ili, ke mi neniam ion vidis en "S-ulo" kontraŭ Sovetio, kaj ke Lanti estas nur unu homo kaj ne la tuta SAT-anaro ; do mi ne estas devigata opinii same kiel li, kvankam li restas en SAT.

Ne, K-do Lanti, viaj opinioj ne fariĝos dogmoj. Se tio okazus, estus katastrofo. La 4-an de julio okazos en

Parizo kontraŭfaŝisma konferenco. Mi scias, ke ĉeestos iuj germanoj ; ili eĉ riskos multe por ĉeesti. Mi sendis salutleteron al la prezidanto kaj ege bedaŭras, ke mi mem ne povos partopreni. Vivu la kuraĝa germana proletaro ! Vivu la ruĝfronto ! Eble multaj mortos batalante, sed ili ne vendos la animon, kiel faris R. Makdonald kaj aliaj. Komuniste la via.

M. Sampson.

Por respondi konvene al la ĉi-supra letero, mi devus verâajne transpaŝi la limojn, kiujn ĉiu devas respekti, verkante por "S-ulo" aŭ "S.R.". Tion kompreneble mi ne faros ; tiom pli, ke mi ankoraŭ okupas respondecan postenon en SAT. Estu do nur dirate, ke la celo de mia artikolo estis atentigi la legantaron al tiu fakto, ke la nuntempaj internacioj estis tute nekapablaj organizi mondskale, ne eĉ eŭropskale, kontraŭfaŝistan batalon.

Noti la fakton, ke Sovetio, sub la Stalina regado, ne eĉ bojkotas la germanajn varojn, neniel signifas malamikecon al la Sovetia popolo. Tiuj varoj sendube necesas por "konstrui socialismon", sed ili estas haveblaj en Britio, Francio, Usono k.a. landoj. Mi tre miras, ke K-dino Sampson, kiel ano de la Brita Kompartio ŝajne ne scias, ke la bolŝevismo havas nenion komunan kun la pacisma ideologio. Kaj se Sovetio faras ĉiajn cedojn antaŭ Japanio rilate al la ĉinia fervojo pro amo al la "mondpaco", mi ne povas klarigi al mi, kial en 1929 la ruĝa armeo batalis kontraŭ la ĉinojn ĝuste por konservi tiun saman fervojon. Tiu konstato ankaŭ ne estas montri malamikecon al Sovetio, tial ke mi tiutempe aprobis tiun batalon de la ruĝa armeo, kiam multaj revoluciuloj parolis pri "ruĝa imperialismo".

Fari la konstaton, ke Hitler povis kapti la regadon, nerenkontinte organizitan kontraŭagadon, kiel okazis en 1920 kontraŭ la "Kap-puĉon", tio ne estas dubi pri la batalpreto kaj kuraĝo de la klaskonscia germana proletaro. Estas vere, ke la Kompartio alvokis por ĝenerala striko. Kial tiu alvoko restis senefika ? Jen demando, kiun mi ne povas esplori, tial ke mi tro severe prijuĝu la politikon kaj taktikon de la nunaj gvidantoj de

Komintern, kaj tio ne estas permesita en SAT-organoj. Mi jam eble eĉ tro diris kaj sekve finos, petante la legantojn, ke ili bonvolu relegi atente kaj kompreneme mian artikolon por plene taksi la gravon de miaj "stultaĵoj".

E.L.

la
tr
se
te
s
p

t
e
l

EPILOGE...

De ekstere - De supre (*)

****

Kiel la legantoj sendube jam scias per iu komuniko de la Direkcio, post kelkaj monatoj la gvidado de SAT devas transiri en aliajn manojn. Nun mi sentas min preskaŭ tute senŝarĝita je respondeco kaj povas do jam kvazaŭ de ekstere, de supre rigardi la aferojn. Ĉe tia pozicio, en tia spiritostato oni povas plej bone observi kaj senpasie prijuĝi.

Dum la lastaj tri jaroj nia komuna entrepreno estis tre forte skuata de detruaj ventoj el partieca fanatiko, el stulta miskompreno, metitaj en la servon de senskrupula intrigo. Al tiuj detruaj fortoj aldoniĝas la terura ekonomia krizo, kiu senlaborigas tre multajn el la plej sindonaj SAT-anoj. Kaj malgraŭ ĉio, nia Asocio eltenis ; ĝi restas firma kaj alten flirtigas sian standardon, sur kiu restas skribite :

Esperanton en la servon de l'Proletaro !
Samlingvanoj ignoru inter si la landlimojn !
For la dogmojn !
Lojalon al ĉiuj klasbatalaj tendencoj !

Dum dek tri jaroj tiuj devizoj gvidsignis al ni la vojon. Kun trankvila animo ekrigardante hodiaŭ malantaŭen, mi gardas la konvinkon, ke ne ekzistas por nia laborista esperanta movado pli taŭgaj gvidiloj por antaŭenmarŝi al la celo.

Verdire la vojo estas multe pli longa ol komence mi supozis kun la entuziasmo de nove bakita esperantisto. En la jaroj 1919-20, vidante kiom malvigla estas la neŭtrala movado, kiom religiaĉe ĝi aspektas en la okuloj de klaskonsciaj laboristoj, mi opiniis, ke sufiĉos fari klaran apartigon for de la neŭtraluloj, por ke en la revoluciaj

---

(*)"Sennaciulo" de 12.1.1933

rondoj nia movado estu favore konsiderata kaj ke post kelkaj jaroj la laboristaj organizoj prenu sur sin la propagandon kaj instruadon de la lingvo kaj poste uzadu ĝin praktike. Tiu mia konvinko estis plifirmigata de la fakto, ke en aprilo 1920 disvastiĝis la famo, ke la Soveta Respubliko alprenis esperanton kaj decidis lernigi ĝin en ĉiuj lernejoj. Ĉe tia ekscio la fama pacista verkisto Romen Rolan skribis interalie jenon :

"...La decido, kiun alprenis la Soveta Registaro... estas historia okazintaĵo, kies konsekvencoj estas grandegaj : ĝi estos bonfarinta por la Homaro pli ol ĉiuj teoriaj diskutoj aŭ partiaj disputoj, en kiuj absorbiĝas la aktiveco de la okcidenta socialismo".

Ĉu do sen troa fantaziemo ne estis eble tiam opinii, ke baldaŭ nia mirinde racia kaj facila lingvo estos grandskale metata en la servon de l'tutmonda revolucio? Por venki oni devas utiligi ĉiujn armilojn kaj esperanto estas ja unu el ili, same kiel aeroplanoj kaj radio-aparatoj...

Post kelka tempo oni bedaŭrinde eksciis, ke la informo fakte estas tute senbaza. Tamen estis ankoraŭ permesite havi la esperon, ke finfine Komintern esploros la aferon kaj alprenos decidon favore al iu internacia lingvo. Cetere studkomisiono estis tiucele starigita okaze de ĝia II-a Kongreso. Sed la tuta afero estis nur rezulto de blufemaj idistoj, kiuj per tiu rimedo sukcesis dum kelka tempo trompi komunistajn partiojn el kelkaj landoj.

Post diversaj tiaj negativaj spertoj, faritaj ĉe partioj aŭ ĉe influhavaj personoj, mi baldaŭ alvenis al la konkludo, ke nia movado povas kreski nur malrapide kaj venki per la solaj fortoj de la esperantistoj mem. Tion mi jam diris en la jaro 1922 en artikolo kun la titolo : "En la lumo de la sperto" aperinta en la malnova Sennacieca Revuo.

Ĉu post dek jaroj la situacio multe aliiĝis ? Ĉu oni povas esperi, ke baldaŭ nia lingvo estos alprenata kaj uzata grandskale de la laboristaj organizoj ? Ĉu la Soveta Registaro priatentas nun esperanton en siaj kvinjaraj planoj ? Al ĉiuj tiuj demandoj oni povas nur nee

respondi.

Estas vere, ke nia movado pli kaj pli altiras al si la atenton de gvidantoj ; estas fakto, ke malgrandiĝas la nombro de tiuj, kiuj mokete levas la ŝultrojn ĉe la aŭdo de la vorto esperanto. Sed estus trompi sin mem, se oni konkludus el tio, ke proksima estas nia venko.

Kiam en kapitalistaj landoj oni propagandas esperanton al laboristaj gvidantoj, ili respondas iafoje jenon : "Ni faru unue la revolucion kaj poste ni okupiĝos pri la lingva demando." Nu, en Sovetio la revolucio estas farita: kiel statas tie nia afero ? Se ni esploras la faktojn kun tute malfermitaj okuloj, ni konstatas, ke la esperanto-movado estas konsiderata de la tieaj gvidantoj nur kiel eksperimento, kiu indas atenton, sed kondiĉe, ke la esperantistoj konfesu, ke ilia lingvo neniel povas pretendi fariĝi komuna kulturilo por ĉiuj popoloj. Nè kredu, karaj legantoj, ke mi pentras per nigraj koloroj. Vi juĝos mem per kelkaj citoj el la tezoj prilaboritaj de la "brigado de lingvo-konstrua fako kaj akceptitaj de la Scienc-esplora Instituto de la Lingvo ĉe la Popolkomisario de klerigo RSFSR en Moskvo" kaj publikigitaj en la III-a n-ro de "La Nova Etapo" :

"...oni devas opinii, ke ĉiuj provoj starigi la demandon pri komununiversala lingvo nunmomente kiel vican aktualan taskon estas antaŭtempaj kaj utopiaj..."

"...La belanimaj celadoj de d-ro Zamenhof kaj de l' esperantistaj burĝaj propagandistoj al frateco de popoloj kaj al tutmonda harmonio objektive estis, kiel ĉiuj etburĝaj iluzioj, helpilo de imperiismo. La plej bona montrilo de tio estas la provoj de la internacia socialfaŝismo kontraŭmeti la esperantistan movadon al la proleta internaciismo kaj la ĉiam pli kaj pli ardiĝanta batalo interne en la monda esperantista movado."

"...La kunproksimiĝo de naciaj lingvoj, kiu kondukos al unu monda lingvo, okazas sendepende de esperanto."

"...En la disvolviĝ-procedo de la burĝa socio estis kreitaj sennombraj projektoj de helpaj lingvoj inter kiuj

plej vivkapabla sin montris la projekto konata sub la nomo "lingvo esperanto". Ni ne devas tamen malakcepti utiligon ankaŭ de aliaj internaciaj lingvoj, se ilia disvastigiteco faras tiun utiligon ebla..."

Mi dezirus pli amplekse citi, se la loko permesus ; sed mi opinias, ke la ĉi-supraj citoj sufiĉas por konvinki la legantojn, ke nia afero en Sovetio estas tute miskomprenata kaj ne troviĝas en tre favora situacio. Mi tute ne povas esperi, ke baldaŭ Komintern solvos la lingvan problemon laŭ niaj ĉiamaj postuloj. En la tuta tezaro oni vane serĉus iun eldiron, kiu povus esperigi, ke post pli malpli longa tempo esperanto fariĝos la oficiala lingvo ĉe la internaciaj Kongresoj de Komintern kaj por la publikigo de dokumentoj kun tutmonda intereso.

Ni sekve devas daŭrigi la batalon kaj tiucele ni bezonas ĉiujn niajn unuigitajn fortojn. Pli firme ol iam ajn ni konvinkiĝu, ke la venko venos nur de malsupre kaj per la faroj de la esperantistoj mem.

Ĉe la konstato, ke longa, tre longa estas la vojo ĝis la fincelo, eble kelkaj K-doj perdos la emon daŭrigi la iradon. Al tiuj malkuraĝemuloj mi diru : "Ne la celo estas la ĉefa afero, sed la antaŭeniro al ĝi. En la irado mem, en la batalo mem ni devas trovi la necesan instigilon por daŭrigi." Okaze de ĉi tiu 400-a n-ro permesu al mi fari konfeson. Dum dek-tri jaroj mi batalis por nia komuna afero ; ĉe la komenco mi havis iluziojn ; hodiaŭ ili estas for ; la celo ne ŝajnas al mi atingebla dum mia pli ol duone forvivita vivo ; survoje mi ricevis mokojn, malicajn kritikojn kaj eĉ insultojn ; tamen neniel mi bedaŭras mian ekiron. Male, mi forgesas ĉion tiurilate - kaj ĝojas ĉe la penso, ke la insultintoj devis almenaŭ uzi esperanton por eldiri siajn malicaĵojn. Insultado forigas fremdon. Tio estas tre grava!.. Pripensu tion, Gek-doj. Fremdo estas pli malbona eco ol malestimo. Fremdo estas nerenversebla baro sen komuna lingvo, dum malestimo povas iafoje esti kaŭzata de kalumnio aŭ miskompreno kaj sekve foriĝas tuj kiam malaperas la kaŭzo. Fremdon forigas esperanto kaj tio estas netaksebla merito. Eĉ se mi havus nun la certon, ke

neniam nia lingvo fariĝos ĉies posedaĵo, mi tamen nenial bedaŭrus esti dediĉinta al ĝi tempon kaj energion kaj daŭrigus la batalon. Plej alcelinde estas penadi por senĉese plilarĝigi sian horizonton. Esperanto jam nun donas tiun eblon. Krome la Zamenhofa artefaritaĵo fariĝis mia hejma lingvo, kaj la konstato, ke ĝi kvazaŭ fremdigas la francan lingvon en mia menso, estas por mi tute aparta, tre neordinara plezuro, kiun mi bedaŭrus ne ĝuadi.

Volante de nun esti nur simpla soldato en nia SAT-ana armeo, mi tamen sentas min pli forte ligita al ĝi ol iam ajn antaŭe kaj restas ĉiam preta bataladi por ties sukceso. Sed en ĉi tiu kvazaŭa "cigna kanto" mi deziras konvinki la junajn batalantojn pri tio, ke la fincelo devas esti nur flanka afero en iliaj zorgoj kaj esperoj. Insiste mi rediras : vi trovu en la agado mem, en la uzado mem de la lingvo la ĉefajn instigilojn por antaŭenmarŝi.

Se mi ne timus miskompreniĝon, volonte mi proponus, ke sur nian standardon oni skribu novan frazon, nome "Ni estu unue esperantistoj, SAT-anoj".

En mia penso tio signifas, ke oni ne povas esti konsekvenca anarkisto, komunisto, socialisto, ne celante detrui la lingvajn barojn, kiuj apartigas, fremdigas la homojn. Paroladi pri tutmonda unuiĝo de la laboristaro kaj obstine ignoradi esperanton, tio estas ĉu stulto, ĉu malsincero, ĉu kaŝa aŭ nekonscia ekspluatemo. Esti en SAT unue esperantisto, tio ne signifas, ke en sia partio, en sia sindikato oni ne devas esti ankaŭ tie unue partiano, unue sindikatano. Tio nur signifas, ke por akceptigi esperanton al niaj organizoj ni devas esti unuigitaj, kaj nia unueco povas esti garantiata nur se en la esperantaj rondoj ni vole bridas niajn personajn politikajn konvinkojn. Se tion estus kompreninta la granda nombro da K-doj, kiuj aliĝis al SAT ekde ĝia fondiĝo, ĉi tiu 400-a n-ro povus esti eldonita 20 000-ekzemplere. Ni meditadu pri tiu fakto, se ni sincere deziras sukcese almiliti la laboristajn organizojn, por trudi al ili esperanton...

Sed, kiam oni prikonsideras la situacion, en kiu nuntempe baraktas la homaro, eble estus pli saĝe gratuli al si, ke

nia gazeto povis atingi ĉi tiun 400-an numeron. Do, antaŭen ! por ke ĉe la 500-a la estonta gvidanto povu paroli pli entuziasme. Kun neŝanceliĝa unuecemo kaj kun la certo, ke ili faras utilan kaj pozitivan laboron, la SAT-anoj spitu la batojn de l'sorto kaj antaŭeniru.

E. Lanti.

* * *

Epiloge (*)

****

Lastatempe mi ricevis relative multajn leterojn de K-doj, kiuj diras sian bedaŭron kaj eĉ ĉagrenon pro mia decido forlasi la gvidadon de SAT. Kelkiuj insistas, por ke mi ne persistu en mia decido. Nature tiuj simpatiesprimoj ne lasas min indiferenta kaj mi dankas pro ili ; sed nenio povus kontraŭpezi mian deziron tute liberiĝi el respondeca posteno.

Jam de kelkaj jaroj mi sentas min kvazaŭ katenita per la penso, ke senĝena, tute senrezerva esprimo de miaj ideoj povus eble malutili al nia organizo. Kvankam mi neniam celis, nek eĉ deziris, ke mia persona kompreno pri diversaj soci-politikaj aferoj fariĝu la oficiala vidpunkto en SAT, tamen la sperto montris, ke ekzistas la emo ĉe multaj personoj konsideri miajn dirojn kiel ion oficialan. Tia stato estas bedaŭrinda, sed praktike neŝanĝebla aliel ol per demeto de ĉia respondeco en la gvidado de nia Asocio.

Oni do ne kredu, ke mia decido rezultas de ia subita kaprico ; fakto estas, ke jam delonge mi intencis forlasi la gvidpostenon. Sed kompreneble tion mi ne farus, kiam ardis la batalo, kiu devis decidi, ĉu SAT restos aŭ ne la organizo, kia ĝi estas ekde sia fondiĝo. Ili grave eraris, tiuj blufuloj, kiuj opiniis, ke sufiĉos superŝutadi min per kritikoj, riproĉoj kaj eĉ insultoj, por ke mi lasu ilin libere fari el nia sendependa Asocio filion de politika partio.

Inter tiuj skismigintoj, kelkaj sendube estis sinceraj. Mi memoras, kun kia entuziasmo ili kriis sian kredon pri proksima forfalo de la kapitalismo, pri la certo, ke ilia partio baldaŭ kaptos en la manojn la regpotencon. En iliaj okuloj sufiĉis dubeti pri tio, por esti rigardata kiel

---

(*) "Sennaciulo" de 25.3.1933.

kontraŭrevoluciulo, kiel socialfaŝisto. Ho ve ! jam dutri jaroj forpasis kaj kion ni vidas ? En la sola lando, kie la kompartio konsistigis amasmovadon, la alsaltotaĉmentoj de Hitler povas preskaŭ sen ia kontraŭstaro okupi urb- kaj sindikat-domojn. Flago kun svastika insigno (hoko-kruco) flirtas sur la Libkneĥta Domo en Berlino... Kaj ĉe la horizonto nenia ruĝarmeo vidiĝas, venanta por defendi la komunistojn. Plorindaj konstatoj! Kaj kiom mi dezirus male konfesi, ke mia skeptiko estis senbaza ! Estas ja dolore pravi en tiaj cirkonstancoj... Kiu do ne vidas klare hodiaŭ, ke la laboristaj esperantistoj pli ol iuj aliaj havas intereson ne utiligi nian lingvon por agiteca propagando, se ili volas trafe servi la esperantan aferon ?

Ĉiam mi batalis, por ke nia peresperanta entrepreno ne havu politikan programon, ne difinu al si politikajn taskojn, sed povu tamen per sia inform- kaj edukaboro esti utila al ĉiuj laboristaj organizoj ; mi ja konsiderus kiel ian perfidon, se SAT konsentus servi nur al unu partio - kia ajn ĝi estas. Nia movado retrovis sian spiritan ekvilibron ; ĝi havas antaŭ si rektan vojon kaj ne ekzistas nun granda danĝero, ke ĝi deflankiĝu, sekve de malhonestaj aŭ fanatikulaj artifikoj.

Movado devas ekzisti sen kuratoroj kaj vole nevole ĝis nun la fondintoj de SAT ludis tian rolon. Ĝi eble estis necesa en la komenca tempo, sed mi opinias, ke nun ĝia pluigo povus eĉ esti malbona. Estas necese, ke aliaj manoj ekprenu la direktilon. Tial mia nekontraŭstarebla deziro demeti ĉiun oficialan rolon, ne povas domaĝi al nia komuna entrepreno.

Kompreneble la fakto, ke mi ne plu tenos la direktilon, neniel signifas miaflanke seninteresiĝon pri la gvidado. Mi ja restas SAT-ano kaj estas la devo de ĉiu interesiĝi pri la vivo kaj stato de sia organizo.

Nun sentante min preskaŭ liberigita de respondeco, mi emas ĵeti ekrigardon malantaŭen por ĉerpi instruojn el la faritaj spertoj. Proze mi intencas kanti mian "cignan kanton", se la legantoj permesos, t.e. se ilin ne tedos tiu mia projekto. Ĉar por plenumi tiun taskon

restas ankoraŭ kelkaj monatoj, mi do povos ere liveri miajn pensojn kaj en tioma kvanto, en tia formo, ke al neniu ili donos kapdoloron. Verŝajne mi ankoraŭ herezumos, eble eĉ pli ol kutime, tial ke mi jam sentas pli libera mian plumon. Ĉiu do bonvolu ne forgesi, ke mia nura celo estas instigi la leganton al memstara pensado. Nenial mi deziras, ke miaj ideoj estu sen kritiko akceptataj ; male oni rilatu al ili kritike, antaŭ ol ilin akcepti aŭ rifuzi.

Kompreneble du plus du estas kvar. La plej profunda cerbumado pri tio ne povas alkonduki al alia konkludo. Sed tia konstato neniel signifas, ke veroj devas esti krede akceptataj. Per kredeca akcepto ili perdas sian efikon : ili fariĝas kvazaŭ senkarnaj mumioj, kiujn diversspecaj religiuloj respektas, adoras en luksaj, senutilaj maŭzoleoj...

Sufiĉa prologo, ĉu ne ? al mia epiloga babilado. Ĝis la !...

E.L.

***

Fine ni trafis la celon... (*)
****

Estis jam malfrue en la nokto, kaj mi pretiĝis enlitiĝi, kiam oni insiste sonorigis ĉe la sojlo de mia loĝejo. Malferminte la pordon, kun granda miro mi ekvidis la bolŝevikan esperantiston Fermal kaj la menŝevikan Maraŝ. Kion, diablo! volas tiuj entruduloj mi pensis ? Sur la vizaĝo de la du neatenditaj kaj nedezirataj vizitantoj radiis esprimo de kontento kaj de entuziasmo, kaj tuj ekparolis Fermal :

- Pardonu, K-do Lanti, sed ni estas certaj, ke vi ne riproĉos al ni, kiam vi ekkonos la celon de nia vizito. Ni alportas al vi tiom eksterordinare gravan novaĵon, ke vi eĉ dankos al ni pro tio, ke ni ne volis eĉ unu solan horon prokrasti ĝian konigon al vi...

Invitinte la du gajmienulojn, ke ili eniru mian ĉambron, mi diris kompleze me :

- Nu, bonvolu sidiĝi ; mia aŭdorgano estas streĉegita por aŭskulti vian raporton...

Tiam per iom kmaranta voĉo Maraŝ ekparolis :

- Kiel vi certe scias, antaŭ kelkaj monatoj la supera instanco de la II-a Internacio sin turnis al tiu de la III-a kun propono pri aranĝo de unuecfronta agado kontraŭ la faŝismon. Unue venis el Moskvo ne tre favora respondo, sed post kelkaj personaj intertraktoj de la gvidantoj finfine estas nun atingita plena interkonsento, kiu esperigas post kelka tempo ne nur unuecfrontan agadon, sed eĉ rekuniĝon de la disigitaj fortoj en unu saman organizon. Tial ke mi kaj Fermal havas sufiĉe intiman kontakton kun la gvidantoj de niaj respektivaj partioj, ni povis esti jam informitaj pri la okazaĵo, pri kiu ĉiuj komunistaj kaj socialistaj gazetoj morgaŭ larĝe raportos...

(*)"Sennaciulo" de 25.4.1933.

- Ni tamen ne venus ĝeni vin nur por sciigi tion, se en la interkonsento farita ne estus ankaŭ tre grava decido pri esperanto, intermetis Fermal.

- Kompreneble, akcentis Maraŝ, prezentante al mi paperfolion kun peto, ke mi bonvolu mem konatiĝi per propraj okuloj kun la eksterordinare grava teksto, kiu fakte signifas la definitivan venkon de esperanto en la laboristaj rondoj.

Preninte en la manojn la folion, kun streĉa atento kaj granda surprizo mi legis jenon :

"...Kiel plia signo, ke la interkonsento farita inter ambaŭ organizoj (II-a kaj III-a Internacioj) signifas radikalan ŝanĝon en ilia ĝisnuna politiko kaj taktiko, estas decidite fari ĉiujn necesajn aranĝojn, por ke la internacia lingvo esperanto fariĝu kiom eble plej baldaŭ la oficiala lingvo por ĉiuj internaciaj rilatoj. Tiu decido estas motivigita per la sekvaj konsideroj :

" 1) La finfina emancipiĝo de l'proletaro povas okazi nur mondskale ; konsekvence necesas, ke la laboristoj el ĉiuj landoj estu pli kaj pli intime interligitaj kaj sentu sin solidaraj. 2) Bedaŭrinde la malsamlingveco tre malhelpas, ke la simplaj laboristoj sentu kaj spertu solidaron. 3) Tia stato plie estas unu el la kaŭzoj de la facilo, laŭ kiu demagogoj kiel Musolini kaj Hitler povas utiligi la naciemon de la popolamasoj por trompi kaj sklavigi ilin. 4) La naciismo ja estas unu el la plej intensaj kaj danĝeraj ideofortoj kaj pasioj, kiuj impulsas la homojn ; sekve ĉiu taŭga rimedo por kontraŭbatali la naciemon devas esti aplikata kaj esperanto nekontraŭdireble estas unu el tiaj rimedoj.

"Por efektivigi tiun nian decidon, jenaj praktikaj aranĝoj estu senprokraste farataj : a) Entrepreni en la gazetaro viglan kaj daŭran propagandon por esperanto ; b) ektrakti kun la laboristaj esperantaj organizoj, por ke ties membroj helpu nin en la efektivigo de nia decido ; c) rekruti ĉiujn spertajn kaj sufiĉe klerajn esperantistojn por komisii al ili la tradukadon en esperanton de ĉiuj gravaj verkoj kaj dokumentoj necesaj por la klerigado kaj informado de la tutmonda laboristaro ; d) aperigi komence

monatan kaj iom poste dusemajnan gravan revuon en esperanto ; e) postuli, ke post unu jaro neniu nova funkciulo aŭ oficisto povos esti akceptata, se li ne scipovas esperanton ; f) en la landoj, kie la regado jam estas en la manoj de reprezentantoj de l'proletaro, tie esperanto estu devige instruata en la lernejoj..."

Mi apenaŭ povis kredi je miaj okuloj kaj suspekteme rigardis al Maraŝ kaj Fermal : "Ĉu tio ne estas mistifiko", mi pensis. Sendube Fermal vidis mian suspekton kaj li eldiris :

- Ni komprenas vian miregon, K-do Lanti, sed tiu teksto estas tute aŭtentika kaj morgaŭ vi povos legi ĝin en la partiaj gazetoj. Cetere por montri al vi, kiagrade aliiĝis la spiritostato de la gvidantoj, eksciu, ke jam Trocki estas survoje al Moskvo, kie de nun li kunlaboros bonkamarade kun Stalin. Simile okazas en Sovetio rilate al malliberigitaj anarkistoj kaj menŝevikoj. Aliparte en la 30-paĝa raporto el kiu ni kopiis la tekston, kiun vi ĵus legis, estas deklaroj tre signifoplenaj pri la nova sinteno de la komunistaj kaj socialistaj gvidantoj. Ambaŭ konfesas tute malkaŝe kaj sincere, ke ili faris en la pasinto multajn erarojn kaj ne taksis je ĝusta valoro plurajn faktorojn, kiuj tamen ludas grandan rolon en la evoluo de l'socioj. La kreskanta minaco de l' faŝismo finfine saĝigis niajn gvidantojn kaj tial ili decidis ĉesigi la fratbatalon...

. . . . . .

Mi frotis al mi la okulojn kaj mirigite konstatis, ke estas tute mallume en mia ĉambro. Kio do okazis ? Ĉu mi sonĝis ? Kie estas Fermal kaj Maraŝ ? Malaperintaj !...

Ne povas esti dubo : mi faris belan, tre belan sonĝon...

E.L.

Marks ne estis marksisto...(*)
****

Laŭ mia promeso ĉi tiuj epilogaj diroj ne devas esti enuaj kaj kaprompaj. Mi kutimas plenumi promesojn, libere faritajn, sed ĉu estas eble paroli pri marksismo, ne devigante la leganton dormige cerbumi ? Eble jes. Almenaŭ mi provos. Bonvolu aŭskulti jenan anekdoton :

Antaŭ dektri jaroj, ĉe la fondo de SAT en Prago, mi havis la okazon konatiĝi kaj interparoli kun K-do, kiu jam de longe estas profesoro pri marksismo. Dum nia interparolo li demandis :

- Ĉu vi konas persone la aŭtoron de tiu serio da artikoloj, aperintaj en "Esperantista Laboristo" kun la titolo : "For la Neŭtralismon!" kaj subskribitaj "Sennaciulo" ?

Aplombe mi respondis, ke ne. Kaj por trankviliĝi mian konsciencon, mi diris al mi : nur saĝuloj ja konas sin mem.

- Almenaŭ mi estas certa, ke li estas marksisto, aldiris mia interparolanto.

Verdire, kiam mi aŭdis tiujn vortojn, mia surprizo estis granda. Tiutempe mi eble jam ne estis leginta eĉ "La Komunistan Manifeston". Ĝis tiam la socipolitikaj aŭtoroj, kun kies verkoj mi konatiĝis, estis Bakunin, Kropotkin, Reklu, Grav k.a. anarkistaj teoriuloj. Forpasis relative multaj jaroj. La tutan verkaron de Marks mi funde ne studis ; tamen el ĝi kaj pri ĝi mi legis multon. Malgraŭ tio mi ne kuraĝus diri, ke mi estas marksisto. Tion mi tute ne scias kaj eĉ ne deziras scii. Starigante soci-politikan demandon, neniam mi ekhavas la penson traserĉi en la verkoj de Marks por trovi respondon. Mi havas la konvinkon, ke neniu el la plej kompetentaj komentistoj de Marks povas prave havi la pretendon scii, kiuj estus la pensoj, la sinteno de ilia majstro antaŭ nuntempaj problemoj.

(*)"Sennaciulo" de 25.5.1933.

Sendube estas interese scii precize, kiel okazas la ekspluatprocezo de la kapitalo super la laboro. Tion montris Marks tre klare. Sed tia scio ŝajnas al mi nur flanka afero. Koni la kaŭzojn de malsano ne ĉiam sufiĉas por resanigi pacienton. Doni bonan recepton povas esti tute vana afero, se la malsanulo ne scias, ne povas aŭ ne emas apliki ĝin. La persona, sugesta influo de kuracisto povas iafoje pli efiki ol medikamento. En la vivo de l'socioj psikologiaj faktoroj, senpezaj fortoj ankaŭ ludas gravan rolon. Eĉ en ĥemia komponaĵo katalizaj fenomenoj estas necesaj por ĝin modifi. Ĉu Marks, kaj ĉefe la t.n. marksistoj, taksas sufiĉe alte tiajn faktorojn ? Mi emas kredi, ke ne. La klarigoj, kiujn ekzemple ili donas pri la lastatempaj okazintaĵoj en Germanio, ŝajnas al mi tute ne sufiĉaj, ne konvinkaj.

En la antaŭparolo al "Naciismo" mi parolis pri la forto de ideoj kaj la Hitlera movado tre bone pravigas kaj ilustras tiun vidpunkton. En Germanio la socialisma ideo jam forte penetris en la mensojn de l'proletaro ; sed la naciismo restis tamen tre forta, tial ke neniu partio penadis ĝisradike detrui tiun ideon per laŭcelaj rimedoj. Sufiĉis do al lerta demagogo kunigi tiujn du ideojn (naciismo kaj socialismo) por starigi movadon, kiu donis al li la regadon super la lando.

Sed ne estas mia intenco pritrakti nun tiun temon. Mi celas nur altiri denove la atenton de la SAT-anoj al tio, ke estas ĉiam danĝere akcepti iun ajn teorion, doktrinon senkomprene, blinde, fide al ĝiaj komentistoj. Tia akcepto signas ĉe la ano religieman spiritostaton. Kiam homoj sin demandas unue, ĉu ĉi tio aŭ tio konformas aŭ ne kun iu doktrino, anstataŭ senantaŭjuĝe esplori la realaĵon, la krudajn faktojn, tio estas signo de spirita malviglo kaj kondukas neeviteble al starigo de nova religio kun novaj pastro-komentistoj. Ekzemple, kiam sovetiaj teoriemuloj komencis cerbumi por doni marksisman pravigon pri la ekzisto de esp-o, estas nekredeble, kiom da sensencaĵoj ili eldiris, kiom da ridindaj skolastikaĵoj ili elpensis...

Ĉe la VIII-a Kongreso de SAT, kiun partoprenis pluraj sovetiaj K-doj, la SAT-anoj agis tre saĝe, akceptante unuanime aldonon al nia Statuto, laŭ kiu ni ĉiuj devas zorgi, ke niaj opinioj neniam fariĝu nediskuteblaj dogmoj.

Se la marksismo difinis ĝuste la vojon, kiun nepre sekvos la homa socio, la venko de Hitler povas esti nur nelongdaŭra. Lia fajra detruado al la marksistaj libroj estas do tute vana entrepreno. Sed, sammotive, ne multe helpas al la sukceso de l'marksismo la aserto, ke ĝi estas la vero, la sola, kiu devas esti oficiale kaj devige encerbigata...

Sur la propagandiloj, kiujn ni eldonis antaŭ dektri jaroj, mi relegas interalie jenon :

"La ideala socio ne devenos tute preta el Revolucio, kiun kelkiuj prezentas al si kiel panaceon. Estas do nepre necese sin prepari, sin ekzercadi al la tasko de mondcivitanoj, forigante el si mem la nenaturajn naciecojn, kiujn la ŝtata, enlanda edukado metis dum nia infanaĝo en niajn kapon kaj koron. SAT celas kutimigi sian anaron al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo. Ĝi zorgas pri la kreado de spiritostato, kiu harmonios kun la estonta socio, kiam la perforto nuna, la ekonomiaj, lingvaj kaj ŝtataj limoj ne plu ekzistos. SAT celas krei sennaciecan popolon."

Mi ne scias, ĉu tiuj diroj estas aŭ ne marksistaj. Skribante ilin, tiam mi tamen estis bolŝeviko, ĉar partia membro-karto kuŝis en mia poŝo ; tiam miaj sampartianoj ne malaprobis tian "idealismon". Ĝi ne ankoraŭ fariĝis herezaĵo. Hodiaŭ, rigardante al la disigita laborista movado, certe neniu asertos, ke tia stato estas la rezulto de troa idealismo : ĉie regas suspekto, malamo, fanatiko, mensogo, fratbatalo. Tial, pretiĝante forlasi la gvidpostenon, mi emas memorigi al la K-doj la principojn, kiuj ekde la komenco signis al ni la vojon. Miaopinie, ili restas same taŭgaj hodiaŭ ; ili certigis la sukceson de SAT dum multaj jaroj kaj nur kiam fanatikuloj kaj "realistoj" volis ignori ilin, venis la disiĝo kaj malprospero.

Al tiuj, kiuj sin nomas marksistoj, mi volas memorigi,

ke iun tagon, aŭdinte, ke ekzistas "marksistoj", Marks mem pikparole eldiris : "Mi almenaŭ ne estas marksisto!.." La genia aŭtoro de "La Kapitalo" sendube jam ĉagreniĝe antaŭvidis, ke liaj instruoj fariĝos por kelkaj el liaj disĉiploj dogmaj, senvivaj parkeraĵoj.

E.L.

Principoj de unueco (*)

****

Jam de kelka tempo oni diskutas en lab. esp-aj gazetoj pri kunigo de ĉiuj proletaj esp-istoj en unu solan organizon. Al tia demando certe rilatas simpatie ĉiu sincera K-do. Sekve, ni ĉiuj devas bone pripensi la aferon, cerbumi por trovi la plej facile ireblan vojon kaj tiucele difini la gvidprincipojn, kiuj donu la ĝustan orientadon kaj certigu eviton de erarpaŝoj.

Por pristudi tiun problemon, ĉu ni staru ĉe pure abstrakta pozicio ? Aŭ ĉu ni prikonsideru la faktojn tiaj, kiaj ili estas, la realaĵon sub ĝia kruda aspekto ? Ĉiu certe konsentos, ke la lasta vidpunkto estas la sole taŭga.

Larĝtrajte, unueco ekzistis pere de SAT ĝis la jaro 1930. Kial ĝi rompiĝis ? Ĉu la principoj metitaj en la Statuton de la Asocio estis ne ĝustaj, ne celkonformaj ? Al tiuj demandoj mi respondos, paroligante faktojn. Ĉiu persono, kiu volos esplori senpasie kaj serioze la historion de nia movado, helpante sin per la dokumentoj, troveblaj en protokoloj de kongresoj aŭ aliaj presaĵoj, nepre alvenos al sama konkludo kiel la mia.

Sed antaŭ ol komenci tiun esploradon, mi opinias necese atentigi la legantojn, ke mi ne havas respondecon en la gvidado de SAT-kaj sekve parolas nur en mia propra nomo. Eble la nuna Plenum-Komitato aliel prezentas al si la problemon... Mi ne havas alian celon, alian deziron ol helpi al Gek-doj prijuĝi mem la demandon.

I.

La unua principo, kiu direktis ĉe la fondo de SAT estis, ke necesas apartigi laŭklase la esperantan movadon ; ke tia apartigo estas necesa en la intereso mem de l'tuta esp-a movado. En la tri eldonoj de "For la Neŭtralismon!" oni ja povas legi :

(*) "Sennaciulo" de 25.2.1935.

"Kiam esp-o sukcesas en burĝaj rondoj, mi kompreneble ĝojas. Konvinkita mi estas, ke universala lingvo entenas econ revoluciigan. Samkiel cetere ĉio scienca : Internaciismo estus ja nur revo, se ne ekzistus fervojoj, telegrafo, aviadiloj ktp. Vole nevole la scienculoj laboras por tutmonda revolucio..."

Al tio konsentis ĉiuj SAT-anoj. Neniam do temis ĝeni aŭ detrui la neŭtralan movadon. Tamen iu persono, kiu ĉe la fondo de SAT ne tuj aliĝis kaj dume preferis koketi kun neŭtraluloj, konigis siajn sekretajn pensojn en novembro 1929. Senbrida komandemo kaj regemo montriĝas en jena cito, ĉerpita el la n-ro 1 de "Kunligilo", konfidenca bulteno, kiun ricevis, en la tempo de l'preparo al la skismo, nur la anoj de la Komunista Frakcio, kaj kiu venis en miajn manojn per iu mistera vojo :

"Fakte por ni SAT estis ĝis nun valora de du vidpunktoj : 1) kiel movado frakasanta kaj iom post iom per si anstataŭanta la neŭtralan movadon esp-an kaj 2) kiel asocio prezentanta certajn eblojn doni informojn pri la lab. kaj la klasbatala movado al la SAT-anoj kaj per ilia helpo al la laboristoj-proletoj diverslandaj.

"La klasbatalaj esp-istoj kaj intelektaj fortoj per ili reprezentataj estas jam nun sufiĉe maturaj por povi ankaŭ memstare, sen interveno de politike senforma asocio simila al SAT, daŭrigi la laboron de la frakasado kaj anstataŭado de neŭtrala movado..."

Parolinte poste pri "fals-Marksista gvidado de SAT" kaj pri "fuŝa oportunisma filozofado", la konspiranto daŭrigas :

"Se tiu fuŝado oportunisma daŭros kaj se ni ne povos en la kadroj de SAT ĝin malhelpi, tiam nature ni devos konstati, ke SAT perdas por ni ĉian valoron..., ke ĉiuj klaskonsciaj kaj klasbatalpretaj revolucianoj devas foriri el SAT kaj serĉi novajn vojojn por efektivigi sian revolucian agitpropagandan peresperantan laboron inter la laboristoj diverslandaj."

Tiu ridinda pretendo kaj maldelikata ruzo estas

anonime esprimitaj. Sed mi timas neniun dementon, asertante, ke ili estas de E. Drezen, kiu iniciatis kaj gvidis la tutan skisman entreprenon en nia movado.

Ni do notu bone en la memoron, ke jam en la jaro 1929 ekzistis sekreta organizo celanta : 1) Trudi al SAT taskojn, kiujn ĝi neniam havis antaŭe ; 2) tiucele kapti ĝian gvidadon ; 3) en okazo de malsukceso fari skismon. Se la spaco permesus, mi povus liveri pri tio multajn aliajn pruvojn, ĉerpitajn el la 9 n-roj de "Kunligilo", kiujn mi posedas kaj konservas por plene informi eventuale personojn, kiuj havas en tio intereson.

II.

La dua principo, kiu ĉiam havis la unuaniman aprobon en ĉiuj niaj kongresoj, estas eldirita en la gvidrezolucio, voĉdonita ĉe la fondkongreso de SAT en Praha :

"Konsiderante : a) ke la ĉefa tasko de nia Asocio povas neniel esti politika, ĉar jam ekzistas klasbatalaj organizoj ; b) ke samkiel antaŭ 20 aŭ 30 jaroj estis nepre necese, ke ĉiuj praktikantoj de esp-o - ĉu pastroj, ĉu anarkistoj, ĉu policanoj - ariĝu por montri per faktoj, ke artefarita lingvo povas esti uzata en la praktiko, estas nun necese, ke ĉiuj esp-istoj, anoj de diversaj klasbatalaj organizoj, ariĝu en unu solan Asocion por montri al la proletaro, per imponaj faktoj, kiom utilega estas esp-o por la batalo kontraŭ la kapitalisma sistemo."

Kiaj estu tiuj "imponaj faktoj", kiuj konvinku la proletaron pri la utilego de esp-o ? Ili povas esti nur jenaj : kongresoj, ampleksaj kaj ofte aperantaj gazetoj, abunda kaj valora literaturo, informaparato liveranta sciigojn al lab. nacilingvaj gazetoj, praktikaj servoj inter la esp-istoj.

Ĉion tion provis plenumi SAT kaj kelkrilate ĝi sukcesis : okazis ja ĉiujare impona kongreso kaj "S-ulo" estis antaŭ la skismo 12-paĝa, semajna, kaj publikigis la materialon de informaparato en la rubriko : "Esperanta Servo".

III.

La tria principo estas, ke por la prosperigo al nia movado, ĝi devas esti dufaka : 1) poresp-a (LEA-oj) ; 2) peresp-a (SAT) kaj ke mondlingvanoj nenial devas organiziĝi internacie, sed sennaciece.

Kiam oni vidas, ke la naciismo venke antaŭeniras ĉie en la mondo ; kiam oni ĉagrene konstatas, ke unu post la alia naciaj sekcioj de diversaj Internacioj fiaskas en sia laboro kaj malaperas antaŭ la faŝismo, ŝajnas al mi tute superflue argumentadi por montri la pravon de tiu lasta principo...

***

Tiuj tri principoj estas tute klare eldiritaj en la Statuto de SAT, kiu estis referendume akceptata de grandega plimulto. Tamen okazis skismo. Ĉu pro maltaŭgeco de la Statuto ? Ĉu pro malobeo al ĝi ? La faktoj parolu : Kiel ni vidis, nia Asocio ne havas politikajn taskojn kaj ĉiuj tendencoj povas esti en ĝi reprezentataj. Kontraste, en la Statuto de IPE ni trovas :

"...b) unuigas, organizas kaj gvidas ĉiujn proletajn esperanto-organizojn kaj esperantistojn sur bazo de la revolucia klasbatalo, de la dialektika materialismo, de proleta internaciismo."

Kion signifas tio ? Tio signifas tute klare, ke la anarkistoj, sindikatistoj, ISK-anoj k.a. kiuj ne riverencas senrezerve antaŭ la dialektika materialismo, ne povas havi lokon en IPE. Kaj en la gvidrezolucio, akceptita ĉe la fondkongreso de la skisma organizo, oni legas interalie jenon :

"7. IPE plej akre plu batalos kiel kontraŭ oportunisma sennaciismo, tiel ankaŭ kontraŭ la reformisma ideologio de la socialdemokratio, subtenantaj la imperialismajn rabadojn kaj militojn, kiuj plenumas la taskon deteni la laboristojn de klasbatalo kaj malhelpi la efektiviĝon de la ruĝa unueca fronto."

Nu, ankaŭ sennaciistoj kaj socialdemokratoj devas stari ekster IPE.

Sed iu povus argumenti jene : la grandega plimulto de la organizitaj laboristoj akceptas la dialektikan materialismon kaj pro tio nur ĝi povas konsistigi la larĝan konstruan bazon por nia movado. Feliĉe tia sofismo estas okulfrape videbla. La sperto ja instruas, ke la anoj de tiu marksisma doktrino eĉ ne konsentas inter si pri ĝia apliko. Ekzistas diversaj skoloj, kiuj pretendas pli bone unuj ol la aliaj kompreni kaj instrui tiun teorion. Sufiĉas mencii la nomojn de Kaŭcki, de Stalin, de Trocki por ke oni tuj konsentu pri mia diro. Kaj lastatempe, la eksprezidanto de Komintern, Zinovjev, estis sendata en malliberejon por tie lerni dum 10 jaroj la ĝustan komprenon pri apliko de marksismaj principoj...

Ekrigardante super la historion de la lab. movado, oni ekvidas, ke en ĝi estis senĉesa dissplitiĝo, rekuniĝo, denove skismiĝo ktp. Sekve, se oni volas sincere kaj prudente difini la principojn, kiuj ebligu al ĉiuj lab. esp-istoj senescepte kuniĝi en saman organizon kaj tie daŭre kunlabori, la unua kondiĉo estas rifuzi kiel oficialan, iun ajn apartan vidpunkton de iu ajn el la nun ekzistantaj organizoj. Tial ke nia movado ne povas, kaj sekve ne devas, ludi politikan rolon, plenumi pure politikajn taskojn, estus ja tute malsaĝe trudi al ĝi iun ajn soci-politikan programon.

Kiuj parolas pri unueco kaj pli malpli kaŝe pretendas trudi la vidpunkton de sia propra partio, tiuj ne parolas sincere, se ili estas inteligentaj. Se ili estas sinceraj, fanatiko blindigas ilin. Ambaŭkaze tiaj predikantoj pri unueco estas neniel atentindaj...

* * *

El tiu rapida ekzameno super la problemo vidiĝas klare, ke la principoj, laŭ kiuj fondiĝis SAT, antaŭ 14 jaroj, estas la sole ĝustaj kaj ke la skismo, okazinta en nia movado, rezultas de tio, ke tiujn principojn forgesis, malatentis aŭ konscie malobeis parto el niaj Gek-doj. Pri la konscia malobeo, pri la decida intenco rompi nian unuecon, ni cetere trovas pruvon, cinike konfesitan, en

la n-ro 44 de "Internaciisto", julio 1932:

"Kun ĉiu tago pli klariĝas la neeblo, konservi iujn mezajn poziciojn inter la reakcia burĝaro kaj la batalanta por sia liberiĝo proletaro. En tia situacio estiĝas tute komprenebla la fakto, ke ankaŭ la proleta esperantistaro rompas decidoplene ne nur kun la neŭtrala, fakte burĝa esperanta movado, sed ankaŭ kun la nebulecaj, fakte oportunistaj, malklasbatalaj ideoj de supernacia kaj supertendenca SAT.

"Se tio ne okazus, la proleta esperantistaro ne meritus la nomon proleta kaj la tuta "proletesperantismo" devus esti konsiderata kiel tromplogilo por laboristoj, certacele utiligata de la burĝaro. La skismo en SAT, la apartiĝo de la revoluciaj elementoj for de la elementoj oportunistaj kaj renegatrevizionistaj estis necesa kaj antaŭdifinita deper la tuta logiko de la disvolviĝantaj sociaj interbataloj." (La substreko estas nia.)

La supra skisma deklaro estas subskribita E. Drezen kaj destinita al la unua kongreso de IPE. Kion li sekrete diris en la konfidenca "Kunligilo" du jarojn antaŭe, tion li malkaŝe konfesas, kiam la delonge preparita skismo estas efektivigita... Tiaj estas la faktoj, kiujn mi ne volas komenti, ĉar eble bonanimaj personoj dirus, ke mi parolas pasie.

- Nu, flustras al mi en la orelon iu el tiuj naivaj, kredemaj homoj, kiuj nepre volas trovi pravigon al la plej fiaj kaj malsaĝaj faroj, vi mem faris skismon en la esp-a movado, kriante : "For la Neŭtralismon!" Ĉu do ne estas ĝuste opinii, ke 10 jarojn post la fondo de SAT venis ankaŭ la tempo por fari similan rompon en nia movado ?

Por montri la senvalorecon de tiu argumento, mi faros nur du rimarkigojn kaj kelkajn mallongajn citojn : 1) Hodiaŭ, kiel antaŭ 14 jaroj, mi havas la konvinkon, ke laŭklasa apartigo de la movado estas necesa, kaj sekve nun ne parolas pri rekunigo de la burĝa kaj proleta movadoj. 2) La sperto montris, ke SAT estas vivkaj laborkapabla.

Kaj nun ni aŭskultu la konfesojn, faritajn ĉe la lasta kongreso - pardonu ! mi eraras, temas nur pri "konferenco"- de IPE. Kiel mi diris komence, nur la faktoj kvazaŭ parolu. Sed por ke ili estu tute klare kompreneblaj, necesas antaŭe memorigi, ke la skismigintoj celis frakasi la neŭtralan movadon kaj detrui SAT-on. Tiucele estis starigitaj IPE kaj ISLK (Internacia Sekretariaro de la Lingvo-komisionoj):

"Ĉu hodiaŭ ni kapablas grandskale entrepreni la organizadon de kolektiva korespondado ? Certe ne ! La lingvonivelo de IPE-membraro estas hontinde malalta ; tiom, ke nur etan frakcion de la tuta anaro ni povas taksi tradukkapablaj."

. . . . . .

"En "Sur Posteno" estas pli da enigmoj ol troviĝas sur la dorsa paĝo." (Estas delikata maniero de la aŭtoro por diri, ke la IPE-gazeto estas fuŝredaktata.)

. . . . . .

"La fakto, ke ekzistas tia aferstato en la lingvo-kampo, per si mem pruvas ke ISKL plene fiaskis en sia laboro."

. . . . . .

"Kelkaj montras kontraŭstaron al Plena Vortaro, dirante, ke ĝi havas multajn mankojn. Tion mi povas konsenti. (Verŝajne la K-do parolas pri la unua eldono. E.L.), sed ni konstatas ankaŭ, ke ĝis nun ĝi estas la sole taŭga kaj uzinda verko por nia celo... kaj la konferenco sagace agis, decidante, ke la Plena Vortaro estu provizore la akceptita vortaro de IPE..."

Jack Kane, Sekretario, LK por
BLEA "Sur Posteno", n-ro 26,
oktobro 1934.

Ĉu tiu konfeso de honesta, sed trompita K-do ne pruvas plej evidente, ke la tuta skisma entrepreno de la fondintoj de IPE estis nur detrua kaj malutila al la tuta esp-a movado ? Trompo, blufo kaj ŝtelo ne konsistigas bazon por starigi fortan, labor- kaj vivkapablan organizon. La estonto pli kaj pli montros la pravon de mia aserto...

Oni povas rigardi ĉiujn flankojn de l'problemo kaj vidiĝos, ke por ebligi kaj certigi unuecon en nia movado, ne

ekzistas aliaj principoj, ol tiuj, kiujn alprenis la fondintoj de SAT - kaj kiuj estis aprobataj dum preskaŭ dek jaroj de plej diverstendencaj Gek-doj. Kiuj deziras sincere la kuniĝon de ĉiuj lab. esp-istoj en unu solan organizon, tiuj devas agnoski tiujn principojn kaj ilin obei.

Mi scias, ke oni povas starigi plurajn demandojn, rilate al la praktika funkciado de la Asocio. La eblo starigi sekciojn kaj politikajn frakciojn, kiuj rajtas uzi la aparaton de la ĝenerala organizo por siaj apartaj celoj, solvas kontentige multajn problemojn. Pri tio kaj pri multo alia la Legantoj trovos klarigojn en "La Laborista Esperantismo".

. . . . . .

Kiel jam dirite, mi parolas kiel simpla SAT-ano kaj tute ne celas ial ajn trudi mian propran vidpunkton. Neniu pensu, ke ĉi tiu skribaĵo signas ĉe mi deziron rehavi gvidan postenon en nia movado. Diablo kompatu !... Per ĉiuj revoluciaj sanktuloj, kies kadavrojn zorge konservas, respekteme honoras materialistaj piuloj, mi ĵuras, trifoje ĵuras ! ke tia penso ne povus naskiĝi en mia kapo. Tro granda estas mia ĝojo senti min libera herezadi laŭplaĉe !... Nenial mi povus refariĝi silenta pri kelkaj aferoj, kiel okazis dum pluraj jaroj en la intereso de la unueco...

E. Lanti.

DISKUTEJO

Peto al K-do E. Lanti
****

Nur nun venis en miajn manojn la interesa letero de K-do Lanti (aprila "S.R."). Pri ĝia enhavo mi havus nur laŭdon, se mi ne trovus en ĝi ion, kio (kvankam relative vera) povus naski miskomprenon kaj konfuziĝon. Tial mi faras ĉi-subajn rimarkojn, esperante ke la legantoj penos esplori, ĉu ili estas pravaj.

K-do L. konstatis, ke "ne sufiĉas - kvankam necesas - ke la popolo ĝuaĝu bonajn materiajn vivkondiĉojn, por ke ĝi leviĝu al kulturo." Iom poste li skribas : "certe estas granda eraro kredi, ke la ekonomiaj kondiĉoj determinas la spiritostaton de l'homo". Por pruvi, ke li (Lanti) pravas, li komparas la japanojn kun la aŭstralianoj. La unuaj vivas sub multe pli malbonaj ekonomiaj cirkonstancoj, ol tiuj sub kiuj vivas la lastnomitaj, kvankam la aŭstralianoj atingis malpli altan kulturnivelon, ol la japanoj. Tio ĉi do evidente kontraŭdiras la "marksisman kredon", ke la ekonomiaj kondiĉoj naskas la spiritostaton de l'homo. Nu, en tiu ĉi aserto kuŝas la ĝermo de eventuala miskompreno kaj konfuziĝo. Ĝi estas eraro, kiun jam faris multaj marksistoj kaj antimarksistoj.

Kion do Marks celis diri per sia tezo : La socia pozicio determinas la spiritostaton de l'homo ? Ĉu tion, ke nur la socia situacio, la ekonomiaj cirkonstancoj, en kiuj vivas la homo, kreas tiun spiritostaton ? Certe ne! Ankaŭ Marks kaj Engels tre bone konsciis la fakton, ke ankaŭ aliaj faktoroj ludas en tio gravan rolon. Ekzemple,

tradicio, naciaj kulturnivelo, religio, kutimoj kaj moroj. Ili kune formas iun spiritostaton de l'homo ; ne nur la ekonomiaj cirkonstancoj. Bonan ateston pri tio donas al ni la marksisto L. de Jong en sia verko "Nuntempa Marksismo". Li demandas al ni : "pro kio la katolikaj laboristoj tute aliel opinias pri la hispana milito, ol ni, socialistoj ?" Kaj tiukoncerne li atentigas nin pri la influo de l'tradicio kaj religia edukado, kiuj ankaŭ - kaj grave - determinas ies spiritostaton. Oni do estu singarda, rilate al la tezoj, kiujn Marks kaj Engels fiksis en sia verkaro. Ili ne estas absolutaj veroj, ĉar absoluta vero ne ekzistas !

Alia eraro, kiun precipe antimarksistoj jam ofte faris, estas diri ke Marks malpravis, kiam li skribis: "la kapitaloj konstante kreskos, kaj aliĝos en la manojn de ade etiĝanta aro da kapitalistoj". Tiun tezon oni interpretas tiel, ke finfine do unu kapitalisto disponos pri la kapitalo, sekve nur tiu unuopulo finfine estos la sola reprezentanto de la kapit. sistemo...! Estas ja tre evidente, ke tion Marks ne celis aserti. Li parolis nur pri difinitaj tendencoj en la disvolvado de l'socio. Kaj ankaŭ lia tezo : "la ekonomiaj kondiĉoj determinas la spiritostaton de l'homo" estas nur tendenco, ne absoluta vero ! La fakto do, ke la aŭstraliaj laboristoj atingis malpli altan kulturnivelon ol tiu de la japanoj, pruvas ne, ke la "marksisma kredo" mistrafis, sed ke ankaŭ aliaj faktoroj ludas en tio gravan rolon. Se do K-do Lanti bonvolos nin informi pri tiuj aliaj faktoroj - historio, religio, familivivo, tradicio, politika regsistemo, tiel en Japanio, kiel en Aŭstralio, ni pli bone povos ekzameni tion : kio kune determinas la spiritostaton de l'homo. Samtempe ni tiam rigardu, ĉu la tezo de Marks estas erara, aŭ erare komprenata...

(Sennacieca Revuo, aŭgusto'38) Nieuwenhuizen, Hago.

***

Al tiu ĉi-supra vidpunkto E. Lanti rebatis en la januara numero de "S.R.", 1939, sub la titolo :

Ni bezonas marksistan papon
****

Kun intereso mi legis pri la "peto", kiun faris al mi K-do Nieuwenhuizen en la aŭg.-sept. n-ro de nia Revuo. Kaj mi danke notas, ke li ne suspektis, ke mi estas subaĉetita de Hitler aŭ de l'Japana registaro, pro tio ke mi ne konsentas cent-po-cente kun ĉio, kion diris la fama aŭtoro de l'Kapitalo...

Estas tre notinde, ke K-do N. rimarkigas en sia artikolo, ke eĉ marksistoj eraras, rilate al la ĝusta kompreno de l'penso de Marks. Cetere, ĉiu scias, ke la "marksisto" Kaŭcki ne interkonsentis kun la "marksisto" Lenin ; ke Stalin kaj Trocki akuzas sin reciproke pri "perfido al la marksismo" ; ke kompetenta kaj aŭtoritata "marksisto" kiel Buĥarin devis esti pafe elmondigita kune kun multaj aliaj "marksistoj", pioniroj de l'rusa revolucio kaj kunbatalintoj de Lenin, tial ke ili herezis, rilate la novan dogmaron.

Kiam oni konstatas, ke en la marksista mondo ne eblas atingi ĝeneralan interkonsenton pri la ĝusta senco de la instruo de l'Majstro, pri la senerara kompreno al lia vidpunkto, naskiĝas nepre en la cerbo la penso pri neceso de ia marksista papo.

En la katolika eklezio teologoj interdisputis dum kelkaj jarcentoj pri diversaj punktoj de l'dogmaro, ĝis en la jaro 1870 finfine koncilio decidis, ke la papo estas dogme neerarpova. Ortodoksa katoliko firme kredas, ke la Estro de sia Eklezio ricevas inspiron de Dio mem, kiam temas decidi pri dogmaj aferoj.

Bedaŭrinde ĝis nun neniu kongreso de Komintern decidis, ke pri la ĝusta interpreto de l'Marksa penso kompetentas nur unu sola homo. Tamen, praktike, Stalin iel ludas la

rolon de papo kaj eble iun belan tagon la tuta mondo mire ekscios, ke la spirito de Marks ne mortis kun lia korpo, sed ke ĝi daŭre vivas kaj ke Stalin telepatie komunikas kun ĝi. Tiam ni povos pridiskuti la "veran" penson de la plej aŭtoritata fondinto de la Unua Internacio. Dume ni ĉiuj restas en granda embaraso kaj mi dubas, ĉu L. de Jong, la aŭtoro de l'verko "Nuntempa Marksismo", povos akiri sufiĉan aŭtoritaton por ke lia interpreto pri tiu doktrino estu konsiderata kiel la sole ĝusta.

***

Rilate al la parto el mia letero, kiun kritikis K-do N., kiam mi verkis ĝin, tiam mi pensis pri jenaj eldiroj de Marks kaj Engels :

"Ne la konscio de l'homoj determinas ilian staton, sed male ilia socia stato determinas ilian konscion." (K. Marks, Al la Kritiko de l'Politika Ekonomio, Antaŭparolo).

"La determinantaj kaŭzoj de tiu aŭ alia socia metamorfozo aŭ revolucio ne devas esti serĉataj en la kapoj de l'homoj, sed en la metamorfozoj de l'produktado kaj de la interŝanĝado." (F. Engels, La Revolucio de l' Scienco, de s-ro Diring /Dühring).

Se tiuj frazoj ne estas simpla ĵonglado per vortoj, ŝajnas al mi evidente, ke la aŭtoroj de La Komunista Manifesto opiniis, ke la Ekonomio *) determinas la politikajn, jurajn, religiajn, filozofiajn formojn, unuvorte, ĉiujn aspektojn de la intelekta kaj morala vivo. Tial mi pensis, ke estas utile substreki la fakton, ke la aŭstraliaj laboristoj havas ĝenerale malaltan kulturnivelon, kvankam ili vivas en relative bonaj ekonomiaj kondiĉoj.

Sed mi ne dubas, ke lerta dialektulo (°) povus verki dikan libron por pruvi, teze, antiteze kaj sinteze **), ke en

---

*)Mi uzas ĉi tiun terminon laŭ la senco 3a en P.V. : situacio de institucio aŭ regno laŭ vidpunkto de riĉo kaj materia prospero.

**)La fama dialektiko Hegela, kiun aplikis Marks kaj

(°) tiel! - verŝajne = dialektikulo (N.d.l.komp.)

tiu mia konstato la kontraŭdiro al la Historia Materialismo estas nur ŝajna. La sama ankaŭ"pruvus" facillange, ke ne ekzistas reala kontraŭdiro al la Marksa teorio en tiu fakto, ke proletdevena homo, Hitler, sukcesis starigi potencan movadon, kiu detruis la komunistajn kaj socialistajn organizojn en lando, kie ekzistis la objektivaj kondiĉoj, antaŭdifinitaj de Marks, por la starigo de socialisma socio. Similan rimarkon oni povas fari rilate al tiu nemalpli signifa fakto, ke Lenin, Trocki, Buĥarin k.a. burĝdevenaj bolŝevistoj sukcesis kapti la regadon en lando, kie la menciitaj kondiĉoj tute ne ekzistis.

Sed mi mem ne estas tiel lerta dialektikulo - aŭ harfendemulo - por povi akordigi tiajn faktojn kun la teorio de Marks. Dum ili ŝajnas al mi facile klarigeblaj per la forto de ideoj. En nia epoko la plej potenca kaj efika ideo-forto estas nekontraŭdireble la naciismo. Se aliflanke oni konsideras, ke la germana laboristaro estis forte saturita per socialisma ideologio, kies konsista parto, la internaciismo, ne funde, esence kontraŭis al la naciismo, aperas klare, ke Hitler bezonis nur kunligi la du ideojn per sia naci-socialismo por starigi mirinde fortan movadon.

En la cara, aŭtokrata imperio, konsistanta el pli ol cent diversaj popoloj, la naciismo ne profunde enradikiĝis kaj ne povis tie esti konsiderata kiel potenca ideoforto. Aliparte, la aristokrata reganta klaso jam estis rapide perdanta sian spiritan forton, kiam eksplodis la milito, kaj la malvenkoj de la caraj armeoj donis al ĝi la lastan baton. Tiel estiĝis favora stato, tre bona grundo por la dissemado de la demokratia ideologio. Necesas ne forgesi, ke en Rusio la revolucio venkis kun

---

Engels, estas nur vorta ĵonglado, kiu eĉ ne havas la econ esti io vere nova, originala. Fakte ĝi estas nur kruda aliiĝo de l'pli profunda kaj subtila koncepto de Heraklito, kiu vivis 400 jarojn antaŭ J.K. La antikva filozofio greka ja instruis pri eterna aliiĝo de la aĵoj, pri la kunekzisto de kontraŭaĵoj ktp.

la agitvortoj : "La tutan regadon al la Sovetoj!". Origine la soveta regsistemo estis ja eĉ pli demokratia ol tiu jam delonge funkcianta en Britio, Francio, Usono k.a. kapitalistaj landoj.

Sed tiam en Rusio inter la burĝdevena intelektularo ekzistis konsiderinda nombro da teoriuloj kaj "profesiaj" agitistoj, kies menso estis saturita de alia ideologio : la marksismo. Inter ili la plej agemaj estis la bolŝevistoj, kiuj organiziĝis en partio kun "fera disciplino" (kion poste Musolini kaj Hitler sukcese imitis). Armitaj per ideologio kun scienca etiketo (Marksistoj kutimas nomi sian doktrinon "scienca socialismo"), bone organizitaj kaj lerte gvidataj de Lenin, ili sukcesis bonuzi eksterordinare favorajn cirkonstancojn por kapti la regadon super vasta mondparto. En tiu okazo la marksismo efikis kiel ideologio, simile kiel la naci-socialismo en Germanio.

Sendube estas superflue diri, ke miaopinie ne ekzistas socialismo en Germanio, nek en la lando antifraze nomita Sovetio. Sed tio estas alia demando, kiu staras ekster la temo, kiun mi nun traktas. Mi celas nur montri, ke Ideologio estas forto, efikanta forto en difinitaj cirkonstancoj.

Tio neniel signifas, ke la Ekonomio estas malatentinda. Estus simila eraro al tiu, kiu konsistas el malatento aŭ subtakso al la ideoj. Ideologio povas efiki nur en iaj favoraj kondiĉoj. Kaj la Ekonomio kondiĉas, ne kaŭzas, la agadon de l'homoj, tial ke ili agas nur se en ilia cerbo naskiĝis la ideoj, kiuj instigas al la agado.

Laŭ tio, kion diris K-do N. pri la verko de L. de Jong, mi supozas, ke tiu aŭtoro ne estas tre ortodoksa marksisto, rilate al la Moskva konfesio. Sekve, povas esti, ke mi ĝenerale povus konsenti kun lia vidpunkto. Mi eĉ emas kredi, ke se Marks vivus, li mem konsentus, ke la eventoj ne tute pravigis lian teorion kaj verŝajne li ĝin revizus. Sed pri tio estus tute senutile diskutadi. Se Jezuo Kristo (supoze ke li efektive iam vivis, kio ne havas ĉiesan konsenton) revenus sur la teron, li certe ankaŭ ne konsentus kun la kristanismo, kiel ĝi

estas klarigata kaj mastrumata de l'papo. Tamen, se oni volas kritiki la katolikismon, necesas prikonsideri ĝin en ĝia hodiaŭa formo, en ĝia reala, konkreta ekzisto. Same ni devas fari, rilate al la marksismo. Tiu doktrino ja estas devige kaj senkonkure instruata al 170 milionoj da homoj sur unu sesono de l'mondo. Kaj plie ekster Sovetio kelkaj milionoj da fervoraj adeptoj rigardas al Moskvo sammense kiel katolikoj al Romo...

La marksismo fariĝis en la praktiko nova dogmaro kaj ĝi jam havas siajn ekzegezistojn, kiuj disputas inter si. Espereble, iu venonta kongreso de Komintern, imite al la katolika koncilio el 1870, deklaros, ke pri dubaj punktoj decidas Stalin, la "patro de l'Sovetia popolo", la "tre amata gvidisto de l'mondproletaro" ktp. ks. Ni ja bezonas nepre marksistan papon, por ĉesigi la tedajn kaj senfinajn interdiskutojn pri la sole ĝusta interpreto al la doktrino de Marks.

Dume oni povas praktike konsideri, ke la "vera" marksismo estas tiu, kiu estas oficiale kaj devige instruata sur unu sesono de l'mondo kaj fervore propagandata per la naciaj sekcioj de Komintern.

***

Jam delonge mi observas la malvolviĝon de tiu nova dogmo kaj notas ties konsekvencojn. En Sovetio la arto kaj scienco estas "marksistaj". Al ĉio oni aplikas la dialektikan rezonmanieron Hegelan. Eĉ tajloroj devas "dialektike" tranĉi vestojn. Kaj kompreneble devis nepre okazi, ke ankaŭ la lingva demando fariĝu objekto de marksisma esploro. En la kajero tria (1932) de La Nova Etapo oni ja povas legi tezaron, kies enkonduko havas jenan titolon :"Marksisma Lingvoscienco turnas sin vizaĝe al la problemo pri lingvo internacia."

Estas iel bedaŭrinde, ke la esperanta gazetaro preskaŭ tute ignoris tiun ellaboraĵon. Se oni demandus min pri la kialo de tiu ignoro, mi vere ne scius kion respondi precize. Almenaŭ estas por mi klare, ke la Moskvaj "lingvoscienculoj" fiaskis en sia provo akordigi la movadon por artefarita lingvo kun la "marksleninisma lingvistiko",

kiu antaŭdiras la kunfandiĝon de l'naturaj lingvoj naciaj en unu solan.

Tial ke mi estas esperantisto, t.e. ano de artefarita lingvo, mi ofte ne povas deteni min kontraŭbatali la novan dogmaron, kiu povas nur ĝeni, bari al la antaŭeniro de nia movado. Proleta esperantisto devas nepre noti en la memoron la tre ĉagrenan fakton, ke post la apero de la menciita tezaro, la esperanto-movado en Sovetio ekdormis, pli kaj pli malvigliĝis, tiagrade, ke la sidejo de l'blufe vegetanta IPE devis translokiĝi el Leningrado al Londono.

Mi diris sufiĉe, por ke K-do N. kaj la legantoj de nia Revuo komprenu, kial mi ofte emas pafi sagon al teorio, kiun mi opinias ne nur erara, sed eĉ tre danĝera por nia mondlingva afero. Kaj se la Red. de "S.R." konsentos, volonte mi kritike konigos la esencon de l' Moskva tezaro, kies logika sekvo por esperanto en Sovetio rezultigis similan staton al tiu ekzistanta en Germanio.

Oni sendube rebatos al mi, ke inter la esperantistoj estas relative multaj marksistoj kaj sekve... Sed tio fakte pruvas nenion. Ne ĉiuj kristanoj estas katolikoj; tamen la Biblio estas sankta libro por ĉiuj tiuj kreduloj. Kaj oni povas facile konsenti, ke la forto de l' katolikismo, kompare al la aliaj kristanaj eklezioj, rezultas ĉefe de tio, ke ĝi havas papon. Simile al la katolikoj, la marksistoj, kiuj deziregas la triumfon de sia kredaro, devas do celkonforme ankaŭ konsenti, ke ili nepre bezonas ian papon...

Dume SAT restas laŭstatute sendogma organizo ; tial hodiaŭ mi riskis hereze paroli. Kaj se K-do N. havas apartan komprenon pri la Marksa doktrino, li bonvolu noti, ke miajn sagojn mi direktas nur al la dogmeca, papeca marksismo.

E.L.

Melburno, 18.10.38.

Pri la morto de Bubo
****

..... Malfacile mi povus klarigi la sentojn, kiujn vekis ĉe mi la legado super la "nekrologo", kiun verkis pri si mem nia priplorinda K-do Bubo. Jen mi sentis admiron pri lia kuraĝo, jen aprobon al lia kompreno pri nia stulta kaj krimplena epoko kaj jen ielan konsciencriproĉon...

Eble mi ja kulpas iomete pri la sinmortigo de tiu amiinda, fidinda, brava junulo. Mi nun memoras, ke foje mi ekskursis kun li dum tuta tago en la Arbaro de Fontenblo . Tiam mi havis la okazon eldiri al li mian pesimisman komprenon pri la vivo, kiu tro ofte aperas al mi kiel granda tragedi-farso. Verŝajne lin impresis forte jena mia diro : "...Nu, kiam mi ne plu trovos intereson en la farso, tiam verŝajne mi venos ĉi tien kaj faligos la kurtenon en iu densejo, kie mia kadavro putros sen ia ĝeno por la homoj kaj profite, bonfare al la insektoj, vulpoj k.a.s. bestoj, kiujn gastigas la arbaro..." Ni sidis sur arbotrunko, uragane faligita antaŭ kelkaj monatoj ; vesperiĝis ; la horizonto ruĝiĝis kaj poste bruniĝis ; ĉio estis silenta ; ambaŭ ni ankaŭ mutiĝis kaj enpensiĝis... Tiam for de mi estis la penso, ke tiu junulo, mia akompananto, mia kvazaŭa filo spirita tediĝos pli frue ol mi ĉe la tragedi-farso...

Post tiu ekskurso mi neniam plu havis la okazon revidi nian funebratan K-don. Sed post mia foriro el Francio kelkfoje ni interŝanĝis leterojn. En iu paperujo mi ĵus retrovis kaj sendas lian lastan (1.5.38); eble vi opinios, ke ĝi estas ial koniginda al la SAT-anaro. Kaj nun mi ja ĉagrene pensas, ke miaj skribaĵoj ne estis sufiĉe kuraĝigaj ; eble mi ŝercis, ironiis, kiam konvenus kun ega seriozo doni al tiu korp- kaj animmalsana kompatindulo vivinstigojn. Mi devus insiste diri, ke la vivo de konscia sennaciisto pli valoras ol tiu de dek mil internaciistoj, ol tiu de cent mil naciistoj, ol tiu de unu miliono da ŝovinistoj. Vi ja scias, ke miaopinie la internaciismo estas nur ia bremse haltigita naciismo kaj la ŝovinismo la logika kaj tute natura konsekvenco de l'naciismo. La tri ismoj signas nur gradojn de la sama malsano mensa : la patriotismo.

Mi devus nepre konvinki tiun sinceran sennaciiston, ke la epilepsio ne estas tiel terura malsano, kiel oni pensas unuavide. Eminentaj homoj estis epilepsiuloj ; tia eĉ estis Sankta Paŭlo, la fondinto de l'katolikismo. Mi ja tre bedaŭras, ke nia memoriginda K-do ne trovis en miaj leteroj sufiĉan instigon por vivi, por batali kaj spiti al la diverskoloraj registoj aŭ regaspirantoj. Prefere morti per la kuglo de patrioto ol sin mem mortigi. La devo de sennaciistoj estas provi saĝe vivi eĉ inter frenezuloj.

Sed nun iel konsole mi pensas, ke verŝajne nia kara Bubo estis tamen la viktimo de l'naciismo. En sia nekrologo li parolas pri amatino, kiu "longe hezitis kaj suferis", por liberiĝi el tradicia moro miljara. Sur la paĝo 60-a de "S-ulo" jenan frazon mi ruĝe substrekis : "Finfine pruviĝis ke, por ŝi, familiaj kaj religiaj sentoj pli inkrustiĝis ol homaranismo. Tre, tre doloriga konstato..."

Ĉu vi scias, ke la aludita persono estas judino ? El tio evidentiĝas, ke la juda naciismo, kies konsisto estas rasa kaj religia, latente estas same malbonfara kiel ĉiu ajn alia kaj pro tio ankaŭ kontraŭbatalinda. La juda nacirasismo ne estas nun danĝera; sed en la Biblio mem ni povas trovi, ke kiam judoj akiris la regadon, tiam el persekutatoj ili facile fariĝas persekutantoj. La ĉapitro pri Ester atestas pri tio.

Mi volas konvinkiĝi, ke Bubo estas viktimo de l'naciismo. Kaj en tiu fakto mi trovas plian motivon, por senindulge kontraŭbatali tian peston. Pro la nuntempa persekuto al la judoj en Hitlerio, mi scias, ke estas maloportune eldiri publike kion mi pensas pri judismo ; tamen mi rajtigas vin uzi mian leteron laŭ via bontrovo. Mi abomenas la Hitleran rasismon, sed tio ne estas kaŭzo por ŝati la judan...

Dume mi ne ŝanĝas mian koncepton pri la vivo, nome,ke ĝi estas granda tragedi-farso.

..... E. LANTI.

(El letero de Lanti en Bonaero, 8.7.1939, kaj aperinta en "Sennaciulo" de sept.-okt. 1939).

TRO PLENA GRAMATIKO...

Plena titolo : "Tro Plena Gramatiko k ne sufiĉe Plena Vortaro".
Tiu ĉi verkaĵo aperis en "Sennacieca Revuo" de majo 1939. La pritraktita libro estas :
Dr. K. Kalocsay - G. Waringhien : PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO, kun detala komentario pri Vorto kaj Frazo. II-a Tralaborita eldono. Eldonis : Literatura Mondo, BUDAPEST, 1938.

En la esperanta movado svarmas homoj, kiujn ĉefe interesas la lingva flanko de la afero. Multaj estas poliglotoj kaj la lernado de artefarita lingvo estis por ili nur okazo por kontentigi sian apartan lingvolernemon. Tiel mi klarigas al mi la fakton, ke tiu ĉi verko aperis en dua "tralaborita" eldono. La tralaborado postulis 118 pliajn paĝojn.

Sengale mi diras, ke la Red. de nia Revuo faris malspritan ŝercon al mi, sendante tiun dikan volumon, tiun pezan verkon por recenzi. Senhonte mi konfesas, ke neniam mi havis sufiĉe da kuraĝo por tutlegi la ekzempleron de la unua eldono, kiun mi posedis. Sed la recenzotan mi konsideris kiel devon legadi ĝis la lasta paĝo. Longan tempon mi bezonis. Tre ofte mi kaptis ian ajn pretekston por formeti la volumon, kies legado donis al mi kapdoloron. Finfine mi atingis la lastan paĝon kaj do provos nun laŭdeve trarecenzi la... "tralaboritan eldonon".

Por esti tute sincera, mi almenaŭ tuj deklaros, ke mi kontente faris du tre interesajn konstatojn : S-roj Kaloĉai kaj Varingjen liveras - verŝajne senintence - valorajn pravigojn pri la lingvo-uzo el la SAT-gazetoj. La afero estas sufiĉe grava, por meriti mencion kaj eĉ citojn. Oni ja ne devas senpruve aserti.

La unua konstato rilatas al la forlaso de l'sufikso <u>ec</u> ĉe radikoj kun adjektiva (do <u>eca</u>) karaktero. Kiu deziras korekte uzi la lingvon kaj tiucele studas la verkojn de Zamenhof k.a. "bonaj aŭtoroj", tiu baldaŭ konstatas, ke ĉe ili estas neeble eltrovi regulon pri la uzado de tiu sufikso. Oni simple konstatas, ke ĝi estas almetita aŭ forlasita tute hazarde, laŭ la humoro aŭ kaprico. La legantoj povas mem fari la eksperimenton kaj ili vidos, ke tiuj aŭtoroj uzis, ekzemple, la vortojn : <u>larĝo</u> aŭ

larĝeco, longo aŭ longeco, neceso aŭ neceseco, oportuno aŭ oportuneco, profundo aŭ profundeco ktp. en samaj kazoj, por esprimi la tute saman ideon.

Tial ke la aŭtoroj de ĉi tiu gramatiko ankaŭ sammaniere uzas la sufikson ec, ili elpensis jenan vere tro subtilan klarigon : "Post adjektivaj radikoj ĝi (ec) signas, ke la abstrakto esprimita de l'flankelemento estas rigardenda kiel kvalito" (pĝ. 87). Bedaŭrinde, - por la harfendemuloj - sur la pĝ. 41 la leganto povis jam noti jenon : "Inter abstrakt(aĵ)o (?! la parentezo estas mia) kaj kvalito ne ekzistas esenca diferenco (substreko mia). Se tiel estas, laŭ la opinio mem de s-roj K. kaj V. - kaj mi tute samopinias kun ili tiurilate - kiel do la kompatindaj simpluloj, kiuj celas uzadi korekte nian lingvon, povos decidi, kiam ili devas aldoni aŭ forlasi la sufikson ec ĉe adjektivaj radikoj ? Ili vane cerbumos kaj finfine decidos ankaŭ hazarde, kaprice...

Sed niaj subtilaj gramatikistoj sendube pensis, ke la embaraso de simpluloj ne estos per tio sufiĉe granda kaj en tiu sama ĉapitro ili aldonis jenan rimarkon : "Laŭ la principo de sufiĉo oni povas multfoje (do ne ĉiam! mia rim.) ellasi la sufikson ec antaŭ adjektivaj radikoj, ĉar abstrakto kaj kvalito estas konceptoj tiel parencaj, ke ilia intermikso apenaŭ estigas konfuzon. La "bono de patro" estas samsignifa al la "boneco de patro". La tradicio lingva (subst. mia) tamen ankoraŭ (subst. mia) insistas pri la eco-formoj" (pĝ. 87).

Ĉe la ektrovo de tia perlo, kia estas la "tradicio lingva", tiam mi ne povis deteni min ekridi. Klare aperis antaŭ miaj okuloj la erara metodo laŭ kiu laboregadis la aŭtoroj de ĉi tiu gramatiko. La "tradicio lingva" ! Kion signifas tio ? Ho ! tute simple jenon : "Zamenhof k.a. "bonaj aŭtoroj", inter kiuj ni certe estas, ĉiam aplikis senregule la sufikson ec kaj sekve ni devas nepre elpensi klarigojn por pravigi nin ĉiujn..." Tia ideo, konscie aŭ ne, gvidis la du eminentajn aŭtorojn. Nu, mi kuraĝas aserti, ke tia labormetodo estas erara, rilate al esperanto, racie artefarita lingvo, kiu esence diferencas de l'naturaj lingvoj.

Se anstataŭ celi al la pravigo de absurda tradicio, s-roj K. kaj V. estus dirintaj al si : "La uzado de l' sufikso ec ĉe adjektivaj radikoj estas kaosa, necesas do difini simplan kaj klaran regulon", tiam ili facile starigus proksimume jenan : "La aldono de ec ĉe radikoj kun adjektiva karaktero estas pleonasma, balasta kaj sekve evitinda ; kvankam nenecesa, ĝi tamen estas, en kelkaj tre malmultaj kazoj, pravigebla per eŭfonia konsidero."

La kompatinda uzanto de nia lingvo, kiu serĉas en tiu gramatiko regulon por uzi korekte la sufikson ec, trafos en grandan embarason, tial ke li ne povos pli bone ol s-roj K. kaj V. mem distingi, kiam temas pri abstrakto aŭ kvalito kaj kiam efikas aŭ ne la leĝo de sufiĉo. Kaj tiam li sekvos la senregulan, absurdan "tradicion lingvan".

Sed kelkaj legantoj certe pensos, ke por apliki la regulon, kiun mi skizis pli supre, necesas, ke l'radikoj de nia lingvo havu gramatikan karakteron. Jes ja ! Kaj en la Plena Vortaro mi insistis, por ke tiu karaktero estu signita per -a, -e, -o, -i ĉe la fino de radikoj adjektivaj, adverbaj, substantivaj kaj verbaj. Mi tamen scias, ke ne ĉiuj Akademianoj interkonsentas pri la ekzisto de gramatikaj kategorioj. Nu, mi gratulas al s-roj K. kaj V., ke ili sukcesis trafe montri ties neceson :

"La principon de la kategoria divido starigis de Saussure, Zamenhof ĝin aprobis en sia privata letero al li (Originala Verkaro, pĝ. 455). La Akademio ĝis nun ankoraŭ ne rekonis la principon, sed en la "Principo de Neceso kaj Sufiĉo" kaŝe jam enestas ĝia akcepto.

Cetere Zamenhof mem skribas en privata letero al Th. Cart : "Por stuki, kiel por stampi, mi volis doni al la radiko signifon verban" (Originala Verkaro, pĝ. 539). Tio evidente pruvas, ke li atribuis al nudaj radikoj gramatikaj karakteron. Sekve stuk kaj stamp estas egalvaloraj al stuk(i) kaj stamp(i) (Pĝ. 36)."

Por pravigi la neceson de tia kategoria divido, sufiĉas simple mencii la bone konatan ekzemplon pri komb' kaj bros'. Se oni ne scias, ke la unua estas verbo kaj la dua substantivo, tiam ne eblas kompreni, ke kombo estas ago kombi kaj broso ilo por brosi.

La alia konstato, kiun mi kontente notis, estas, ke la aŭtoroj de l' "Pl. Gr." liveras kelkajn bonajn argumentojn, favoraj al la sinteno de S.A.T., rilate la demandon -ujo, -io ĉe landnomoj. Estus superflue insisti pri tio per ampleksa citado. Tamen mi opinias utile konigi jenajn konkludojn kaj rimarkojn, kiuj troviĝas sur la pĝ. 105 :

"Oni vidas, ke tia uzado de -io estas nur la plivastigo de ties Z-a apliko. Estas sendube, ke ĝi troviĝas en multaj internaciaj formoj, do ekz-e Hungario, Italio ktp. estas uzeblaj laŭ la 15-a regulo de la Fund. Gram. Etendi la uzon de -io ankaŭ al aliaj landoj (Belgio, Britio ktp.) povas okazi per analogio, grave rolanta en ĉiuj lingvoj. Aliflanke, la plia rekonebleco internacia estas ĉe la landnomoj multe pli grava ol cetere. Kaj, eĉ kie la formo ne estas internacia, -io malpli deformas la vortojn ol -ujo. Krome : -io estas nur aldono, anstataŭanta la trian sencon de -ujo, same kiel aĉ anstataŭas unu el la du sencoj de fi- ; poste, ĝi povas esti (kaj estas) paralele uzata kun -ujo, sen ia miskompreno. Do ĝi plene plenumas la postulojn, kiujn Z. metis en la Antaŭparolo de la Fundamento pri enkonduko de novaĵoj.

"RIM. La propono, pro siaj evidentaj avantaĝoj, estis favore akceptita de granda parto de l'E-istaro. Ĝian ĝeneralan akcepton, tamen, malhelpis la rifuzo de la Lingva Komitato, kiu decide malaprobis la novan sufikson. Sed, krom multaj neŭtraluloj, ĉiuj laboristaj rondoj uzas la io-formojn malgraŭ la oficiala malaprobo. Tiel la E-istoj dividiĝas nun en io-anojn kaj ujo-anojn. Laŭ la nuna stato de la afero, la unueco ŝajnas pli facile atingebla per la cedo de la Lingva Komitato ol per plua rezisto kontraŭ la sufiksoido.

"Oni devas diri kelkajn vortojn pri tiu decido de L.K., ĉar multaj ĝin miskomprenas, opiniante ke la uzado de -io estas sendisciplina ago.

"Nu, L.K. havas la rajton ekzameni ĉiun novaĵon kaj ĝin oficialigi aŭ ne. Sed ĝi rajtas nek trudi novaĵon, nek malpermesi vaste uzatajn formojn, ĉar tio estus kontraŭa al la libera evoluo kaj, krome, tute senŝanca.

La sola gvidpunkto, kiu povas ĝin gvidi, estas la grado da uzateco. Do tiu rifuzo, ĝuste komprenate, signifas nur, ke L.K. juĝis la sufiksoidon -io ankoraŭ ne sufiĉe elprovita kaj uzata, por ĝin oficialigi. Ĉio plua estus ja transpaŝo de agosfero."

Estas interese rimarkigi, ke la kunlaborantoj al la SAT-organoj ĉiam havis la plenan liberon uzi laŭplaĉe la formojn -ujo, -lando aŭ -io ĉe landnomoj. La sperto montris tute klare, ke l'granda plimulto el ili pli ŝatas la lastan formon, kiu estas pli mallonga, pli malpeza kaj pli internacia. Cetere, S.A.T. ne iniciatis la aferon ; ĝi simple imitis la ekzemplon de l'tiama U.E.A., kies gvidanto, Hektor Hodler, ne timis la tondrojn de kelkaj fanatikaj ujo-anoj. Sed li mortis kaj liaj heredintoj ne estis same kuraĝaj ; ili forlasis la uzadon de -io, ujumis discipline kaj... formanĝis lian heredaĵon. Sed tio estas alia temo - negramatikeca...

***

Mi jam diris, ke por klarigi la metodon, kiun aplikis la aŭtoroj de tiu ĉi verko, mi ne trovas alian motivon ol tiun, ke ili celis ĉefe pravigi ĉion, kio troviĝas en iliaj propraj verkoj - kaj nur tion. Plifirmigas mian opinion la konstato, ke ili ignoras la "tradicion lingvan",kiam ĝi povus pravigi formojn, tute klaraj , simplaj kaj vere esperantecaj),t.e. kiuj konformas al la vera spirito de nia lingvo. Mi aludas al : alial, aliam, alie (kun loka signifo), aliel, aliom (alies, alio kaj aliu estas sen ia malaprobo menciataj). Tiuj formoj naskiĝis spontane ĉe homoj, kiujn logis la plej ŝatinda parto el nia lingvo : la tabelo de korelativaj vortoj ; ĉe esperantistoj kiuj ne uzas nian lingvon diletante, sed necese kaj ĉiutage. Tiu komplemento al genie elpensita tabelo de adverboj eĉ troviĝas en iu pol-esperanta gramatiko ; sed ne estis loko por ĝi en la 488-paĝa "Pl. Gr.". Kiel estas klarigebla tia malatento ? Nu, eble tiel : "Ni, eminentaj kunlaborantoj de Literatura Mondo kun ĝiaj 500 abonantoj, havas aŭtoritaton kaj influon, kiun ne povas pretendi la simpluloj de "S.R." kun ĝiaj 1200 abonantoj kaj de "Sennaciulo" kun ĝia pli ol 6000-ekzemplera eldon-

kvanto. Sekve, la lingvaĵo uzata en tiaj proletecaj organoj estas neniel* atentinda, neniel studinta en nia "Plena Gramatiko".

Ke tia konsidero estis la konscia aŭ nekonscia impulso ĉe niaj gramatikistoj, pri tio mi trovas pruvon en jena rimarko, presita sur la pĝ. 173 :

"Ekzistas en la Fundamento aparta pronomo por la dua persono singulara : ci, cin, je ci. Sed ĝi neniam estis vere uzata ; oni trovas ĝin kelkfoje en poezio, por traduki nacilingvan nuancon, kaj en la esprimo : ci-diri al iu".

Kiuj partoprenis SAT-kongresojn kaj havis la okazon konatiĝi kun la drone mortintaj Gek-doj Ozere, tiuj scias, ke ili ĉiam ci- umis dum konversacioj kaj diskutoj. Kaj mi ne dubas, ke en amleteroj, skribitaj ĉe diversaj latitudoj, oni povus ofte legi : Kara Ci ! Cetere Julio Bagi mem abunde ci-umas en sia romano "Hura!". Sed s-roj K. kaj V. malŝatas tiun trivialan pronomon - kiu tamen estas uzata en poezio - kaj ŝajne bedaŭras, ke ĝi troviĝas en la Fundamento.

Rilate al formoj, kiuj ne enradikiĝis estas menciita (pĝ. 195) "Ti-kiuj proponita de Lanti". Fakte mi proponis nenion kaj en miaj verkoj nenie troviĝas "ti-kiuj". En la komenco de mia esperanta kariero mi uzis tiun formon, imite al kelkaj Sovetiaj K-doj. Tiam ofendis mian orelon, ekzemple, frazo kiel jena : "Ĉiuj tiuj, kiuj aprobas la proponon, levu la manon". Sed poste mi rimarkis, ke oni povas klare esprimi tiun saman ideon jene : "Kiuj aprobas la proponon, tiuj..." La forlaso de"ĉiuj" kaj la alilokigo de "tiuj" tute kvietigis mian aŭdsenton. Tial malaperis la formo pri kiu estas funebre parolite en la "Pl. Gr.". Se "ti-kiuj" ne mortus, estas dube ĉu ĝi havus la honoron esti menciata en tiu verko...

---

* Verŝajne K. kaj V. dirus : neniamaniere, simile al la ŝatataj tiamaniere k.s. pezaj - sed naciecaj formoj.

Pruve al tio, ke la metodo aplikita de niaj du aŭtoroj en la verkado de sia gramatiko estas misa, mi plie citu jenon :

"Kiel oni vidas, Z. ordinare ne uzas artikolon antaŭ jena kaj jeno, ĉar ili estas per si mem difinitaj (subs. mia) ; tamen ties uzado pli kaj pli oftiĝas" (pĝ. 182).

Jes ja ! tiu balasta, erara uzo de la troviĝas tre ofte en la "Pl. Gr." mem. El tiu konstato oni povus malice argumenti, ke ties aŭtoroj uzas fuŝe, ne Zamenhofe nian lingvon. Mi preferas rimarkigi, ke hazarde mi notis : "en jena signifo" (pĝ. 226), "...oni trovas jenajn" (pĝ.269) "...en jena frazo" (pĝ. 283), "...laŭ jenaj turnoj" (pĝ. 359). Tiel ke la kompatinda lernemulo, kiu serĉos regulon pri la uzo de la trafos denove en grandan embarason per studado super la "Pl. Gr.".

Kaj tra la tuta volumo oni konstatas, ke la oftege uzata vorto "certa" estas iafoje dubesenca ; oni nemalofte hezitas por decidi ĉu temas pri neduba afero aŭ pri ia, iu, kelka. La "lingvuzo", la "tradicio lingva" kaj similaj ridindaj tialoj, per kiuj la gramatikistoj kutimas klarigi ĉiujn absurdaĵojn el la naciaj lingvoj, estas aplikataj al esperanto - kiun ni kutimas prezenti al la publiko kiel simplan, racian lingvon...

Sed kiam la "lingvuzo" kaj oficialaj difinoj de vortoj ne plaĉas al niaj aŭtoroj, tiam ili simple ne atentas ilin. Ekzemple, ili uzas la verbojn "klasi" kaj "ordi" kun transitiva senco. Tamen la radiko de tiuj vortoj estas substantiva (klaso kaj ordo) kaj sekve por akiri sencon transitivan la almeto de -ig estas logike necesa. En la "Pl. Gr.", kies kunaŭtoro estas s-ro V., tiu neceso estas montrita. Nu! mi ne dubas, ke s-roj K. kaj V. povus verki 100 paĝojn por rebati al mi, ke laŭ la leĝo de sufiĉo la formoj klasi kaj ordi kun transitiva senco estas tute kompreneblaj. Kaj mi devus konfesi, ke ja tiel estas. Ofte la kunteksto ebligas diveni, ĉu verbo estas uzata transitive aŭ ne. Tamen, ekzemple, ĉe la lego aŭ aŭdo de ordi, la unua ideo, kiu prezentiĝas, estas : esti en ordo kaj ne : fari ordon. Por ĉi tiu lasta ideo la almeto de ig ne estas

superflua ; same iĝ, se temas pri afero, kiu fariĝas orda per si mem. Almenaŭ estas multe pli facile pravigi la meton de ig al substantiva radiko por transitive verbigi ĝin, ol la almeton de ec ĉe adjektiva radiko.

Bedaŭrinde, por la harfendemuloj, sur pĝ. 113 troviĝas jena frazo : "Post adverbaj radikoj kaj prepozicioj validiĝas (subs. mia) la adjektiviga efiko de igi..." Tamen, la radiko valid estas adjektiva kaj ne verba kun transitiva senco ; la aldono de iĝ estas do tute ne necesa por doni al tiu vorto netransitivan verban sencon; validi = esti valida, do validas. Kaj mi dubas, ĉu niaj gramatikistoj, malgraŭ sia skolastika talento, sukcesus liveri eĉ ŝajnvalorajn argumentojn por pravigi tiun monstran "validiĝas"...

Alian pruvon, ke s-roj K. kaj V. malŝate rilatas al la "lingvuzo", kiam tiu facila kaj obeema klarigilo ne akordiĝas kun ilia gusto, mi trovas en la ĉapitro pri Interpunkcio. La vorto parentezo estas oficiala kaj jene klarigata en la "Pl. Vor." : "1)Signoj per kiuj oni apartigas de la kunteksto kompletigan aŭ klarigan frazon aŭ vorton. 2)Frazo aŭ vorto tiele apartigita." Sed sur la pĝ. 459 de l' "Pl. Gr." oni povas legi pri parentezo : "Kelkfoje oni uzas tiun vorton ankaŭ por nomi la krampojn, sed tio estas evitinda". Kiam oni scias, ke tia uzado estas ne "kelkfoja", sed ĝenerala, ne povas esti dubo, ke en ilia tuta argumentado niaj aŭtoroj estis gvidataj de sia persona gusto. Per tia konstato oni rajtas konkludi, ke la "tradicio lingva" kaj la "lingvuzo" estas do plej ofte senvaloraj klarigiloj.

Kiel la legantoj sendube scias, jam delonge ekzistas en Esperanto la "Dramo ata-ita". Akademianoj kaj L.K.-anoj disputas inter si kaj ĝis nun neniu interkonsento povis okazi. Kompreneble en la "Pl. Gr." tuta ĉapitro estas dediĉita al tiu demando. Sed vane la aŭtoroj provis difini regulojn, kiujn ĉiu povus akcepti. Ekzemple, Teo Jung en "Heroldo de Esp-o" eldiris lastatempe sian malaprobon al la solvo proponita de s-roj K. kaj V. La afero ŝajnas al mi tute ne grava kaj mi men-

cias ĝin nur kun la celo montri, ke ne eblas diktatore gramatikumi. Cetere, Zamenhof mem kelkfoje diris, ke oni ne devas kateni la lingvon per tro rigoraj reguloj. Pri la "dramo ata-ita" mi simple rimarkigos, ke ĝi ofte estas nur afero de stilo, ne de gramatiko. Verkisto povas iam pensi kaj akcenti la momenton dum kiu okazas la ago, kaj aliam li pensos kaj akcentos la rezulton de la ago. Kion li devas senĉese celadi, tio estas liberigi sin el la influo de naciaj lingvoj. Konklude pri tiu punkto mi notas, ke la aŭtoroj de l' "Pl. Gr.", kiuj estas lertaj dialektikuloj, ne sukcesis verki la lastan scenon de l' "dramo ata-ita". Espereble la rigardantoj ne atendos, ke falu la kurteno kaj ili foriros, akirinte la konvinkon, ke la "dramo" simple estis malsprita farso...

En ĉi tiu verko troviĝas kelkfoje mencio pri la leĝo de analogio. Ĉiu vera esperantisto, kiu atente observas la vivon de sia lingvo, povas ofte rimarki la efikojn de tiu leĝo. Ekzemple, mi trovis antaŭnelonge la formon "Holandujo" en gazeto, kie oni kutime uj-umas fervore. Se ne ekzistus en Esperantio la i-uma tendenco, mi ne dubas, ke post pli malpli longa tempo oni povus legi, ekzemple : Alĝerujo, Aŭstralujo, Azujo, Siberujo, Tasmanujo ks. Oni do povas tute konsenti kun s-roj K. kaj V., kiam ili substrekas la influon de tiu leĝo per ekzemploj, ĉerpitaj el la Zamenhofa verkaro.

Sed mi ne rimarkis, ke niaj aŭtoroj konscias pri alia leĝo : tiu de minimuma peno. Ĉiu scias, ke sufiĉas diri al iu : "Bonan tagon", por ke li komprenu jenan tutan frazon : "Al vi mi deziras bonan tagon." Temas pri elipso de superfluaj vortoj. Sed la sama leĝo de minimuma peno ankaŭ influas sur la formon de vortoj mem. Mi mencios fakton, kiun oni povis konstati en la SAT-movado. En ties komenca tempo la oficialaj vortoj proletario kaj proletariaro estis ofte uzataj. Sed tiuj formoj estas pezaj. Iam tute spontane kaj nature iu diris : "proleto", "proletaro", kaj ĉiuj aŭskultantoj bone komprenis. La sekvo estis, ke iom post iom la oficiala formo estis forlasita kaj jam delonge en la lab. esp. movado oni ĉiam uzas la pli simplan formon.

Kiam la vortoj proleto kaj proletaro aperis en la SAT-organoj, tiam d-ro Diterle el Lajpcig skribis al mi proteste, klarigante, ke tia "kripligo" de l'latindevena "proletarius" estas neallasebla, ke ĝi "ofendas la lingvosenton de ĉiu klerulo..."

Mi respondis al la eminenta latinisto (almenaŭ latinemulo), ke la proletoj bedaŭrinde - aŭ feliĉe - estas tute indiferentaj al tia lingva konsidero. Ili eble povus interesiĝi pri la opinio de l'rektoro E. Buarak (Boirac), kiu diris, ke "esperanto estas la latino de l'demokratio", sed kondiĉe, ke ĝi estu, aŭ fariĝu, kiel eble plej simpla kaj malpeza. Jaroj forpasis. S.A.T. iniciatis la eldonon de vortaro. Tiam lange aŭ plume mi interrilatis kun s-ro Groĵan-Mopen preskaŭ ĉiutage. Foje mi donis al li, interalie, slipon kun difino pri la vorto proleto. Senproteste li akceptis ĝin kaj jam de pluraj jaroj pli ol dek miloj da homoj - ankaŭ senproteste - legis tiun difinon en la Plena Vortaro. Kompreneble la oficiala Proletario ne forestas, sed ĝi estas menciita kun la nura indiko = proleto. Tamen, s-ro G.M. ankaŭ estis latinisto. Eble lia "lingvosento" komence ofendiĝis, kiam li legis la simpligitan formon. Sed kiel diligenta leganto de l'SAT-gazetoj li verŝajne iom post iom alkutimiĝis ; kaj jen kial proletario estis forpuŝata. Hodiaŭ, se en SAT-kongreso iu aŭdigus la vorton "proletario", eble multaj komprenus, ke temas pri ario, kiun kantas proletoj...

***

Supozeble, kelkaj legantoj opinios, ke mi forflankiĝis de l'temo. Tute ne ! Male, mi staras en la centro de l' gramatika tereno. Temas ja ekkompreni pri la leĝoj laŭ kiuj evoluas - ne ĝuste, laŭ kiuj devas evolui nia lingvo. Mi ja konscias, ke tiuj leĝoj estas relativaj. Se esperanto estus uzata nur de kleruloj kiel d-ro Diterle k.a., la formo proleto neniam venkus. Sed se oni konsentas al ĉi tio, ke la elementuloj (unuagradaj instruitoj), ordinare proletoj, pli bezonas esperanton ol la profesoroj kaj poliglotoj, la konsekvenco estos, ke ne ĉi-lastaj devas esti ordonpovaj en Esperantio. Ili plej ofte kapablas nur kompliki nian simplan lingvon kaj ĝin ŝarĝi per kaprompaj

reguloj, kies lernado forpelos la varbitojn. Por antaŭenpuŝi nian movadon, necesas esti ĉiam tre atenta al ĉio, kio povas racie simpligi nian lingvon. La rolo de esperantista gramatikisto devas esti la formula eltrovo de reguloj, per kies obeo nia lingvo povas evolui laŭ kiel eble plej racia plisimpliĝo kaj samtempa pliriĉiĝo.

Neniu scipovas esperanton. Zamenhof mem ne ĉiam kapablis uzadi sian lingvon laŭ ĝia racia spirito. Tro ofte li estis influata de l' naciaj lingvoj, kiujn li sciis. Sed li estis neniel diktatorema kaj aŭtoritatema. Li donis konsilojn kaj ne ordonojn. Lia celkonformemo estis granda, sed li konsciis pri sia erarpovo. Nun, post 50-jara ekzisto de esperanto, la gramatikistoj, kiuj prenas sur sin la taskon difini regulojn, sin apogante sur la eraroj de la aŭtoro de nia lingvo, sur la aŭtoritato de "bonaj aŭtoroj" kaj sur la "tradicio lingva", tiuj iras laŭ malĝusta vojo ; tiuj faras al nia afero malbonan servon. Ne pro tio, ke Zamenhof k.a. diradis, ekzemple : "...enkonduki esperanton en la lernejojn", la esperantistoj devos eterne uzi tiel balaste la akuzativon. Tial ke l'nacieca influo kontrabande oficialigis la formojn "pacifismo" kaj "pacifisto", tio ne signifas, ke la sennaciemuloj - la plej konsekvencaj esperantistoj - ne havas la rajton uzi la pli simplajn kaj pli esperantecajn vortojn : pacismo kaj pacisto. Kaj se la "tradicio lingva" povas pravigi la formojn "virgulino", "belulino" k.s., ili tamen neniel estas racie pravigeblaj, tial ke ĉiu esperantisto facile komprenas, kio estas ino virga (virgino) kaj ino bela (belino). La hazardo kaj kaprico, kiuj tro longe regis - kaj ankoraŭ regas - en la elekto de vortoj kaj formoj, povus same maltrafe enkonduki la formon "amatulino" anstataŭ amatino.

Niaj gramatikistoj devus kompreni, ke rilate al esperanto, artefarita lingvo, ili ne devas apliki metodon, kiu taŭgas nur por naciaj lingvoj, en kiuj svarmas absurdaĵoj. Ili devus penadi por difini leĝojn, laŭ kiuj oni povas plej simple kaj tamen klare eldiri siajn pensojn. Bedaŭrinde s-roj K. kaj V. laŭiris la trabatitan, la skolastikan vojon kaj riverencis antaŭ la "tradicio lingva". Vane ili diras en sia antaŭparolo : "...ni devis forgesi ĉiujn

naciajn sistemojn kaj konstrui ian absolutan gramatikon bazitan sur la racio." Se tion ili fakte celis, mi opinias, ke ili plene fiaskis. Cetere oni trovas en tiu antaŭparolo mem refuton al ilia aserto. Racio ne obeas tradicion. Kaj tamen oni povas legi sur la pĝ. 9 :

"Kiu sin bazas nur sur la Fundamenta gramatiko, tiu komencas tie, kie la unuaj verkistoj de Esp-o : por li ne ekzistas tiu lingva trezoraro, kiu evoluis (hazarde, kaprice, malracie - mia rimarko) per la penoj de tiel multaj aŭtoroj. Tiu trezoraro prezentas propre la lingvan "spiriton" ; ĝin ni volis kapti en regulojn kaj transdoni en facile konsultebla libro."

Ne ! La "spirito" de nia lingvo ne troviĝas ĉe aŭtoroj, kiuj estas pli malpli sub la influo de naciaj lingvoj. Neniu esperantista verkisto ĝis nun sukcesis tute liberiĝi el la nacieca influo. (Kaj mi mem ne havas tian pretendon). Sekve estas vana penado serĉi en tiaj verkoj la veran spiriton de nia lingvo. La "tradicio lingva" plej ofte ofendas tiun spiriton mem, kiu cetere nun ekzistas nur en embria stato. La vera spirito de nia lingvo estas sennacieca ; la esperantistoj devas streĉi sian tutan forton por formeti la naciecan influon. Kaj la celo de gramatikisto devus esti la starigo de simplaj reguloj sentradiciecaj.

Malgraŭ siaj 488 paĝoj la "Pl. Gr." ne povis doni al mi konsilon pri duba punkto, kiu antaŭnelonge stariĝis antaŭ mi ĉe relego de letero, kiun mi skribis antaŭ du jaroj. Jen pri kio temas : "Mi pagas ĉi tie trione malpli ol en Tokio..." Ĉu ne devus esti obl anstataŭ on? La ideo ja estas obligi la malplion. Sed mi ne faris ŝanĝon pro jena konsidero : on kaj malpli havas malpliigan efikon kaj obl pliigan. Ilia kunigo sekve povus nur konfuzi. Cetere mia korespondanto tre bone komprenis, kion mi volis sciigi al li. Sekve, kial cerbumadi pri klara afero. Nu, tia demando k.a. similaj povos esti okazo por s-roj K. kaj V. aldoni almenaŭ 100 pliajn paĝojn al la tria eldono. Kaj nun mi komprenas, ke por trarecenzi ĉi tiun verkon mi devus ankoraŭ longe skribadi. Se tiel mi farus, la Red. de nia Revuo sendube opinius,

ke miavice mi volas repage embarasi lin...

Konklude mi do sincere kaj senmalice konfesas, ke la tutlegado de tiu verko lasis al mi la malagrablan impreson, ke jam de 20 jaroj mi uzadas nian lingvon, nesciinte - kaj nun eĉ malpli - ĝiajn gramatikajn regulojn... Kompatinda popolo esperantista ! Ĝi nun disponas je tro Plena Gramatiko, dum mankas sufiĉe Plena Vortaro. - En ĉi-lasta verko ja ne troviĝas geografiaj kaj historiaj nomoj. S-roj K. kaj V. pli utile aplikus sian kleron kaj erudicion per ties kompilado ol per skolastika provo klarigcele malklarigi nian simplan lingvon...

Se mi kapablus kiel la Budapeŝta gramatikisto rajdi Pegason (*), mi provus fari versojn pri jenaj bildoj, kiuj nun aperas antaŭ miaj okuloj : Kaloĉai, kun kalva kapo burĝe klaskonscia (**), ne ŝparas paperan rismon (**) por sia vero skolastika. Sed li trafis en abismon (**), tial ke li ne estas komprenata. Kaj li suferas teruran skismon (**) pro -ita kaj -ata. Kaloĉai kun kalva kapo burĝe klaskonscia(**).

Prefere mi rekomendu al la legantoj la solan regulon, kiun mi mem ĉiam provis obei ; ĝi estas eldirita de s-ro Teofilo Kar (Cart), la mortinta prezidanto de la Akademio: "Kio en nia lingvo estas klara, tio estas bona, eĉ se ĝi ne estas gramatike korekta ; kaj ĉio, kio estas gramatike korekta kaj tamen ne klara, tio estas malbona" (laŭmemore citita). Kaj mi aldonu : Kiam vi skribas en esperanto, pensu, ke tiam vi estas civitano de Esperantio kaj sekve devas streĉi la volon por senigi vin je ĉia nacieca influo...

E. Lanti.

Nov-Zelando, Februare 1939.

(*) Mitologia ĉevalo flugilhava, kiun rajdis poetoj. Red. de S.R.

(**)Tiuj esprimoj troviĝas en la portreto, kiun faris Kaloĉai pri Lanti en "Rimportretoj". Red. de S.R.

Letero al K-do Lanti
****

(Respondo al la Recenzo pri la "Plena Gramatiko", kiu aperis en nº 75)

Kara Lanti,

Mi petas pardonon, ke mi skribas al vi pri tiu via recenzo de la "Plena Gramatiko" ("S.R.", majo 1939). Ne ĉar mi volas rebati viajn kritikojn kaj pruvi plurajn malĝustaj kaj eĉ maljustaj ; tio estus facila, sed mi opinias, ke, kiam homo publikigas libron, li per tio mem elmetas sin pasive al ĉiaj kapricoj de la publiko : tia estas la leĝo de la literatura vivo, kaj estus naive kaj ridinde plendi pro ĝi.

Mi do, ekzemple, ne respondos al via argumentado pri ci per la facila konstato, ke citi la kutimon de 2 kamaradoj aŭ la provon de 1 aŭtoro en 1 libro ne sufiĉas por pruvi la vastan uzatecon de tiu pronomo ; mi ne trankviligos vian belan indignon pri la diferenco starigita inter krampo kaj parentezo per la rimarko, ke oni diras tre ofte "inter krampoj" kaj neniam "inter parentezoj", aŭ ke la vorto estas ankaŭ oficiala kaj jene klarigita en la P.V.: "Tipografia signo montranta komencon kaj finon de parentezo" (kio pravigas la noton de la P.G.) ; mi ne demandos vin, kial unuflanke vi riproĉas al ni ne liveri striktan regulon pri jena, obl aŭ on - kaj aliflanke konfesas, ke "ne eblas diktatore gramatikumi" ; ktp.

Sed inter tiuj detalaj punktoj enŝoviĝis unu ĝenerala teorio, kiu prezentas ĉefan intereson por la vivo kaj la estonteco de nia lingvo. Nur pri tiu ĉi mi petas de vi la permeson iom vaste diskuti.

Via tezo, se mi bone komprenis, estas jena : la naciaj lingvoj estas plenaj je idiotismoj, absurdaĵoj kaj "kaprompaj reguloj" ; respondumaj pri tiu kompatveka stato estas la "profesoroj, poliglotoj, latinemuloj, skolastik-

uloj, harfendemuloj"... kaj aliaj gramatikistoj, kiuj por sia propra plezuro senlime komplikigas la lingvon. Nu, Esp-o estas artefarita lingvo, bazita sur la racio : tial ĝi estas simpla. Se oni lasas la profesorojn ktp (vidu ĉi-supre) ekregi super ĝi ili same terure malfaciligos ĝin kaj la "kompatinda popolo esperantista" perdos, ĝin lernante, siajn harojn (ilin efektive fendadas la profesoroj ktp.) kaj ricevos interŝanĝe nur kapdolorojn. Sed feliĉe fondiĝis la sennacieca movado : ĝi starigos sennaciecan lingvistikon, bazitan sur sennaciisma principo, kaj tiel elsavos la lingvon el la burĝaj manoj de la profesoroj ktp. Amen.

Tiu tezo ne sonas fremde al miaj oreloj. Se mi ne eraras, mi jam aŭdis, antaŭ kelkaj jaroj, saman argumentadon - krom la sola diferenco, ke la vorton "sennacieca" anstataŭis la vorto "marksist-leninista". Kaj, se mi bone memoras, inter tiuj, kiuj plej laŭte mokis tiun fantazion starigi "marksist-leninistan" sciencon kontraŭ kaj super la scienco senepiteta, troviĝis ia Lanti... Sed la hieraŭan ni ne bedaŭru.

La ĉi-supra tezo estas erara kaj en sia principo kaj en sia konkludo. En sia principo : mi ne volas kontesti, ke la naciaj lingvoj estas malsimplaj. Sed tiun malsimplecon oni ŝuldas, tute ne al la gramatikistoj, kiuj aperis nur, kiam la lingvoj jam tute elformiĝis, sed al la popolo mem, al la "elementuloj-proletoj", pri kiuj vi faras al vi tiajn kortuŝajn iluziojn. Se vi estus studinta iom la lingvistikon, anstataŭ ĝin primoki, vi estus konstatinta, ke la kaŭzo de tiuj absurdaĵoj estas preskaŭ ĉiam tiuj leĝoj pri analogio kaj pri minimuma peno, kiujn vi tiel alte laŭdas ! Kaj ĉar tiuj leĝoj, kiel vi mem tre ĝuste rimarkas, efikas plej intense ĉe la popolo, malplej ĉe la kleruloj, ni rajtas diri, ke la popolo respondumas pri la ĥaosa stato de la lingvo, kiun ĝi parolas ! Kaj tiun mian aserton mi povus apogi per mil kaj mil pruvoj. Cetere, ĉu la simpla saĝo ne sufiĉas por aserti, ke la lingvojn, kun ĉiuj iliaj mankoj kaj tuberoj, estigis la amaso de nekulturitaj vilaĝanoj aŭ laboristoj ? La kapablon ĝuste kaj racie uzadi la lingvon la eco de proleto ne pli entenas en si

mem, ol la kapablon skulpti bareliefojn aŭ komponi simfoniojn. Kaj aliflanke, ĉu la ĉiutaga observo ne montras, ke ne ekzistas unu gramatikisto, kiu sukcesis enkonduki novan vorton aŭ parolturnon en sian propran lingvon ? Se vi pli bone konus tiujn gramatikajn monstrojn, vi vidus, ke plejofte estas ili, kiuj provis simpligi, klarigi la popolan lingvon : foliumu nur la admirindajn gramatikistojn de la 17-a franca jarcento, la "Grammaire de Port-Royal" ekz-e, kaj vi konscios, kian klarecon, kian logikon ili penis enmeti en la francan lingvon.

Sed vi lasas vin peli de blinda klaskonscia antaŭjuĝo kontraŭ la specialistoj. Vi ne pardonas al ili, ke, por science difini kaj studi sian materialon, ili bezonas apartan terminaron, apartan klasifikon, apartajn metodojn. Vi ne riskus moki la elektristojn, ke ili "skolastikas" pri ĵuloj, kulomboj, rezistancoj, cirkvitoj ktp - ĉar pri la elektro vi konscias, ke vi ne kompetentas. Sed pretekste, ke la studobjekto de la lingvistoj estas la lingvo, kiun vi aŭtomate parolas, vi imagas al vi, ke vi kompetentas pri ilia scienco kaj rajtas akuzi ilin pri ĉiaj krimoj. Bonvolu kredi, amiko, ke mi laboris dum kvar jaroj antaŭ ol klare kompreni la metodojn de la lingvistiko kaj kapabliĝi ilin korekte apliki, kaj ke de tiam mi plu studadas kaj lernadas. Tion mi ne diras por veki vian miron aŭ kompaton ; tion mi diras por montri al vi, ke la lingvistiko estas scienco, kun neevitebla inicado kaj akirenda metodologio, ĝuste kiaj la fiziko aŭ la antropologio ; ke ne povas esti la burĝa lingvistiko kaj ia proleta, ĝuste kiel ne povas esti ia stalinisma kemio aŭ ia rasisma algebro ; ke la instruoj de la lingvistiko aplikiĝas al Esp-o tute same kiel al aliaj lingvoj.

"Sed Esp-o, vi respondos, estas artefarita lingvo!" - Nu, kion tio signifas ? Tio estas interesa informo por la <u>historio</u> de la lingvo, sed tio neniel utilas por ĝia <u>nuna</u> konsisto. La proleto aŭ la poligloto, kiu <u>nun</u> lernas Esp-on, lernas ĝin kiel vivantan lingvon, ne kiel konvencian kodon. Se ĝi estus nun vere nur artefarita lingvaĵo, tiuj leĝoj pri analogio aŭ pri minimuma peno ĝuste <u>ne</u> efikus super ĝi ! Ĉu vi opinias, ke la maristaj

signalistoj submetas al tiuj leĝpj la formulojn de siaj flago-kodoj ? Ĉu vi iam rimarkis aplikon de tiuj leĝoj en la mors-telegrafado ? Ĉu en la kemiaj formuloj aŭ en la algebraj ekvacioj ? Jen tamen perfektaj ekzemploj de artefaritaj, pure artefaritaj lingvaĵoj ?

Esp-o estas nun lingvo, kaj, kiel ĉiuj vivantaj lingvoj, influata de multaj ne-raciaj fortoj. Kaj se, kiel vi deziras, la proletoj fariĝus ordonpovaj en Esperantio, la lingvo fariĝus pli kaj pli simila al la naciaj. Ĉar mi ne kuraĝas kredi, ke la aliĝo al tiu- aŭ alia-numera Internacio aŭ al Sennaciismo povas funde ŝanĝi la pensan mekanismon de homo. Ĉiam la homo bezonos kaj volos esprimi, ne nur siajn ideojn, sed, kaj antaŭ ĉio, siajn sentojn ; kaj, same kiel okazis ĝis nun, la esprimado de la ideoj mem estos preskaŭ ĉiam miksita kun tiu de la sentoj, estos sente kolorigita. Kaj la sento estas la ĉefa fonto de ĉiuj lingvaj mallogikaĵoj, neraciaĵoj... Vi mem, kara Lanti, kiu kredas vin tiel raciema, kial do vi tiel ŝatas la ironion kaj provas ironie prezenti viajn tezojn ? La ironio, kiu instigas vin ŝajnesprimi la malon de via penso kaj iel inversigas ties signon, la ironio estas interveno de la sentoforto en la paroladon : pure racie konstruitaj estuloj ne nur ne uzus, sed eĉ ne komprenus la ironion !

Kompreneble, ne ĉio estas erara en via argumentado. Vere estas, ke Esp-o estas relative pli racieca lingvo ol la naciaj. Sed por konservi tiun relativan raciecon oni devas fidi ne al la instinktoparolaj proletoj, kiuj ĉiel* ĝin difektos, nek al la matematikismaj teoriuloj, kiuj ĝin ĝismorte perfektigos (memoru pri Ido!) - sed al la verkistoj, kiuj ĝenerale posedas bonan lingvosenton, kaj al la gramatikistoj kiuj ĝin klarigas per raciaj formuloj. Mi tute ne ŝatas la ekstremajn poziciojn ; inter la nepra raciigado kaj la blind-instinkta evoluado, mi opinias, ke ni devas trovi kaj sekvi la ĝustan mezon.

Nek tiujn, kiuj volas anstataŭigi interakto per la pli logika aktintero, nek tiujn, kiuj skribas : "pravigi formojn, tute klaraj, simplaj kaj vere esperantecaj", mi aprobas. Kontraŭe al Cart, mi aŭdacas kredi, ke oni povas

---

* Ankaŭ mi scias... tabelumi !

kunigi la stilan klarecon kaj la gramatikan korektecon, kaj ke oni devas oferi unu al la alia neniun el tiuj du ĉefaj principoj. Kaj precipe mi aŭdacas konsili, ke oni parolu nur pri la aferoj, kiujn oni konas. Nekompetenteco estas ja solida supereco, sed ĝin oni ne devas trouzi.

Simpatie via, G. Waringhien, SAT-ano nº 17296.

***

Responde al K-do G. Varingjen
****

Kara K-do Profesoro,

La legantoj mem respondu la demandon, ĉu fakte mi argumentis malĝuste pri la "Plena Gramatiko" kaj maljuste al ties aŭtoroj. Mi do simple petas, ke ili bv. relegi mian recenzon antaŭ ol konkludi pri tiu demando. Oni ne povas esti juĝanto kaj juĝato, kaj en la koncerna afero tiu aksiomo jura valoras por ni ambaŭ, ĉu ne ? Sed mi povas almenaŭ certigi, ke se fakte mi estis maljusta al vi, tion mi tre bedaŭrus, tial ke mi daŭre havas por vi grandan estimon. Kaj eble ĝuste pro tio, ke ju pli mi admiras vian laborkapablon kaj vian fervoron por nia komuna afero, des pli mi bedaŭras, ke vi elspezis vian energion laŭ malĝusta direkto, kiam vi verkis vian vere monstran Gramatikon. La Esperantistaro absolute ne bezonas tian verkon kaj mi havas la konvinkon, ke ĝi eĉ povas nur malutili.

Ne necesas havi grandan imagpovon por prezenti al si la fiuzon, kiun malamiko de esp-o povus fari je tiu 488-paĝa volumo. Jen aŭskultu : "Estimataj ges-roj, vi ĵus aŭdis elokventan pledon por esp-o ; oni rakontis al vi pri ĝiaj mirindaj kvalitoj, pri ĝia facila lernebleco ktp.; vi, ekz-e, aŭdis pri ĝiaj 16 reguloj simplaj kaj parkereblaj en mallonga tempo ktp. ks. ; nu, Ges-roj, oni aplombe trompis vin ; jen rigardu, mi tenas en la mano ekzempleron de esp-a gramatiko ; ĝi estas 488-paĝa! Ĉu do tiu dokumento ne pruvas plej evidente, ke la Zamenhofa elpensaĵo ne estas la mirindaĵo, kiun blufuloj trompe prezentas al vi..." ktp. ktp. ks.

Kompreneble vi povus rebati, ke mi tro fantazias, ĉar ĝis nun via verko en sia dua eldono ne estis tiele uzata de demagogo. Nu, bone, mi eĉ volas esperi, ke tiu latenta

danĝero neniam konkretiĝos ; tamen ĝi ekzistas...

Sed prefere vi meditu pri jena fakto : Lanti, mia amiko, kiu uzas ĉiutage esp-on jam de 20 jaroj, ĉe la finlego de la "P.G." ricevas la malagrablan impreson, ke li neniam konis la esp-ajn regulojn kaj sentas sin tiurilate pli malklera ol antaŭ la legado. Kaj la fakto, ke nur mi kuraĝas publike fari tian konfeson, ne emigu vin pensi, ke aliaj esp-istoj ne havis similan impreson. Eble ĝi ne estis ĉe ili tiel forta, kiel ĉe mi, pro la simpla tialo, ke ili nur trafoliumis la pezan volumon, metis ĝin poste en ŝrankon kaj kontentiĝis per la penso, ke ili havas en sia dispono "sciencan" verkon, kiu respondas al ĉiuj lingvaj demandoj pri esp-o. Mi povus mencii la nomon de almenaŭ 20 esp-istoj el diversaj landoj, kiuj konfesis al mi, ke ili ja posedas ekzempleron de "P.G.", sed ke ĝi tute ne utilas al ili. Kaj - pli grave, pli meditinde - mi observis ĉe tiuj esp-istoj ian elreviĝon, kiu antaŭsignas senfervoriĝon en nia movado. Ili ja malklare ekvidis, ke nia lingvo tendencas fariĝi same komplika kaj malfacila, kiel la naciaj. Pro tiaj konstatoj mi akiris la konvinkon, ke vi, tre estimata K-do Profesoro, bonintence faris malbonan servon al nia afero...

* * *

Sed mi ne devas forgesi, ke vi precipe skribis por inviti min al diskuto pri tezo, kiun viasupoze mi defendas. Nu, vi faras al mi grandan honoron, sed ĉu konvenas, ke mi akceptu vian inviton, ĉar vi rimarkigis, ke mi ne havas kompetenton en lingvistiko ? Tian, cetere mi ne pretendas havi. Tamen, malgraŭ tiu manko, mi ne timas deklari, ke via peraŭtoritata argumento ne multe impresas min. Kaj jen tial : estas kontrolebla fakto, ke preskaŭ ĉiuj lingvistoj kontraŭas la ideon pri viveblo de artefarita lingvo. Por faciligi la kontrolon, mi citu el iu verko de d-ro Alberto Doza (Dauzat) : "Nekontraŭdireble, la malnova ideo pri universala lingvo, komuna al ĉiuj homoj, estas nura ĥimero..." (La Prilingva Filozofio, p.45 - La Philosophie du Langage, Bibliothèque de Philosophie scientifique, Paris, 1927). Tiu aŭtoro, kies

kompetenton vi kredeble agnoskas, dediĉis tutan ĉapitron al la demando pri artefaritaj lingvoj, por science, "kompetente" pruvi, ke la afero estas utopia. Vi certe scias, ke ankaŭ Vendries eldiris la saman opinion antaŭ nemultaj jaroj.

Sed kredeble vi tuj pensos, ke A. Meje (Meillet), kies aŭtoritato estas pli granda ol tiu de la du aŭtoroj ĵus menciitaj, eldiris favorajn vortojn pri nia afero. Jes ja, kaj siatempe (en 1920) mi publikigis leteron de li en La Laborista Esperantisto. Tiam mi ne hontis ĝeni lin per demandoj kaj, ne sciante, kiel vi, ke mi estas analfabeto en lingvaj aferoj, li bv. favori min per respondo. Sed ni ne forgesu, ke tiu mondfama lingvisto skribis jenon en sia verko "La Lingvoj en la Nova Eŭropo" : "La esp-istoj agis tre naive, kiam ili tradukis en esp-o (intence mi forlasas la akuzativon) verkojn literaturajn, kiuj estas universale konataj. La literaturo estas fako, en kiu oni absolute ne povas utiligi artefaritan lingvon." (El la menciita verko, p. 326).

Nu, ĉu mi, kiu uzas esp-on pli facile ol mian gepatran lingvon, kiu praktikis ĝin kun homoj el ĉiuj mondpartoj, povas riverenci antaŭ la "kompetento" de d-ro Doza kaj humile konfesi, ke ja estas miaflanke ridinda pretendo havi opinion pri lingvaj aferoj ? Kaj ĉu la du aŭtoroj de "Pl. Gr.", kiuj nemalofte literaturumas, proze kaj poezie, devas sin klini antaŭ la verdikto de l'fama profesoro ĉe la Pariza Universitato ? Ambaŭkaze nur nea povas esti la respondo. Plie, mi pensas, ke Zamenhof ankaŭ ne estis lingvisto kaj tamen arogis al si la pretendon doni al la tuta mondo artefaritan lingvon. Pro tiuj konsideroj, malgraŭ mia senkompetento, mi ne timis eldiri mian opinion pri via verko kaj akceptas vian inviton diskuti pri nia komuna afero.

* *
*

Sed tuj mi konfesu, ke difinitan "tezon" mi ne havas. Krome mi deklaras insiste, ke mia vidpunkto pri la evoluo de nia lingvo havas absolute nenion komunan kun la "marksleninista" lingvistiko. Ega estas mia miro, ke vi povis

supozi tion. Ŝajne vi forgesis, ke en la "Tezoj pri internacia lingvo, prilaboritaj de la brigado de lingvokonstrua fako kaj akceptitaj de plenkunsido de la Scienc-esplora Instituto de la lingvo - ĉe la Popolkomisario de klerigo R.S.F.S.R. Moskvo" kaj publikigitaj en "La Nova Etapo", kajero tria, dum la jaro 1932-a, oni povas interalie legi jenon : "6.En la disvolviĝ-procedo de la burĝa socio estis kreitaj sennombraj projektoj de helpaj lingvoj, inter kiuj plej vivkapabla sin montris la projekto konata sub la nomo "lingvo Esperanto". Ni ne devas tamen malakcepti utiligon ankaŭ de aliaj internaciaj lingvoj, se ilia disvastigiteco faras tiun utiligon ebla."

Ĉu iu ajn esp-isto povus konsenti kun tia tezo ? Bonv. do memore noti, ke neniun el miaj antaŭaj kritikoj pri la "Moskva lingvoscienco" mi malkonfesas. Kaj, plie, favoru min, ne supozante, ke pri la proletaro mi opinias, ke ĝi posedas senspertan sciencon pri lingvaj aferoj. Tute ne ! Mi krome konsentas kun vi, ke en la naciaj lingvoj la gramatikistoj estas senpovaj por influi ilian evoluon.

Kaj nun, supozante, ke ne plu ekzistas miskomprenoj inter ni, la esencan problemon mi alfrontas. Ĉu la leĝoj, kiuj efikas en la malraciaj lingvoj naciaj, ankaŭ valoras por nia sennacieca lingvo, racieme (mi ne diras : racie, tial ke, bedaŭrinde, Zamenhof ne plene sukcesis tiurilate) artefarita ? Kaj se oni maljesas al tiu demando, ĉu la aŭtoroj de esp-a gramatiko ne devas apliki alian metodon ol tiun de la lingvistoj, kiuj esploras naciajn lingvojn?

Kvankam mi estas viadire analfabeto en lingvistiko, tamen mi scias, ke A. Meje skribis jenon :

"La lingvistikaj leĝoj ne estas ĝeneralaj kiel tiuj de l'fiziko kaj kemio, sed specialaj al iu lingvo kaj al iu epoko." (Historia lingvistiko...p. 16, laŭ cito de Doza en "Prilingva Filozofio" p. 290).

Kaj alipaĝe la sama aŭtoro substrekas : Meje demonstris, ke rilate al la lingvistikaj leĝoj oni ne devas paroli pri necesoj, sed nur pri ebloj.

Se tiel estas, ŝajnas al mi, ke aŭtoro de esp-a grama

tiko ne devas esti gvidata en sia laboro per la "tradicio lingva", li devas, imite al nia Majstro, racieme streĉi la volon por ne fuŝi la apartan econ de nia lingvo, kiu estas ĝia artefariteco - kaj tiu eco fontas en la racio. Mi havas la firman konvinkon, ke vere esperanteca gramatiko povus egè influi sur la evoluon de nia lingvo, kaj tiu mia senkompetenta opinio almenaŭ ne kontraŭas al la aŭtoritataj asertoj de A. Meje. Inter la esp-istaj laboristoj mi ĉiam rimarkis grandan deziron uzi korekte la lingvon - kaj ankaŭ elreviĝan malkontenton, ĉe la konstato, ke ne eblas ekscii, ĉu oni devas diri, ekz-e, "eterno" aŭ "eterneco", "avido" aŭ "avideco", "malriĉo" aŭ "malriĉeco", "justo" aŭ "justeco", "la jena" aŭ simple "jena" ktp. ks., ĉar Zamenhof mem uzis kaprice tiujn duoblajn formojn por esprimi tute la saman ideon. Kelkfoje sur la sama paĝo de verko oni povas fari tian bedaŭrindan konstaton. La rolo de gramatikisto estus do difini simplajn kaj klarajn regulojn por uzi kompreneble nian lingvon, anstataŭ celi per subtilaĵoj liveri pravigon pri ĉiuj kontraŭecaj formoj Zamenhofaj - aŭ pri siaj propraj. Kaj tion farante, li pli inde honorus al nia Majstro, ol per la provo pravigi liajn mankojn per skolastikeca rezonado.

Ĉar, laŭ la aŭtoritata opinio de Meje, la lingvistikaj leĝoj rilatas nur al iu lingvo, kaj, koncerne tiun lingvon mem, nur al iu epoko de ĝia vivo, mi senĝene asertas, ke nunepoke la profesoroj kaj aliaj intelektuloj pli malbone influas la evoluon de nia lingvo ol la elementuloj, kiujn vi kulpigas. La unuaj komencas ordinare verki aŭ traduki tuj post la lernado de esp-o, antaŭ ol esti akirintaj esperantecan senton per longa praktikado de la lingvo kaj do tute nature ili tendencas enkonduki idiotismojn. Kaj la plej danĝeraj el tiuj fuŝuloj estas la poliglotoj, kiuj opinias havi kompetenton en nia afero, tial ke ili povas citi el kelkaj lingvoj por pravigi siajn absurdaĵojn. Ordinare poliglotoj havas la cerbon plena je vortoj kaj sendube pro tio ne restas loko en ilia pensorgano por originalaj ideoj. La duaj, t.e. la elementuloj, povos malboninflui sur la evoluon de nia lingvo nur, kiam ĝi fakte estos jam venkinta. Bedaŭrinde, tiu danĝero ne estas

baldaŭa, dum la malbona influo de iaj intelektuloj estas nuna...

Por pravigi mian aserton, mi denove mencios la bedaŭratan K-don Ozere, kiu fuŝe skribis kaj parolis en franca lingvo kaj tamen flue kaj korekte uzis esp-on. Kaj en la maja n-ro de "S-ulo" vi povis legi la nekrologon, kiun verkis pri si mem K-do Bubo antaŭ ol sin mortigi. Jen denove ekzemplo de simpla laboristo, kiu penadis uzi korekte nian lingvon kaj flue ĝin parolis. (Li ankaŭ ci-umis ; cetere mi mem ci-umas kun kk. personoj.) Kaj ĉu do ne estas la ĉarpentisto Haber, kiu iniciatis la eldonon de gramatiko por franclingvanoj kaj verkis ĝin en kunlaboro kun simpla instruisto ! Tiu gramatiko jam atingis la eldonkvanton de 32.000 ekzempleroj, kaj ĝi eĉ trovis la ŝaton de neŭtraluloj, kiuj petis la permeson fari apartan eldonon, en kiu forestas la socialismaj esprimoj. Mi povus mencii amason da tiaj faktoj, por pruvi tute klare, ke via aserto pri la malbona influo de la elementuloj sur nian lingvon estas tute, absolute senbaza nunepoke. Ne la proletaj esp-istoj kreis la "tradicion lingvan", antaŭ kiu vi riverencas en via tro plena gramatiko. Estas la "bonaj aŭtoroj", kies erarojn, mankojn, idiotismojn vi penadis pravigi per subtilaĵoj.

Neniel mi volas, ke la proletoj estu ordonpovaj en Esperantio. Mi deziras nur, ke gramatikistoj penadu per ĉiuj fortoj por doni al ili esperantecajn lernilojn kaj tiaj, en la nuna stato de nia afero, ne devas speguli la absurdan "tradicion lingvan", kiu valoras nur por naciaj lingvoj. Se la ĝisnuna tendenco naciece malsimpligi nian lingvon daŭre kreskus, ne necesas esti profeto, por antaŭdiri, ke esp-o fariĝus ne plu taŭga ilo por la simpla popolo. Kaj mi opinias, ke la homoj, kiuj penadas per ĉiuj fortoj por liberigi sin je ĉia nacieca influo, t.e. la sennaciistoj (do ne ĉiuj SAT-anoj) ne povas resti indiferentaj antaŭ la skolastikeco de gramatikistoj.

Vi komplezis diri, ke "ĉio ne estas erara en mia argumentado". Nu, mi ankaŭ ne pensas, ke ĉio estas mallaŭdinda en via verko. Ekz-e, sur la p. 327 mi tre kontente legis jenon : "Frazo kiel : ŝi ekvidis siajn fratinojn

leviĝantajn el la maro[z] ŝajnus hodiaŭ nekorekta kaj devus esti ĝustigita en : leviĝantaj aŭ leviĝi." Tute prava estas via instigo ne uzi balaste la akuzativon. Kaj mi sekvis vian konsilon, kiam mi skribis la frazon, kiun vi kritikas. Konfesu, ke tre maltrafe vi elektis vian ekz-on! Mi forlasis la akuzativon ĉe tri vortoj, tial ke ĝi ne estis necesa por la klaro (antaŭ la vortoj sen akuzativo oni tuj subkomprenas la subjekton : kiuj. Se vi scias "tabelumi" mi ankaŭ povus facile lerni la harfendadon) kaj tiel evitis la sonon ...ajn, kiu vere tiklas malagrable la aŭdsenton, kiam ĝi estas sinsekve tro ofte ripetata. Malgraŭ la forlaso de tiu balasta akuzativo la frazo restas tute klara kaj la aŭdsento estas kvietigita. Jen kio devus esti regulo obeinda.

Mi protestus, se iu proponus tute forigi la akuzativon el nia lingvo. Ĝi ja ofte estas necesa por la klaro kaj ĝi ebligas pli grandan liberon en la aranĝo de frazoj. Kaj mi preferas diri : la muso kuras sub la liton, ol al sub la lito, kiel en Ido...

Malgraŭ mia nekompetento - ĝuste pro tio, vi sendube pensos - mi povus verki centojn da paĝoj pri tiu temo. Sed mi nun pensas, ke la lingvisto Fr. Paŭlhan estas tute prava, kiam li rimarkigas, ke "...vorto neniam havas tute la saman signifon por du malsamaj personoj, nek por la sama persono en du malsamaj momentoj". (La Duobla Funkcio de la Lingvo, p. 27 - 1929). Verŝajne pro tio, vin mi ne kapablus konvinki, nek vi min.

Almenaŭ ne dubu pri mia sincero kaj pensu, ke mi precipe estas severa al miaj amikoj.

Jam delonge mi perdis la esperon, ke nia afero antaŭeniros grandpaŝe. Antaŭ 20 jaroj mi esperis multon de la Internaciista Movado Laborista - kiel aliaj samideanoj celis akiri solvon per la Ligo de Nacioj. Ni ĉiuj estis tre naivaj. La esperanta movado malvolviĝos paralele al la aliiĝo de l'homa spirito laŭ racieca tendenco. Ĉio, kio povas helpi en tia metamorfozo, tio havas mian simpation - kaj ĉio, kio restas ligita al la tradicio, al la rutino, al la skolastiko, tio vekas mian indignon. Tial nedankeme

- kaj senkompetente - mi kuraĝis malaprobe recenzi vian grandan verkon...

Kun simpatio kaj estimo

E. Lanti, SAT-ano 1.

TABELO DE ENHAVO
****

* Tri Semajnojn en Rusio (1922) ... 1

Sennacieca Revuo, nov., dec.1922,
jan., feb., mart., april-majo, jul.1923.

* Ĉu la Unua de Majo havas ankoraŭ sian dekomencan signifon ? ...67

Sennacieca Revuo, majo 1933, jun.-jul.1933

* Epiloge - De Ekstere, de supre ...75

Sennaciulo, jan. 1933.

- Epiloge ...81

Sennaciulo, mar. 1933.

- Fine ni trafis la celon... ...84

Sennaciulo, apr. 1933.

- Marks ne estis marksisto ...87

Sennaciulo, maj. 1933.

* Principoj de unueco Sennaciulo, feb.1935. ...91

* Diskutejo ...99

- Peto al K-do E. Lanti
(K-do Nieuwenhuizen, S.R. aŭg.38)
- Ni bezonas marksistan papon
Sennacieca Revuo, jan. 1939 ..101

* Pri la morto de Bubo ..107

Sennaciulo, sep.-okt.1939

* Tro Plena Gramatiko kaj ne sufiĉe Plena Vortaro ...109

Sennacieca Revuo, majo 1939.

* Letero al K-do Lanti (G.Waringhien) ...124

Sennacieca Revuo, junio 1939.

* Responde al K-do G. Varingjen ...129

Sennacieca Revuo, aŭg.- sept.1939.

Bibliografio

Verkoj de E. Lanti :
****

* For la Neŭtralismon! (broŝuro) (*)
* La laborista esperantismo (broŝuro) (**)
* Manifesto de la Sennaciistoj (broŝuro) (*)
* Naciismo (libreto) (elĉ)
* Vortoj de Kdo E. Lanti (libro) (**)(*)
* Leteroj de E. Lanti (libro) (elĉ)
* El Verkoj de Lanti - 1 : (**)
  - Absolutismo - Herezulo - Herezaĵo -
  - El leteroj de E.L. - Adamaĵoj -
* El Verkoj de Lanti - 2 : (**)
  - Tri semajnojn en Rusio - Epiloge -
  - Diskutejo - Tro Plena Gramatiko... -
* Fredo (en "Vivo de Lanti" de Borsboom) (*)

Kunlabore kun Ivon :
* Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio? (elĉ)

Tradukoj de E. Lanti :

* Tri Verkoj de Volter (Kandid, Zadig, Senartifikulo) (*)
* Skizo pri filozofio de la homa digno (P.Gille) (*)
* La Veraj Interparoloj de Sokrato (Han Riner) (**)
* Por nia medito (Alain, Han Riner) (broŝ.) (**)

Pri E. Lanti :
****

* Vivo de Lanti (E. Borsboom)(libro) (*)
* Artikoloj en "Sennacieca Revuo" :
  - Pri Lanti (Waringhien) (SR n°80) (elĉ)
  - Vojaĝo tra la pensomondo de E.Lanti (Bartelmes) (SR n°98) (*)
  - E.Lanti, la homo kaj la pensulo (Bartelmes) (SR n°100) (*)
  - Lanti post du generacioj (Lagrange)(SR n°104)(*)

(*)Havebla ĉe SAT, 67 av.Gambetta, F 75020 PARIS.
(**)Havebla ĉe Cercle espérantiste de l'Agenais, F 47340 LAROQUE TIMBAUT.

Directeur de publication
& imprimeur : Chr. Baudé
F 47340 Laroque Timbaut.